

ESPERANTO

V-18679/21

(1933)

JARLIBRO

de la Esperanto-Movado

1933



Universala Esperanto-Asocio
1 Tour de l'Île, Genève, Svislando

LEBNEG HONOROZUKA

LEONARDO RUOMCZEWSKI

JARLIBRO

DE LA

ESPERANTO-MOVADO

1933

(21a Jaro. Unua Jarlibro aperis 1908.)

Ne aperis 1915, 1917—1919.

La enhavo de tiu Jarlibro ne povas esti represata,
ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de UEH.

LEONARDO RUOMCZEWSKI

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
1 TOUR DE L'ILE, GENÈVE, SVIS.

Copyright by Universala Esperanto-Asocio, Geneva, Switzerland

Kalendaro 1933

Januaro							Februaro							Marto						
D	1	8	15	22	29	D	—	5	12	19	26	D	—	5	12	19	26			
L	2	9	16	23	30	L	—	6	13	20	27	L	—	6	13	20	27			
Ma	3	10	17	24	31	Ma	—	7	14	21	28	Ma	—	7	14	21	28			
Me	4	11	18	25	—	Me	1	8	15	22	—	Me	1	8	15	22	29			
Ĵ	5	12	19	26	—	Ĵ	2	9	16	23	—	Ĵ	2	9	16	23	30			
V	6	13	20	27	—	V	3	10	17	24	—	V	3	10	17	24	31			
S	7	14	21	28	—	S	4	11	18	25	—	S	4	11	18	25	—			
Aprilo							Majo							Junio						
D	30	2	9	16	23	D	—	7	14	21	28	D	—	4	11	18	25			
L	—	3	10	17	24	L	1	8	15	22	29	L	—	5	12	19	26			
Ma	—	4	11	18	25	Ma	2	9	16	23	30	Ma	—	6	13	20	27			
Me	—	5	12	19	26	Me	3	10	17	24	31	Me	—	7	14	21	28			
Ĵ	—	6	13	20	27	Ĵ	4	11	18	25	—	Ĵ	1	8	15	22	29			
V	—	7	14	21	28	V	5	12	19	26	—	V	2	9	16	23	30			
S	1	8	15	22	29	S	6	13	20	27	—	S	3	10	17	24	—			
Julio							Aŭgusto							Septembro						
D	30	2	9	16	23	D	—	6	13	20	27	D	—	3	10	17	24			
L	31	3	10	17	24	L	—	7	14	21	28	L	—	4	11	18	25			
Ma	—	4	11	18	25	Ma	1	8	15	22	29	Ma	—	5	12	19	26			
Me	—	5	12	19	26	Me	2	9	16	23	30	Me	—	6	13	20	27			
Ĵ	—	6	13	20	27	Ĵ	3	10	17	24	31	Ĵ	—	7	14	21	28			
V	—	7	14	21	28	V	4	11	18	25	—	V	1	8	15	22	29			
S	1	8	15	22	29	S	5	12	19	26	—	S	2	9	16	23	30			
Oktobero							Novembro							Decembro						
D	1	8	15	22	29	D	—	5	12	19	26	D	31	3	10	17	24			
L	2	9	16	23	30	L	—	6	13	20	27	L	—	4	11	18	25			
Ma	3	10	17	24	31	Ma	—	7	14	21	28	Ma	—	5	12	19	26			
Me	4	11	18	25	—	Me	1	8	15	22	29	Me	—	6	13	20	27			
Ĵ	5	12	19	26	—	Ĵ	2	9	16	23	30	Ĵ	—	7	14	21	28			
V	6	13	20	27	—	V	3	10	17	24	—	V	1	8	15	22	29			
S	7	14	21	28	—	S	4	11	18	25	—	S	2	9	16	23	30			

Rimarko: Tabelo de enhavo ĉe la fino de la Jarlibro

Enkonduko

Kara leganto,

Universala Esperanto-Asocio transdonas al vi per tio ĉi la Jarlibron 1933, la 21-a en la serio kaj la Jubilea laŭ la fondo de la Asocio. Pasis 25 jaroj, kiam kelkaj fervoruloj efektivigis deziron esprimitan de la aŭtoro de nia lingvo mem, nome grupigi la konvinkitajn Esperantistojn en taŭga maniero por praktike utiligi la lingvon. Samtempe subteni la propagandon por la lingvo per argumentoj videblaj, nome, ke la lingvo ne nur staras sur la papero, sed vivas kaj servas.

Verdire Universala Esperanto-Asocio ne havis facilan vivon. Naskiginte dum danĝera tempo por nia lingvo, UEA tuj akiris kelkajn milojn da oferpretaj samideanoj. Tiu ĉi tempo ja estas nekonata por la plimulto de la nuna membraro de UEA. Konvenas do, ke la nuna Jarlibro informu pri tiu ĉi tempo, ĝenerale pri la historio de nia Asocio. Vi trovas do en ĝi historian skizon pri UEA, ĝia ideo kaj ties efektivigo.

Inter la aldonoj de tiu ĉi historia skizo vi trovas represon de traktajo, verkita de H. Hodler, kaj titolita „Kiel nin organizi“. Estas stranga hazardo, ke 20 jarojn post apero de tiu ĉi broŝuro la sama problemo revenas. Valoras do en la nuna momento montri al la novuloj en Esperantujo, kaj memori al la veteranoj, ke UEA *neniam* kontraŭstaris al racia organizo de nia movado. Sed la spertoj de 1912, ne kuraĝigas eksperimenti ĝuste en tempo senkompare pli malfacila ol en la ekvilibrita epoko antaŭmilita. Tiu ĉi teksto ankaŭ provas, kiel fakte malmulte ŝanĝiĝis. Restas la samaj deziroj, la samaj fundamentaj kondiĉoj. Ŝanĝiĝis nur *unu* grava detalo, nome la financaj kondiĉoj, pri kio ja ĉiuj konsentas.

Malgraŭ firma volo de la kompilinto, la Jarlibro ne povis eliri tiom frue kiom intencite. Kvankam la pli grava parto de la Jarlibro, la Adresaro de la Delegitoj kaj grupoj, jam estis en la presejo dum Novembro pasinta, la regulaj ŝanĝoj tiom amasiĝis, ke ilia priatento formaniĝis plian tempon. Pri aliaj malhelpoj renkontiĝintaj dum la prilaboro ni volas nenion diri. Observema leganto mem divenas. Estu la nuna Jarlibro la mejloŝtono por plia progreso de UEA kaj de Esperanto!

28. Aprilo 1933

La kompilinto

Festoj kun datoj nefiksitaj

1920—1940

Jaro	Pasko	Ĉieliro	Pentekosto	Unua Adventa Dimanĉo	Jaro
1920	4. Aprilo	13. Majo	23. Majo	28. Novembro	1920
1921	27. Marto	5. Majo	15. Majo	27. Novembro	1921
1922	16. Aprilo	25. Majo	4. Junio	3. Decembro	1922
1923	1. Aprilo	10. Majo	20. Majo	2. Decembro	1923
1924	20. Aprilo	29. Majo	8. Junio	30. Novembro	1924
1925	12. Aprilo	21. Majo	31. Majo	29. Novembro	1925
1926	4. Aprilo	13. Majo	23. Majo	28. Novembro	1926
1927	17. Aprilo	26. Majo	5. Junio	27. Novembro	1927
1928	8. Aprilo	17. Majo	27. Majo	2. Decembro	1928
1929	31. Marto	9. Majo	19. Majo	1. Decembro	1929
1930	20. Aprilo	29. Majo	8. Junio	30. Novembro	1930
1931	5. Aprilo	14. Majo	24. Majo	29. Novembro	1931
1932	27. Marto	5. Majo	15. Majo	27. Novembro	1932
1933	16. Aprilo	25. Majo	4. Junio	3. Decembro	1933
1934	1. Aprilo	10. Majo	20. Majo	2. Decembro	1934
1935	21. Aprilo	30. Majo	9. Junio	1. Decembro	1935
1936	12. Aprilo	21. Majo	31. Majo	29. Novembro	1936
1937	28. Marto	6. Majo	16. Majo	28. Novembro	1937
1938	17. Aprilo	26. Majo	5. Junio	27. Novembro	1938
1939	9. Aprilo	18. Majo	28. Majo	3. Decembro	1939
1940	24. Marto	2. Majo	12. Majo	1. Decembro	1940

Kronologio

La jaro 1933 de la Gregoria Kalendaro respondas al la jaro 6646 de la Juliana periodo. Ĝi respondas al:

- 5933 post la kreo de l' mondo laŭ la Genezo;
 5693 de l' Hebreaj Kalendaro, komenco de la jaro 5693 sabaton, 1. Oktobro 1932, komenco de l' jaro 5694 jaŭdon, 21. Septembro 1933;
 4277 post la diluvo;
 2811 post la fondo de Kartago;
 2709 de la Olimpiadoj;
 2686 post fondo de Romo;
 1933 de la Juliana Kalendaro, komenco: sabaton, 14. I. 1933;
 1352 de la Heĝiro (26. Aprilo 1933);
 416 post la Reformacio de Luther;
 157 post la sendependiĝo de Usono (4. Julio 1776);
 141 post la Franca Respublika Kalendaro;
 16 post la Rusa Revolucio (Februaro 1917);
 11 post la marŝo al Romo (30. Oktobro 1922).

Notindaj datoj el la historio de Esperanto kaj de UEA

1859. *Zamenhof, Lazaro Ludoviko*, * 15 Dec. en Bialystok.
 1878. *Zamenhof* festas kun siaj kunlernantoj la efektivigon de la „Lingvo Universala“.
 1887. Apero de broŝuro „Dro Esperanto, Lingvo Internacia“.
 1889. Apero de la unua gazeto en Esperanto „La Esperantisto“ en Nürnberg.
 1892. Fondo de societo „Espero“ en Peterburgo (Leningrad).
 1898. Fondo de la Franca Societo por la Propagando de E.
 1899. La raporto „La Lingvo Internacia“ de *E. Naville* estas prezentata al la Akademio Franca de la Sciencoj.
 1901. Generalo *Sebert* kaj *Ch. Méray* prezentas Esperanton al la Franca Akademio de la Sciencoj.
 1903. Fondo de „Juna Esperantisto“ de *Hodler* kaj *Privat*.
 1903. Fondo de la Hispana Societo por la Propagando de Esperanto. — Fondo de la Brita Esperantista Asocio.
 1905. Unua Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer. Akcepto de la Deklaro pri Esperantismo. Elekto de la Lingva Komitato (L. K.).
 1906. Fondo de la Germana Esperanto-Societo en Braunschweig. — Dua Kongreso de Esperanto en Genève. Propono de *A. Carles* pri kreo de „konsuloj“.
 1907. „Esperanto“, gazeto de UEA, reaperas sub gvidado de *H. Hodler*. — *Th. Rousseau* instigas la kreon de E-Oficejoj. — Tria Kongreso de E. en Cambridge.
 1908. Oficiala fondo de UEA: 28. Aprilo elekto de Delegitoj. — Kvara Kongreso de E. en Dresden. — Unua Kunsido de UEA dum la Kvara Kongreso.
 1909. Kvina Kongreso en Barcelona. — Dua UEA-Kunsido.
 1910. Unua Kongreso de UEA en Augsburg. — Sesa Kongreso de Esperanto en Washington.
 1911. Sepa Kongreso de Esperanto en Antwerpen (Anvers). — Dua Kongreso de UEA.
 1912. Oka Kongreso de Esperanto en Kraków. — Tria Kongreso de UEA en Kraków. Financa reformo de UEA.

1913. Naŭa Kongreso de E. kaj Kvara de UEA en Bern.
1914. Deka Kongreso de E. kaj Kvina de UEA en Paris.
1915. XIa Kongreso de Esperanto en San Francisco.
1916. Morto de *Harold Bolingbroke Mudie*, prezidanto de UEA (6. Januaro). — Morto de *Th. Rousseau*, vicprezidanto de UEA (11. Aprilo).
1917. Morto de *Dro L. L. Zamenhof* en Warszawa (14. Aprilo). — Morto de *Rektoro Boirac*, prezidanto de la Esperantista Akademio (20. Decembro).
1920. Morto de *Hector Hodler*, prezidanto de UEA (30. Marto). — XIIa Kongreso de Esperanto kaj Ses de UEA en Hago.
1921. Rezolucio de la Xa Internacia Konferenco de la Ruĝa Kruco en Genève. — XIIIa Kongreso de Esperanto kaj Sepa de UEA en Praha. — Rezolucio subtenita de 13 ŝtatoj ĉe la Dua Kunveno de la Ligo de Nacioj, favore de instruado de Esperanto en la lernejoj.
1922. Pedagogia Konferenco pri Esperanto en Genève. — XIVa Kongreso de Esperanto kaj Oka de UEA en Helsinki. Decido de I' Kongreso pri Oficiala Organizo Esperantista. — Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj, kaj raporto pri Esperanto al la Tria Kunveno.
1923. Komerca kaj Turisma Konferenco pri E. en Venezia. — XVa Kongreso de E. en Nürnberg; UEA oficiala organizaĵo Esperantista. — Morto de *Dro A. Mybs*, honora membro de UEA, honora prezidanto de G. E. A. kaj akademiano. — Morto de kolonelo *Pollen*, honora prezidanto de B. E. A. — Morto de prelato *A. Giesswein*, prezidanto de Hungara Esperanto-Societo.
1924. Rekomendo de la Ligo de Nacioj al la ŝtatembraroj, trakti Esperanton kiel klaran lingvon en telegrafado. — XVIa Kongreso de Esperanto en Wien, memortabulo ĉe hotelo Hammerand. — Morto de S-ino *Klara Zamenhof*, vidvino de la Majstro (7. Decembro).
1925. XVIIa Kongreso de Esperanto kaj Somera Universitato en Genève. — Esperanto klara lingvo en telegrafado. — Rezolucioj ĉe Paca Kongreso en Paris, Kongreso de Teknika Gazetaro, Trade Unions. — Poŝtmarko kun teksto en E., eldonita de I' U. S. S. R.-poŝto. Internacia konferenco en Paris por la uzado de Esperanto en la komerco kaj industrio.

1926. Konferenco en Locarno. — Inaŭguro de Zamenhofa Monumento. — XVIIIa Kongreso de Esperanto kaj Somera Universitato en Edinburgh. — Dua poŝtmarko Esperanta. — S. A. T.-Kongreso en Leningrad.
1927. Konferenco en Praha pri „Paco per Lernejo“. — XIXa Jubilea Kongreso de Esperanto kaj Somera Universitato en Danzig. — Honora poŝtmarko kun bildo de Zamenhof, eldonita de la poŝto de U. S. S. R.
1928. 20-jara ekzisto de UEA. — Unua Esperantista popolnombro. — XXa Kongreso de E. en Antverpeno. Somera Universitato „La Maro“. *John Merchant*, prezidanto; *Dro Privat*, honora prezidanto de I. C. K.
1929. Komerca kaj Trafika Konferenco en Frankfurt a. M. — XXIa Kongreso de Esperanto en Budapeŝto kaj Somera Univ. — S-ino *Hankel*, Dresden † (15. Dec.). Inaŭguro de Internacia E.-Muzeo en Wien (1. Aŭg.).
1930. Generalo *Hippolyte Sebert*, Ano de I' Akademio, fondinto de I' Esperantista Centra Oficejo en Paris, Honora Membro de UEA, Honora Prezidanto de K. R., † 25. Januaro. — XXIIa Kongreso en Oxford.
1931. Prof. *Cart*, pioniro de E. kaj prezidanto de I' Akademio, † 21. Majo. — XXIIIa Universala Kongreso en Kraków. — Meto de I' fundamenta ŝtono por monumento honore al Zamenhof, en Białystok. —
1932. XXIVa Universala Kongreso en Paris. — Dissiĝo de I' Kontrakto de Helsinki (4. Aŭgusto). — Ĉesigo de K. R. kaj de I. C. K. Akcepto de Konvencio de Paris kaj elekto de Komisiono sep-membra por ellabori projekton de ĝenerala organizo. Rifuzo de UEA partopreni pro principaj kaŭzoj.
1933. Malakcepto de I' organiza projekto U. F. E. per la Komitato de UEA (20. Januaro). — Jubileo de UEA, 25-jara, fondo 28. Aprilo 1908. — XXVa Universala Kongreso en Köln (Germanujo).

Estas aĉeteblaj ankoraŭ la Jarlibroj el sekvantaj jaroj: 1921, 1922, 1924, 1925, 1926, 1931, 1932

Unu ekzemplero: Frk. sv. 2.— / La tuta kolekto de sep jarlibroj: Frk. sv. 7.50

Universalaj Kongresoj de Esperanto

Orda No.	Urbo	Dato	Prezidis	Aliĝintoj (K: Kongresanoj, L: el tiom da landoj, R. S.: Regnaj, senditoj oficialaj)			Decidoj, Rezolucioj [pri:], Atentindaĵoj
				K.	L.	R. S.	
**	Calais-Dover	1904 VIII. 7.—8.	Capé-Montrosier	180	6	—	Kongresoj ĉiujaraj, E-a signo. Elparolo.
I.	Boulogne-sur-Mer	1905 VIII. 7.—12.	Zamenhof kaj Boirac	688	20	—	Deklaracio pri E-ismo. Fundamento, Lingva Komitato. Flago. Projekto de konsulejoj
II.	Genève	1906 VIII. 28.—2. IX.	Schneeberger	818	30	—	Konstanta Kongresa Komitato. Neŭtraleco. Fak-kunsidoj. Scienca Asocio E-ista.
III.	Cambridge	1907 VIII. 12.—17	Pollen	1317	35	1	Spesmiĵo: Sistema de internacia mono.
IV.	Dresden	1908 VIII. 17.—22.	D-ro Mybs	1368	40	7	Instituto de Esperanto. Unua kunveno de UEA.
V.	Barcelona	1909 IX. 6.—11.	Pujula y Valles	1287	32	19	Organizo de naciaj societoj. Financoj, Laboro de la Akademio.
VI.	Washington	1910 VIII. 15.—20.	J. Barrett	357	20	16	Internacia Konsilantaro (unua provo de tutmonda organizo),
VII.	Antwerpen	1911 VIII. 20.—27.	A. Van der Biest	1733	42	26	Rajtigataj Delegitoj (nova provo de organizo).
VIII.	Kraków	1912 VIII. 11.—18.	Mikolajski	946	28	11	Kongresa regularo. Lasta kongresa parolado de Zamenhof. 25-jara jubileo.
IX.	Bern	1913 VIII. 24.—31.	Jakob Schmid	1015	30	16	Fidesprimo al Lingva Komitato. Necesso de kunagado kaj konkordo.
X.	Paris	1914 VIII. 2.	La kongreso ne okazis.	3739	50	—	Kelkaj privataj kunsidoj okazis por helpi al forirantaj samideanoj.
XI.	San Francisco	1915 VIII. 22.—29.	R. Colquhoun	163	16	17	Propagando en universitatoj.
**	Paris	1919 IX. 21.—25.	Rollet de l'Isle	26	3	—	Denova okazigo de ĉiujaraj kongresoj. Rajtigataj Delegitoj.
XII.	Hago	1920 VIII. 9.—15.	J. R. Isbrücker	408	27	7	Teknikaj vortaroj. Organizo. Necesso de komuna centro.
XIII.	Praha	1921 VII. 31.—6. VIII.	D-ro Kamaryt	2561	35	30	Centra organizo de la E-movado.
XIV.	Helsinki	1922 VIII. 9.—15.	Von Frenckell	820	30	14	Kontrakto inter UEA kaj Naciaj Societoj. 1930-40 %
XV.	Nürnberg	1923 VIII. 2.—8.	J. Dietterle	4963	43	12	Zamenhofa monumento. Konfirmo de la kontrakto de Helsinki. UEA, oficiala institucio.
XVI.	Wien	1924 VIII. 6.—14.	Dr. Minibeck	3400	40	8	Kongresa regularo. Lingva disciplino. Rezolucio pri neŭtraleco.

Universalaj Kongresoj de Esperanto

Orda No.	Urbo	Dato	Prezidis	Aliĝintoj			Decidoj. Rezolucioj [pri:] Atentindaĵoj
				(K: Kongresanoj, L: el tiom da landoj, R S.: Regnaj, senditoj oficialaj)			
				K.	L.	R. S.	
XVII.	Genève	1925 VIII. 2.—7.	Edm. Privat	953	35	38	Prelegoj en la unua Somera Universitato. Zamenhofa memor-festo.
XVIII.	Edinburgh	1926 VIII. 1.—7.	W. Page	960	36	34	Somera Universitato. Propagando per lernejo.
XIX.	Danzig	1927 VII. 28.—4. VIII.	B. Aeltermann	905	34	35	Somera Universitato. Enketo pri instruado de E. en lernejoj.
XX.	Antwerpen	1928 VIII. 3.—11.	Frans Schoofs	1494	36	34	Jubilea festo de UEA. Somera Universitato. E. en Radio.
XXI.	Budapest	1929 VIII. 1.—8.	J. Mihalik	1256	33	24	Elparolado. Radio-propagando. Tradukado en kongresoj.
XXII.	Oxford	1930 VIII. 2.—9.	B. Long	1200	30	12	Somera Universitato. E. en Radio kaj en komerco. Ĉe-metodo.
XXIII.	Kraków	1931 VIII. 1.—8.	Prof. Bujwid	713	30	6	Propag. per filmo, gazet., ŝlosiloj. E en turis. Rezol. Kunv. de UEA Postkongr.: Varsovio, Bialystok.
XXIV.	Paris	1932 30. VII.—6. VIII.	G. Warnier	1618	36	11	Somera Univ. Organiza problemo. Nuligo de Helsinki-kontrakto Akcepto en Urbo-domo.

Esperantista Lingva Komitato

La Esperantista Lingva Komitato konsistas el lingvaj kompetentuloj, kies nombro ne estas limigita. La anoj de la L. K. estas elektataj de la Lingva Komitato mem por naŭ jaroj laŭ listo starigita de la Akademio. Rajtas prezenti kandidatojn la Naciaj Societoj, UEA kaj la Fakaj Societoj. Nuntempe la L. K. konsistas el 134 anoj. Laŭ la lingvo partoprenas: Angla 14, Armena 1, Bulgara 1, Ĉeĥa 5, Ĉina 1, Dana 1, Estona 1, Fiŝna 1, Flandra 2, Franca 20, Germana 20, Greka 1, Hebrea 3, Hispana 6, Holanda 5, Hungara 5, Itala 7, Japana 2, Kataluna 5, Ladina 1, Latva 1, Litova 1, Norvega 2, Persa 1, Pola 8, Portugala 4, Rumana 1, Rusa-Blankrusa-Ukraina 13, Sveda 3.

Esperantista Akademio

Supera komisiono de la Lingva Komitato. Prezidanto: N . . . — Vicprezidantoj: N . . . kaj N . . . Baldaŭaj balotoj kompletigos la nombron de la Akademianoj (18) kaj ebligos la elekton de la laŭregula estraro. — Direktoroj de Fakaj Sekcioj: Prof. E. *Grosjean-Maupin*, Dro W. *Lippmann*. — Membroj: J. *Baghy*, W. *Bailey*, L. *Belmont*, P. *Christaller*, W. E. *Collinson*, Pierre *Corret*, V. *Inglada*, G. *Isbrücker*, B. *Migliorini*, P. *Nylén*, *Setälä*, *Stamatiadis*.

Akademias Korespondantoj: S-ro *Rollet de l'Isle* (Scienco kaj Teknika Vortaro), S-ro E. *Drezen* (Rusa lingvo), S-ro M. *Sola* (Kataluna), S-ro A. *Tellini* (Ladina), Dro *Leono Zamenhof* (Pola), S-ro *Edv. Backheuser* (Portugala).

Oficiala Bulteno de la Esperantista Akademio.

Neregule. — F.: 1930, 22 p., 22,5 × 15 cm. — Red. kaj Sekr.: R. de *Lajarte*, Fontenay-sous-Bois, Seine. — Adm.: Esperantista Centra Librejo, 11, rue de Sèvres, Paris VI. — Ab.: Senpage por la anoj de l' L. K., aliaj 5 Fr. sv. jare.

Nomaro de l'anoj de la Lingva Komitato

(La anoj kun steletoj montras la anojn de l' Akademio)

- Andrejev*, A. P., Kudrinskaja, 18, Sadovaja, Moskvo
Archdeacon, Ernest, sursipe de „Jafito Esperanto“, Quai Carnot, St. Cloud, Seine-et-Oise (Francujo)
Arnhold, Dro Heinrich, Waisenhausstr. 20, Dresden
Aymonier, Camille, 34, Allées Damour, Bordeaux, Gironde
Backheuser, Dro E., Caixa postal 2494, Rio de Janeiro
Baghy, Julio, Rottenbiller ut. 66-I-20, Budapest VII
Bailey, Th. G., Laganville, Nether Street, London N 3
**Bailey*, W., Mara Domo, Glan-y-Mor Road, Penrhyn Bay, Caernarvonshire (Britujo)
Baird, F-ino Jane, 95, Bellevue Road, Edinburgh (Skotl.)
Bastien, Louis, 116 Rue de Vaugirard, Paris VI
Behrendt, Arnold, Hohenstaufenstr. 24, Berlin W 30
**Belmont*, Leon, Marszalkowska 97 A, Warszawa (Polujo)
Bennemann, Paul, Tiefestr. 5, Leipzig-C. 1
Bianchini, P. J., Cimpello de Pordenone, Friuli (Italujo)
Blaise, S-ino M., 19, Litchfield Av., Lower Morden (Surrey)
Blicher, Martin, Bredgade 63, A III, Kopenhago (Danlando)
Blok, H., Amstellaan, 65, Amsterdam (Nederlando)
Bobin, M., 21 Rue Vital, Paris XVII
Bodó, K., Szabolcska Nihály ucca 18, fsz. 2, Budapest I
Bofill, Narciso, Sindicato 188-I-ero, Palma de Mallorca
Bonnevie, H., Bergslens gate, 11, Oslo (Norvegujo)
Boucon, H., 10 Boulevard du Lycée, Annecy, Haute Savoie
Bremon y Masgrau, Dro J., Balmes 102, Barcelona
Bugge-Paulsen, R. E., Drammens-Veien, 72 c., Oslo (Norv.)
Bulthuis, H. J., Kamillestraat 37, Hago (Nederlando)
Bünemann, Oskar, Papenhuder Str. 32, Hamburg 24
Butin, Max, Kronprinzenstr. 33, Bad Godesberg (German.)
Butler, Montagu C., 142, High Holborn, London W. C. 1
†**Cart*, Théophile, 12 Rue Soufflot, Paris Ve
Chavet, Gabriel, Rue Gauthier de Chatillon 6, Lille
**Christaller*, Paul, Neue Weinsteige 61, Stuttgart (German.)

- Cogen*, Léon, 52 Drève, Ninove (Belgujo)
**Collinson*, W. E., 9, Bertram Road, Liverpool
**Corret*, Dro Pierre, 133 Boulevard Brune, Paris XIV
Couteaux, J., Hôpital Cochin, 27 Fbg. St. Jacques, Paris XIVe
Cseh (Ce), Andreo, Oostduinlaan, 32, Hago (Nederlando)
Czubyński, Dro A., Gimnazjum, Mława (Polujo)
Cernohvostov, G., Alberga (Finnlando)
Degon, P., 54, Rue Perronet, Neuilly-sur-Seine (Francujo)
Demidjuk, G., Degtjarnij per. 5, kv. 6, Moskvo 6
Diez, F., Zurbaran 9, Begona, Bilbao (Hispanujo)
Döhler, Dro W., Rosenplatz 11, Riesa a. Elbe (Germanujo)
Dombrowski, A., Rotušės Aikšte 6, Kaunas (Litovujo)
Domingues, C., Rua da Assembléa, 98, 5^o 59, Rio de Janeiro
Dreher, L., Starowislna 37, Krakow (Polujo)
Dresen, F-ino Helmi, Postkast 6, Tallinn (Estonio)
Drezen, Ernesto, Skatertni 3, kv. 5, Moskvo 69 (Ruslando)
Ellerbeck, Dro ing. L., Bayerische Str. 31, Berlin W 1
Ellersiek, F., Wilmsstr. 5, Berlin SW 61
Esselin, A., 10 Place Vintimille, Paris IX
Fischer, Henriko, str. Dr. Estrate, 10, Bucuresti, aŭ
Cuza Veda, 73, Galatz (Rumanujo)
Ghezso, Dro A., Via Montecucco 6, Trieste (Italujo)
Grau Casas, Jaume, Diputació, 50, Barcelona
Grau Casas, Jaume, Sant Quinti de Mediona (Katalunujo)
Greenkamp-Kornfeld, S., 117 Bd. Jourdan, Paris XIV
**Grosjean-Maupin*, 7 Rue Bonaparte, Paris VI
Grots, Edgaro, Elizabetes iela 9, a. 23 Riga (Latvujo)
Harvey, W., Craighill Gardens 1, Edinburgh (Skotlando)
Heilker, P., Hoofddorp (Nederlando)
Hodakowski, T., gimnazia profesoro, Legjonow, 17, Nowy
Sącz (Polujo)
Hohlov, N., Marjino 22, Moskvo 18
Hromada, Rudolf, Socharska 333, Praha VII
**Inglada*, V., Prof., Escuela superior de Guerra,
Chinchilla, 2, Madrid
**Isbrücker*, J. R. G., Oostduinlaan 32, Hago (Nederlando)

Jodko, A., Ananovskij per. dom 5, loĝ. 5, Moskvo
Kalocsay, Dro K. de, Szentkiralyi utca 3, I, 10, Budapest VIII
Kamaryt, Dro Stan., ul. Telocvična 3, Bratislava (Ĉeĥoslov.)
Karolczyk, S., Widok 19, Warszawa (Polujo)
Kastner, Paul, Ilica, 4, Zagreb (Jugoslavujo)
Kenn, Dro Won, P. O. Box 88, Kanton
Kostecki, J., Długa 28, Warszawa (Polujo)
Krestanoff, Ivan, Komerca Gimnazio, Plovdiv (Bulgarujo)
Kreuz, Robert, Genève (Svislando)
Kühnl, Edvardo, Dittrichova 7, Praha II
La Colla, Via Dandolo, 24, Roma
Laignier, M., 30, Rue Dupont-des-Loges, Nancy (M. d. M.)
Lajarte, R. de, 4 Villa d'Orléans, Fontenay-sous-Bois, Seine
Lejzerowicz, J., Skwerowa 20, Lodz (Polujo)
 **Lippmann*, Dro Walter, Leibnizstr. 13, II, Leipzig
Lundgren, John, Hedemora (Svedlando)
Mangada-Rosenörn, J., Caserno del Pacifico, 1a Reg. de Infanteria, Madrid (Hispanujo)
Mazzolini, Alessandro, Via Gallizi 22, Fano, Marche (Italujo)
Merchant, J., 13, Hartington Road, Sheffield (Britujo)
Meĥtan, Pastro F. de P., Piaristen-Kollegium en Krems a. D.
 **Migliorini, Bruno*, Via Alessandro Poerio 33, Roma 144
Miĥalski, E., ĉe ŝtata Medicina Biblioteko, en Stalino-Donbas (Ukraino)
Minor, Karl, Brahmallee 10, Hamburg
Mojado, Mariano, Abascal 13, pral. A, Madrid
Mučnik, J., str. Tel-Shamawi, Kfar Jehoŝuo, Haifa (Palest.)
Nekrasov, N., 1a Tverskaja Jamskaja, 35, kv. 1, Moskvo 47
Nišimura, K., 1, Rue Félix-Faure, Paris XVe
 **Nylén, P.*, Gröna Villan, Huddinge, Stockholm
Obruĉev, S., Moika 82, lĝ. 28, Leningrad (U. S. S. R.)
Orengo, R., provizore: No. 837, ĉe Esperanto-Centro Itala, Galleria Vittorio-Emanuele, 92, Milano (Italujo)
Pitlik, Augustin, Kremencova 17, Praha II (Ĉeĥoslovakujo)
Porto Carreiro Neto, Dro L., Rua 24-de-Maio, 154, Rio de Janeiro
Privat, Dro Edmond, 1 Tour de l'Île, Genève (Svislando)

Pulvers, S.-ino Charlotte, Adelaarsweg 41, Amsterdam-N.
Reed, Edward C., 1707 Surrey Lane, Washington, D. C.
Reed, S.-ino Ivy Kellerman (la sama adreso)
Rohrbach, Dro, Galbersweg 6, Gotha (Germanujo)
Rollet de l'Isle, 35 rue du Sommerard, Paris-Ve
Rousseau, C., 2, Rue A. de Vigny, Bécon-les-Bruyères (Seine)
Rublev, S., Kazarmenny per. 7, Odessa
Saldanha Carreira, J. A. de, Av. Duque de Loulé 50, III, Lisboa
Schmid, Jakob, Müsliweg 2, Elfenau, Bern (Svislando)
Schoor, Jan van, Julius De Geyterstraat, 131/1, Antwerpen
Schoor, Oscar van, Vondelstraat, 20, Antwerpen
Scott, H. M., 1312 Purdy Avenue, Moundsville (Westvirginia)
Sepulveda Cuadra, L., Carmen 1288, Santiago de Chili
 **Setälä, Vilho*, Mechelininkatu 21, B. 31, Helsinki (Finl.)
Sevak, G., poŝkesto, 78, Erivan (Armenujo)
Shafer, Ad., 45 Courthorpe Rd. Hampstead, London N. W. 3
Simon, Otto, Billrothstr. 31, Wien XIX
Sinpak, A., P. O. Box 88, Kanton
Sola, M., San Francisco 12, Terrassa (Barcelona)
Spiridoviĉ, E., ul. Libkneĥta 45-12, Ĥarkov (Ukraino)
 **Stamatiadis, Dro Anakreón*, Rue Rodou 21, Athenai
Stojan, Petro, Blansac-Escarène, A. M. (Francujo)
Stroele, Georges, Maujobia 7, Neuchâtel (Svislando)
Szilágyi, Dro F., Csalogany-u., 33, Budapest II
Supichova, F.-ino J., Mala Stepanska 6, Praha II
Tellini, Achille, Piazza Vittorio Emanuele 9a, Udine
Uitterdyck, D., Hyacintenlaan 1, Hilversum (Nederlando)
Underdill, Dro J., Idaho Springs, Colorado (Usono)
Vaona, Attilio, Via S. Egidio 2-4, Verona (Italujo)
Varankin, V., M. Tulsakaja 2/1, Korp. 2, kv. 119, Moskvo
Villanueva, A. L., Joaquin Cosca, 19, Murcia (Hispanujo)
Wadham, F. E., 2, Heathdene Road, London S. W. 16
Waringhien, G., 17 Place Simon-Volland, Lille (Francujo)
Wenger, Jean, Côte 113, Neuchâtel (Svislando)
Wiesenfeld, Edvardo, Ogrodowa 3, Warszawa (Polujo)
Zamenhof, Dro Leono, Marszałkowska 125, Warszawa (Pol.)
Zschepank, F.-ino J., Paul-Gerhardt-Str. 22, Dresden-A. 19

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
CENTRA OFICEJO: 12, Boulevard du Théâtre, GENEVE (Svislando)

ESPERANTISTA RESPONDKUPONO

Por internacia
afranko de unu
letero 20 grama



VALORO:
30 centimoj svisaj
N-ro 00244

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
CENTRA OFICEJO: 12, Boulevard du Théâtre, GENEVE (Svislando)

ESPERANTISTA RESPONDKUPONO

Por internacia
afranko de unu
letero 40 grama



VALORO:
50 centimoj svisaj
N-ro 02194

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
CENTRA OFICEJO: 12, Boulevard du Théâtre, GENEVE (Svislando)

ESPERANTISTA RESPONDKUPONO

Por internacia
afranko de du
leteroj po 40 gramoj



VALORO:
1 Franko svisa
N-ro 02537

Akceptata de la Centra Oficejo de UEA por afranko, kotizoj kaj
mendoj ĝis plej malltue 31 Decembro 1929.

GENEVE,
la 1an de Decembro 1926.

Jans Jakob
Direktoro

Uzu respondkuponon de UEA

Universala Esperanto-Asocio

1908—1933



Historia skizo

1920-43
71 1928



Kun granda plezuro mi legis en via letero, ke la svisaj Esperantistoj decidis inviti la Duan Kongreson en Svisujo. Tre bone, bonege! Svisujo, kiu ne havante ian nacian lingvon, estas la plej neŭtrala lando en la tuta Eŭropo, estas la plej bona loko por kongreso neŭtrale homa, kaj mi esperas, ke tie ĉiuj Esperantistoj sentos sin bonege. Mi eĉ antaŭvidas, ke venos iam la tempo, kiam Svisujo fariĝos la natura konstanta centro de la tuta Esperantistaro.

Dro L. L. Zamenhof

(Letero al Svisa Esperanto-Societo, 2. Oktobro 1905)

Dudek kvin jaroj pasis la 28an de Aprilo 1933, de kiam Universala Esperanto-Asocio estis fondita. Estas nur malmultaj inter la nunaj membroj, kiuj partoprenis tiun ĉi fondon, ĉu respondante la unuan cirkuleron, kiun dissendis tiama Centra Oficejo en Genevo, ĉu tuj deklaran sian aligon kiel delegito aŭ membro. La tiutempa movado Esperantista, se oni rajtas paroli pri movado, havis ĉefe lokan karakteron. Ekzistis lokaj grupoj, kaj nur en dek tri regnoj tutlandaj societoj en formo de federacioj (dek en Eŭropo, tri transmare). Ne ekzistis tio, kion ni komprenas hodiaŭ sub praktika agado kaj servado. Esperanto estis en sia infanaĝo kaj ĵus havis gravan atakon de malsano, nome skismo pri teorio, kiu — febro simile — skuis la tiaman fidelularon. Nekontesteble estas hodiaŭ, ke nia lingvo venkis tiun ĉi malsanon per simpla rimedo de natura metodo. Ĝi forpelis la idistajn kuracistojn, kiuj per nenecesaj ŝanĝoj kaj komplikaj volis „pliriĉigi“ la lingvon. Kaj ĝi aerumis sian propran ĉambron, enlasante freŝajn ideojn. Anstataŭ nura prediko kaj insisto pri tio, kio eblus, se Esperanto estus ĝenerala, oni provis starigi mem ion, kio helpos al la ĝeneraligo kaj sekve al la sanigo de l' infano. UEA estas infano de la kriza tempo 1907—1908, kiam minacis la disfalo de jam ne multnombra adeptaro en grupoj kaj grupetoj de interdisputantaj teoriuloj.

La ĝermoj

La ideo de internacia organizaĵo de la movado ja ne estas nova en tiu ĉi tempo. Dro Zamenhof tre frue klopodis, ke ekzistu io, kio donus al la kreskiĝanta afero la necesan apogon moralan kaj financon. Jam en la jaro 1890 li skribis pri tio, kaj ekzistis projektoj, regularoj kaj statutoj. Nur mankis la plenumo, ĉar ja ne sufiĉas nura plano. Ankaŭ mankis klareco en tiu ĉi tempo pri la bezonoj. El tiuj neprecizaj sentoj de ia bezono naskiĝis la unua organizaĵo internacia kaj sendependa: la *Lingva Komitato* kun agada komisiono, la tielnomata *Akademio* (1905). Aparte de tio fondiĝis, dank' al la monhelpo de kelkaj francaj Esperantistoj, inter ili Dro Javal kaj Generalo Sébert, la *Esperantista Centra Oficejo* en Paris, kun la celo doni centron al la fonditaj kaj fondotaj oficialaj organizaĵoj. Sub „oficiala“ oni komprenis tiutempe, ke temas pri porpropaganda institucio, sen specialaj celoj politikaj, religiaj, aplikaj.

Tamen montriĝis baldaŭ, ke ekster la tiama grupa kaj societa vivo ekzistas pliaj fortoj, malpli interesitaj je la

loka kaj instrua agado. Sentigiĝis, ke Esperanto sen reala praktikado internacia, simple kaj klare centrigita, ne havos altirpon por reale pensanta mondo. La ideoj kristaliĝis en unu tre senkulpa propono farita al la Dua Kongreso en Genevo (1906). La propono, farita de Alphonse Carles el Béziers (franca departemento Hérault) tekstis (Ekstrakto el Protokolaro de la Dua Kongreso, paĝo 72):

Estus oportune, havi en multaj urboj konsulojn, al kiuj oni povus ĉiam sukcese sin turni kaj de kiuj — per malgranda maklera pago — oni povus ricevi ĉiujn petitaĵajn sciigojn, eĉ privatajn informojn pri komercistoj. Ankaŭ la vojaĝantoj ĉiam sciuis, kien ili povus sin prezenti por ricevi bonan akcepton kaj ĉiujn postulitan informojn, ne ĝenerale iun. Anstataŭ krei la Tutmondan Ligon Esperantistan, laŭ la propono kaj la difino de Dro Zamenhof — kiu, laŭ mia opinio, enkatenu ĉiujn iniciativojn, ĉu privatajn, ĉu de la diversaj naciaj societoj —, sufiĉus krei centran konsulejon, kiu tuj kolektus la aliĝojn de la unuaj bonvolantoj kaj aperigus iliajn nomojn en la Esperantistajn gazetojn. Mi do proponas al la Kongreso akcepti la principon pri kreo de konsuloj (oficialaj aŭ ne) kaj tuj nomi komitaton, difinonta tiun kreon.

En la diskuto partoprenis S-roj Bobin, Boirac, Cart, Deshays, Mudie, Courtet, Dro Bein, Hanauer, Mybs, Waltisbühl, Capé, Schneeberger, Wenger kaj Padfield. La vorto *Konsulo* ne trovis la aprobon pro la ekzistanta diplomata ofico. S-ro Bobin proponas la vorton *Delegito*.

Kiun sekvon nun ricevis tiu ĉi propono? Nu, en la decidaro de la dua kongreso ni legas interalie:

b) Rekomendi al la societoj kaj grupoj, ke ili fondu en ĉiuj lokoj, kie estos eble, Esperantistajn konsulejojn, kiuj povos en la landoj, kie tiu nomo ne estus akceptata de la registaro, ricevi alian nomon, kiel ekzemple „Esperantistaj Agentejoj“.

Tiu ĉi bonintenca forŝovo al la grupoj malatentis jam tiam la neceson de speciala organizo kaj de centro, tial la propono estis praktike enterigita.

Preskaŭ du jarojn poste reprenis la proponon S-roj Rousseau kaj Hodler. En serio de artikoloj, ankoraŭ nun legindaj, la Direktoro de la gazeto „Esperanto“ skizis la novan organizaĵon, kaj en numero 30 de l' 1^a de Majo 1908 aperis la informo pri la fando de Universala Esperanto-Asocio.

La unua oficiala informilo en la sama numero donas la formalajn kaj praktikajn detalojn de la nova Asocio. Jam en tiuj informoj vidigas la tendenco, ke la organizo estu simpla, servopreta kaj malmultekosta.

Alia ĝermo de UEA estis la Esperanto-oficejoj, starigitaj laŭ propono de Prof. Rousseau. La unua Esperanto-ofico (ofico anstataŭ oficejo) estis en franca urbo Bourg en Bresse, kie vivis S-ro Rousseau, la kunfondinto de UEA.

La strukturo

Simpla, servopreta, malmultekosta devas esti la organizo, kaj estas ĉefe tiuj kvalitoj, kiuj kaŭzis la rapidan kreskon de UEA. La provizora regularo aperinta en la numero de „Esperanto“ de 1^a de Majo 1908 fiksas la celojn:

1. *Sub la nomo Universala Esperanto-Asocio estis fondita Asocio, kies celo estas la plifaciligado de la ĉi-uspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj.*

2. *La sola lingvo oficiala de la UEA estas la lingvo Esperanto, tia, kia ĝi estas difinita per sia literatura kaj teknika verkaro. Konsekvence la UEA neniel enmiŝiĝos en lingvaj diskutoj.*

3. *La Universala Esperanto-Asocio estas absolute neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco.*

Tiuj tri fundamentaj reguloj nur iom modifitaj troviĝas ankoraŭ nun en la statuto. Tio pruvas, ke ili respondis kaj respondas al la bezono kaj mentaleco.

La provizora regularo kun 17 punktoj fiksas la rajton de la membreco, la elekton de la Delegitoj, la rajton decidi aferojn de la Asocio, elekto de la Komitato, financoj. El tiu regularo kreskis sinsekve la nuna statuto, kiu entenas la spertojn de la epoko 1909—1919.

*

La laboro estis dividita en tri fakoj: 1. Administrado; 2. Esperanto-konsuloj kaj -oficejoj; 3. Turismo. Ĉiu fako estis sub la gvido de Komitatano kun helpo de pluraj helpkomitatanoj. La administrado centriĝis en la redakcio de „Esperanto“, kiu fariĝis la oficiala organo de UEA.

La plano de la domo konstruota ekzistis, la arkitektoj kaj laboristoj anonciĝis kaj komencis labori.

La konstruo

Ne sufiĉas starigi planon, skizi eblecojn de praktika agado. Necesas tion montri, necesas klopodi kaj penadi, kaj tion la junaj fondintoj entreprenis kun grandaj fervoro kaj celkonscio. La atentigon de la Esperantista publiko, la formadon de opinio transprenis S-ro Rousseau, kiu en serio de artikoloj, funde priprenitaj, plugis la kampon, por ke la semo trovu taŭgan teron. Se la artikoloj de Prof. Rousseau donis la gvidliniojn de la agado de UEA, tiam la oficiala informilo montris la aplikon. Tutaj paĝoj de la tiam grandformata gazeto „Esperanto“ informis pri la servoj de la tri fakoj, kaj sinsekve aperis novaj lokoj kun Delegitoj. La Turisma Fako starigis la unuan karavan-vojaĝon Esperantistan al la Kvara Kongreso, servo de UEA, kiu en estonto multe plaĉis kaj sukcesis.

La unua kunveno de UEA okazis en Dresden dum la Kvara Universala Kongreso (1908). La tagordo enhavis la raportojn de la fakoj ekzistantaj tiam, kaj proponon pri kreo de novaj fakoj: Komercokaj Industrio, Instruado. Plie oni submetis budĝeton por la jaro 1909 kaj proponon pri kotizo kun voĉdono.

Tiu unuan kongreson de UEA honoris per ĉesto Dro Zamenhof, la kreinto de nia lingvo, ĉe la malferma kunveno la 17an de Aŭgusto 1908. En sia alparolo Dro Zamenhof konfesis, ke komence li restis iom flanke de UEA, sed ke nun, konstatisinte la taskon jam efektivigitan kaj kongruante kun la fundamentaj principoj, opinias, ke ne povas ekzisti la plej malgranda dubo pri tio, ke UEA estas la plej grava institucio de Esperantismo. Li instigas ĉiujn Esperantistojn, kunlabori por UEA, kiu havas antaŭ si grandegan kaj belan taskon.

La konstruo de la domo evoluis do laŭorde: *Fundamento*: la statuto-regularo; *Kruda konstruaĵo*: la reto de Delegitoj, la membraro; *La interna aranĝo*: la servoj kaj la kongreso; *La tegmento*: la Jarlibro, kiu aperis antaŭ la kongreso kaj indikis la stacion de UEA: 206 Delegitoj, 46 Vicedelegitoj, 94 Subdelegitoj, 62 Esperanto-oficejoj, el kiuj 22 plene organizitaj. Ĉio en 249 lokoj kaj en 23 landoj. Pagintaj memoroj: 1223.

La provo sukcesis. Necesis do daŭrigi la pligrandigon kaj plivastigon de la konstruaĵo. Ankoraŭ en sama jaro UEA starigis konkursojn de praktikaj aplikoj de Esperanto.

Valoras, ke ni citu ilin kaj la nomojn de tiuj, kiuj donacis premion al gajnontoj:

Pri la plej bone organizita Esperanto-oficejo (UEA) — Pri la plej bela Esperanto-gvidlibro (Gazeto „Esperanto“) — Pri la plej bona ideo por disvastigi UEA-on kaj pligrandigi ĝian utilon (S-ro G. Warnier, Paris) — Pri la plej bone verkita raporto pri komerco kaj industrio (S-ro J. M. Warden)

La premioj sumis inter 25 kaj 50 Orfrankoj po unu.

La evoluo ĝis 1912

Kiel unuan etapon de la evoluo de UEA oni povus fiksi la tempon 1908—1912, de la fondo ĝis la tielnomita *Financa reformo*, en Krakovo, diskutita kaj akceptita. La ekstera evoluo de la Asocio estis videbla el la Jarlibroj. Ili estas la mezuriloj plej bone videblaj de la progreso kaj de la enradikiĝo. La mizeraspektan libreton de 1908, de 24 paĝoj, anstataŭis jam en 1911 broŝuro de 184 paĝoj kun 885 lokoj kun Delegitoj kaj konsuloj en 47 landoj, 158 Esperanto-oficejoj, 266 entreprenoj, 7804 membroj.

La forton de la Asocio ankaŭ dokumentas la fakto, ke la sinteno de la gvidantaj Esperantistoj de tiu ĉi tempo notinde iĝis pli favora kaj komprenema. Ja ne mankis ĵaluzo kaj malkompreno, sed antaŭ la evidenta progreso, silentiĝis ankaŭ tiuj ĉi voĉoj. Al tiu ĉi pli favora rigardo kunhelpis ankaŭ la simpatio de Dro Zamenhof al UEA, esprimita en bela parolado ĉe la Malferma Kunveno de la UEA-Kongreso en Barcelono (1909):

Estimataj membroj de UEA,

Sinjoro Mudie, via prezidanto, petis, ke mi diru ĉe via kunveno kelkajn vortojn de laŭdo aŭ mallaŭdo pri la agado de via Asocio. Ĉu mi esprimos laŭdon aŭ mallaŭdon, la respondo ne povas esti duba: post la tiel bonaj kaj gravaj raportoj, kiuj estis legitaj, post la agado, kiu en la daŭro de la lasta jaro estis plenumita de UEA, ne povas resti ĉe la plej malgranda dubo pri tio, ke lasante flanko la instituciojn oficialajn, UEA fariĝis la plej grava institucio de nia movado kaj ĝi al nia afero alportis pli kaj pli da utileco.

Antaŭ kvin jaroj ĉe la Bulonja Kongreso estis prezentita projekto de ĝenerala organizaĵo por la tuta Esperantistaro. La kongreso tiam ne volis tiun projekton kaj per deklaro difinis, ke estas nomata Esperantisto ĉiu per-

sono, kiu scias kaj uzas Esperanton, tute egale, por kiuj celoj, kaj ke nia movado ne estas oficiale ligita kun ia speciala idealo, kvankam la plej multaj en la Esperantistoj ja sentis tiun idealon kaj estis konstante gvidataj de ĝi. Sed kelkaj Esperantistoj havis la bonan ideon, fari per vojo privata tion, kion oficiale fari ni ne povis. Ili kunigis ne ĉiujn Esperantistojn, sed nur tiujn personojn, kiuj, akceptinte la internan ideon de Esperantismo, deziras esti unuigitaj de internacia organizaĵo por reciproka serservado kaj alproksimiĝado, ĉar ili pensas, ke ili tiamaniere pli kaj pli multigos inter si ligilojn de solidareco kaj sian celon atingos pli rapide, ol per izola agado.

UEA unuigas do ne ĉiujn Esperantistojn, sed ĉiujn Esperantistanojn, tio estas ĉiuj tiuj homoj, kiuj konsideras ne nur Esperanton en ĝia ekstera lingva formo, sed ankaŭ ĝian internan ideon. Ke la pli granda parto de la Esperantistaro konsentas kun tiu ĉi ideo, pravas la fakto, ke en malmulte da tempo via Asocio ricevis la plej favoran akcepton en nia movado. Oni ĉie komprenas, ke UEA liveras taŭgan neŭtralan fundamenton, por ĉiuj interhomaj interrilatoj kaj servoj, kaj el tiu ĉi reciproka sinhelpado rezultos pli da amikeco kaj estimo inter la gentoj kaj fariĝos la baroj, kiuj malhelpas ilian pacan interkomunikiĝon. En tiu ĉi principo kuŝas la ĉefa graveco de via Asocio.

Dum la oficiala Esperantistaro laŭ la deklaro de Boulogne estas devigata al plena neŭtraleco rilate al tio kaj devas sin limigi nur al pure Esperantaj demandoj, UEA — ĉar ĝi reprezentas nur personojn, kiuj deziras esti organizitaj por difinita celo aprobita de ili — povas fari grandan laboron, kiu havos grandan signifon rilate al la interna ideo de Esperantismo.

Mi do estas plene konvinkita pri la utileco de via Asocio kaj la Esperantisma karaktero de la laboro, kiun vi jam plenumis kaj ankaŭ plenumos. Mi fine sentas la devon gratuli kaj danki la sindonajn fondintojn de UEA, kiuj per sia obstina laboro kaj penado povis alkonduki tiun institucion sur la bona vojo, kie ĝi nun staras. Mi de via Asocio atendas multe da bono por nia afero, kaj mi tulkore esperas, ke UEA faros ĉiam pli gravajn progresojn kaj per sia rapida plifortikiĝo nin ŝovas antaŭen al la baldaŭa realigo de Esperantismo.

*

UEA dum la milito

La eksplodo de la milito trafis UEA en la plej bona stato: Solida konduto financa, fido ĝenerala ĉe la Esperantista publiko, klaraj gvidlinioj, ĝojiga membrostato. La 1a de Aŭgusto 1914 ja por milionoj da homoj signifis abruptan tranĉon en la vivo. Ankaŭ por la internaciaj rilatoj, kiuj atingis ĝis 1914 gradon de intimeo, ne plu atingitan post la milito. Se ni rerigardas al la tiama situacio, ni havas antaŭ ni du faktojn: 1. la preskaŭ centprocenta fideleco de la Delegitoj al idealo de supernacia kunlaboro pere de Esperanto kaj de UEA; 2. la adapto de la Centra Oficejo de UEA sidanta en Genevo, al la novaj bezonoj.

Tre gravis, ke la Delegitoj de UEA en la militantaj landoj ne estis kaptitaj de la milita spirito, aŭ ni diru: de la milita psiĥozo, kiu ja venenigis ĉion. Tio permesis, ke la Centra Oficejo daŭrigu unue sian kutiman laboron, degeliganta al nenio dum la unuaj monatoj kaj nur time reprezentanta ioman amplekson post Januaro 1915. La stabo, konsistinta kun la Direktoro el ses personoj, malgrandiĝis je du, por poste kreski ĝis ok kaj dek, kun la libervolaj helpantoj.

Kiel UEA adaptis sin al la milito kaj al la novaj bezonoj? Malmultaj scias pri tio, kaj valoras, ke ni el-tombigu la faktojn. Valoras ankaŭ koni la nomojn de tiuj personoj, kiuj alkuris, libervole helpinte nin, eĉ suferinte persekutojn, domaĝojn kaj insultojn. La deveno de la *Dummilita Helpservo de UEA* estis tre simpla.

Post la militdeklaro la Centra Oficejo preskaŭ ĉesis sian kutiman agadon. Foriris la oficistoj, kaj restis krom S-ro Hodler — tiama gvidanto kaj Direktoro — nur unu oficisto. Malmultaj korespondadoj venis, sed inter ili tiuj, kiuj donis al S-ro Hodler la ideon, starigi tuj servon. Estis germana Delegito, ankoraŭ nun funkcianta, Dro Orthal en Nürnberg, kiu, sendinte liston da nomoj, akcelis kreon de servo, kiu en tiama tempo faris grandegan bruon, permesis rekte atentigi je nia movado kaj ĝia utileco kaj tiel en certa senco retrovi la kontakton kun la Esperantistoj. Dro Orthal sendis al ni aron da nomoj de personoj, kiuj estis — laŭ la tiama bela esprimo — „en malamika eksterlando“. Jam funkciis pli-malpli cenzuro en la militantaj landoj, kaj ne estis prudente, sendi por la momento iun tekston aŭ korespondadon el la alia „malamika“ lando. Rezulto estis, ke ni starigis tekston plurlingvan taŭgan por tiaj demandoj. En Esperanto la teksto estis:

Ni havas la honoron, informi vin, ke — (nomo de l' petinto) — bone fartas kaj deziras de vi novaĵojn. Bonvolu skribi leteron en via nacia lingvo, informi viajn parencojn kaj sendi tiun ĉi komunikadon al ni, aldonante afrankon per internacia respondkupono, aĉetebla en la poŝto, aŭ poŝtmarko de 25 centimoj. Ni faros la neceson kaj havigos al vi tuj la respondon.

Universala Esperanto-Asocio
Servo de perado inter militantaj landoj

Neniam ni estus pensintaj, ke tiu ĉi simpla servo prenos tiom grandan amplekson. Sukcese ricevinte utilajn informojn, ni dissendis dum Septembro 1914 cirkuleron al la Delegitoj de UEA kun teksto por enpresii en tagaj gazetoj. Tiu ĉi informo tradukita en 30 da lingvoj de niaj Delegitoj, aperis en centoj da tagaj gazetoj. Ĝi tekstis:

Car la militagoj okazis preskaŭ subite, multaj personoj troviĝis surprizataj en la malamikaj landoj kaj ne plu havis la eblon, korespondi kun siaj parencoj kaj amikoj.

Por laŭeble helpi ilin, la Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, sidanta en Genevo, ĵus informis siajn Delegitojn en la militantaj landoj, ke ĝi volonte servos kiel perilo por la interŝanĝado de privataj korespondadoj inter la malamikaj landoj. La leteroj estas ricevataj ĉe la Geneva Oficejo, el kie ili estas transdonataj al la adresato, se bezone post traduko. Estas akceptataj nur la nefermitaj korespondadoj, havantaj absolute nenian politikan aŭ militistan karakteron. La personoj, kiuj deziras uzi tiun servon, nun en plena funkciado, estas petataj, sendi ĉiujn leterojn, kun du internaciaj respondkuponoj, al Universala Esperanto-Asocio, 10, rue de la Bourse, Genève, Svislando.

Ni ja neniel supozis, ke tiu ĉi simpla informo ŝanĝos la tutan oficejon. Dum Septembro ĝis Decembro 1914 la alveno de korespondadoj farigis timiga — pro la laboro, kiun postulis la plenumo. Por havi ordon en tio, sliparo devis esti starigita, tiel ke ni povu, se necese, interveni mem, per propra demando, ĉe personoj ne respondintaj. Sed la servo ne haltis ĉe tiu ĉi simpla ricevo kaj transsendo. Venis jam demandoj specialaj, serĉado de personoj, transsendo de mono, de pakadoj, helpo al civilkaptitoj kaj ankaŭ informpetoj pri soldatoj. Pri la amplekso de la plenumita laboro sufiĉas diri, ke dum Decembro 1914 la taga eniro de korespondadoj estis inter 250 ĝis 300.

La procedo estis tiel: Dispartigo laŭ fakoj: 1. simpla transsendo; 2. specialaj servoj; 3. monsendo; 4. militistoj; 5. civilkaptitoj; 6. rehejmigado de civiluloj en militregionoj; 7. militkaptitoj kaj rilatoj kun la respektivaj aŭtoritatoj; 8. rilatoj kun ruĝkrucaj organizaĵoj; 9. Ruĝa Kruco, Genevo; 10. variaĵoj. Cefe necesis rapideco, kaj por ĉion plenumi taŭge, la du personoj en la Centra Oficejo neniel sufiĉis. Ni alvokis helpon de bonvoluloj, inter ili Esperantistoj en Genevo, kaj libervola stabo de dek personoj plenigis la Oficejon. Plano de laboro kreskis el kelksemajna sperto, kaj la maŝino funkciis. Inter la bonvolaj helpantoj ni danke memoru la tiaman Delegiton de UEA en Genevo, Dron Mallet, universitatan profesoron, kaj lian fratinon, F-inon Eudoxia Mallet, kiuj kun malofta abnegacio dediĉis sian tempon al oficeja laborado regula kaj senhalta.

Specialaj servoj — vizito de personoj laŭ peto de interesitoj, esploro en militregionoj — postulis rapidan adapton de la oficejo kaj personaro. Kiu mem spertis la timon pri amata persono en danĝera regiono — sen informo, sen sciigo, sub impresado de la kranio-ŝtopa sensacia raportado de gazetoj pri barbarajoj —, tiu komprenas, kiom valora estis la helpo diskreta kaj rapida, kiun starigis UEA.

Dum la premigaj tagoj de Septembro 1914 venis tia petego por rapida informo:

Franca oficiro ŝtaba S-ro de H... ville, pri edzino restinta en Longwy-Haut, la fama karboregiono, ĵus okupita de la germana armeo. Kion fari? Teksto de germanlingva letero, plurfoje reskribita, kiun ni sendis je bona ŝanco al diversaj militinstancoj germanaj. Inter ili unu, kiun ni sendigis per germana Delegho al la *Kommandantur en Longwy*. Je nia surprizo venis letero germanlingva el Longwy, ĝentila, kun aldonita franclingva letero de la koncerna sinjorino. La oficiala germana letero de etapa instanco portis en la angulo kraĵonan frazeton „samideanan saluton!“. Pli nomon, kiun ni ne povis deĉiferi, ĉar intence nelegeble skribita. La petinton ni informis pri la novaĵoj telegrafe kaj sendis la leteron. Post iom da tempo venis donaco de — 500 Frankoj kun dankesprimio, kian nur kapablas juna edzo, timanta pri edzino.

Neniam ni sukcesis ekscii la nomon de la germana samideano, kiu tre verŝajne serĉis en la parte detruita urbo por trovi la personon kaj elpeti leteron. Pli poste la sinjorino trapasis Svislandon kaj vizitis nian Oficejon.

Per tiu ĉi servo ni konatiĝis nevole kun sortoj strangaj kaj pripensigaj. Jen francino, fianĉino de germano, jen germanino lasinta francan amikon por aŭ sekvi la ordonon de la devo aŭ forkuri hejmlanden. Kelkfoje ni petis al Delegho interveni, kaj neforgesinde estas la servoj, kiujn plenumis la Deleghitoj tiamaj en Aachen (Aix-la-Chapelle), Breslau, Düsseldorf, Bordeaux, London, Königsberg, Paris, Stuttgart; nome samideanoj Pinagel, Alfred Mahn, Bernhard Luis, Charles Brunet, Schwaiger, F-ino Gérard, profesoro Christaller, St. Rudnicki, Szabuniewicz kaj aro da aliaj.

Pli konstato, kaj tio estas la morala aktivajo, kiun UEA akiris, ke — escepte tri aŭ kvar Deleghitoj en Francujo kaj Germanujo — la *supernacia* ideo ne fiaskis. Belajn ekzemplojn ni ricevis pri tio, kaj ne forgesleble estis por ni, kiam iun tagon venis S-ro Hodler, en mano dankleteron, dirante kun radiantaj okuloj: „Neniam ni tiom utilis!“.

Gravaj estis la servoj pri montransendo. Ni ne forgesu, ke la militeksplozo ĉesigis ĉiun rektan interrilaton, kaj miloj estis la personoj, kiuj restis sen mono en fremda lando. Por ne suspektigi personojn, ni prizorgis tiajn servojn ofte per interveno de membroj de UEA, kiuj pro pozicio kaj socia rango ne bezonis timi ĝenon de fervora patrioto, supozante pri „perfido de patrolando“. Tiaj aferoj ja okazis, kaj aro de bonvolaj samideanoj devis suferi malagrablaĵojn kaj eĉ enkarcerigon.

Menciinde tie estas ankaŭ la interveno de UEA por rapide sciigi pri soldatj malaperintaj. Sub registara aŭspicio la societoj ruĝkrucaj starigis specialan servon pri tio. Internacie tiu ĉi servo estis centrigita en Genevo, kie la registaro disponigis la muzeon Rath por la oficejo de la Ruĝa Kruco Internacia, la fama *Agence des Prisonniers de Guerre*. 400 personoj laboris libervole, kaj el kelkcento da skribaĵoj sonoris muziko de helpo al familianoj aŭvide atentantaj sciigojn pri batalinto malaperinta. Kun tiuj oficejoj ni havis regulajn rilatojn por pli persona kaj speciala serĉado. Sed dank' al alia arango ni povis informi pli rapide, per jena maniero: La Germana Esperanto-Asocio siatepe en Dresden kaj sub gvido de S-ro von Frenckell organizis rapidan informigadon, kiun UEA peris. La Deleghito en Bordeaux havis rilatojn kun la respektiva oficejo de militkaptitoj, kaj li ricevis la listojn, kiujn oni sendeprime de ĉio alia prilaboris, ofte semajnojn pli frue. La re-

spondojn ni peris denove al la Germana Asocio, kiu sur formuloj informis la petintojn. Inter tiuj specialaj deziroj, kiujn sendis al ni la oficejo de Germana Esperanto-Asocio, unu meritis esti konigata pro la servemo kaj kompreno de la Delegito, kiu plenumis ĝin. Familio en saksa urbeto deziris ricevi informon pri tombo de filo, kiu laŭdire troviĝas en franca urbo Rennes; se eble, eĉ fotografajon. Ni skribis al la Delegito, kaj post du semajnoj venis dokumentita informo kun kelkaj fotografajoj de la tombo trovita. La Delegito havis poste malagrablaĵojn, ĉar la suspektemo ja estis granda. Sed montro de samaj servoj fariĝis al francoj pere de UEA nuligis la suspekton. La nomo de tiu ĉi Delegito estis Victor Chauvin, farmaciisto.

Jam frue ni ricevis sciigojn pri militkaptitoj Esperantistaj, kies sinsekvajn listojn ni publikigis en „Esperanto“. Estis kelkaj centoj da ili. Siatempe UEA posedis ankoraŭ provizon da gramatikoj, vortaroj, literaturo en Esperanto, res'oj el la esinta Universala Esperantia Librejo, kiun ni likvidis komence de la milito. Ja ne estis plu eble vendi librojn en Esperanto, ĉar la sendo de libroj de unu lando al alia estis malpermesita. La Esperantistaj militkaptitoj starigis kursojn de Esperanto, kaj UEA, subtenita de la Brita kaj Germana Asocioj, plie de Generalo Sébert en Paris, donacis gramatikojn al militkaptitejoj. Centoj kaj centoj foriris, kaj estas aro da Esperantistoj nuntempe, kiuj varbiĝis al Esperanto dum tiuj tagoj de izoleco kaj malguleco.

Fariĝis bela kutimo dum 1916—1918 en Svislando inter familioj, adopti militkaptiton kaj sendi al li kiel al propra filo pakajojn de nutraĵoj, libroj, tabako. Societoj bonfaraj starigis tian servon *La pano de l' militkaptito*, kaj koncerna interkonsento kun la „Entente“-potencoj rajtigis Svislandon je pli granda enportado de necesaj kvantoj da nutraĵoj.

Ankaŭ UEA pensis je siaj „filoj“ — niaj samideanoj militkaptitaj —, kaj per belaj donacoj ni starigis fundon. Dum Decembro 1916 la Centra Oficejo de UEA similis vendejon de nutraĵoj. 600 kilogramoj da biskvita pano, 200 kilogramoj da ĉokolado, 200 skatoloj da konservajoj, 50 kilogramoj da tabako, 1000 cigaredoj, sukero, kondensitaĵ fruktoj, legajoj kaj aro da utilaj objektoj, ĉio en nur plej bona kvalito, troviĝis en la granda salono de l' Centra Oficejo, kaj vizitintoj tiutempe faris strangajn vizitaĵojn, vidinte tiun ĉi instalon. En zorge aranĝitaj skatoloj foriris al preskaŭ 200 adresoj fidindaj tia pakajo. Nur malnultaj

sendaĵoj perdiĝis, kaj granda estis la ĝojo de la samideanoj militkaptitaj. La akriĝinta milito kaj la pli severa limigo de Svislando rilate nutraĵoj (tri kvaronoj de ĉiuj bezonaĵoj en Svislando venas el eksterlando) malebligis ripeton de tiu ĉi sendo en 1917, kiam la kondiĉoj en la kaptitejoj estis ekstreme malbonaj.

Menciinda detalo en la paĝo historia *UEA dum la milito* estas la ĉikanoj, kiujn renkontis nia propra agado. De post 1916 la gazeto „Esperanto“ estis malpermesita en Francujo, kaj malgraŭ interveno de Generalo Sébert ĉe tiama ministro Painlevé tiu ĉi malpermeso ne estis forigita. La milita aŭtoritato, kiu decidis pri tio, bazis sin sur prijuĝo de oficiro de cenzuro, fama Esperantisto, fariĝinta Idisto. La nomon ni ne volas malkovri tie ĉi, ĉar la argumento por tiu ĉi malpermeso estis, „ke tiu ĉi revuo povus havi malfavoran influon sur la batalantoj ĉe la fronto“.

„Esperanto“ havis tiutempe ĉirkaŭ 300 (tricent, ni diru) abonantojn en Francujo, el kiuj duono ne estis frontsoldatoj. Ĉefe kritikitaj estis la artikoloj de Hector Hodler pri la organizo de la postmilita mondo, la Ligo de Nacioj kaj problemoj kun pli-malpli akademia karaktero. Por ni estis klara, ke temis pri nura ĉikano, kaj pli malfrue nia opinio estis pravigita de oficiro laborinta en la cenzura oficejo, vizitinta nin pro ne-Esperantista afero en la jaro 1923.

Pli malagrabla tio fariĝis pro tio, ke la poŝto por transmaraj landoj pasis Francujon. Laŭ la tiama kutimo la poŝto de neŭtralaj landoj, inter si, suferis la kontrolon de militinta lando, kiun la poŝto devis transpasi. Ni memoru tie ĉi, ke la poŝto, kiu devis pasi tra Britujo, havis malpli grandan riskon. La brita cenzuro tiurilate kondukis pli saĝe kaj larĝanime. Dum monatoj malaperis tiel niaj sendaĵoj. Nenion oni resendis, kaj ni miris pri plendoj ricevitaj el Ameriko. Iun tagon ni vidis folieton gluiĝinta sur hazarde reveninta numero de „Esperanto“ kun la jena teksto kraĵona: *Esperanto Journal interdit. Controle Postal Militaire Bureau de Lyon*. Tio sufiĉis. Ni serĉis alian vojon kaj ni sukcesis ekspedi trans Germanujo kaj Nederlando (aŭ skandinavaĵoj) almenaŭ la ekzemplerojn por Ameriko. La germana cenzuro ne ekzamenis periodaĵojn, traŭritintaj Germanujon, sed nur korespondajojn.

Fine kelkaj ciferoj pri la movado de korespondajoj ĉe la Centra Oficejo dum la unuaj militmonatoj, kiuj montras la amplekson de la plenumita laboro:

Monato:	Hlvenis:	Forsendis:	Postmandatoj:	Sumo:
Aŭgusto 1914:	181	54	9	269
Septembro 1914:	254	1053	10	1317
Oktobero 1914:	1532	1562	20	3114
Novembro 1914:	3735	3929	45	7664
Decembro 1914:	7181	7213	122	14516

La statistiko de 1915 montris 97 415 ricevitajn kaj senditajn poŝtaĵojn; en la posta jaro (1916) estis ankoraŭ 31 199 kaj en 1917: 18 972.

La rehejmigo de multaj civilkaptitoj vidiĝas el la iom post iom malkresko de la ciferoj.

La propra agado de la Asocio nature haltis, sed la sukceso de la servo rekreskis la intereson. La reapero de „Esperanto“ en Januaro 1915 plifortigis la konscion pri la neceso daŭrigi la laboron de UEA, kaj iom post iom restarigis la Esperantista agado.

La Komitato de UEA konfirmis la politikan neŭtralecon de UEA, konforme al Artikolo 2 de la Statuto. La gazeto „Esperanto“ siavice ne akceptis reklamojn el militintaj landoj, por ne riski konflikton pri „komerco malpermesita kaj ties perado“.

Krucele batis la sorto nian Asocion. Centoj da fidelaj membroj, plenumintaj la devon al la patrolando, falis sur batalkampo. Mortis en Francujo pro akcidento la Prezidanto de UEA, Harold Bolingbroke Mudie (Prezidinto de la Brita Asocio); dum la gigantaj bataloj ĉirkaŭ Verdun (1916) falis nia tiama Vicprezidanto kaj kunfondinto de UEA, profesoro Rousseau. Unu jaron poste forpasis ankaŭ Dro Zamenhof, kies frua morto estis sekvo de la teruraj okazintaĵoj, kio influis animstaton kaj sanon (1917).

La agado de UEA sur Esperantista kampo ja estis tiu de ligilo inter la ankoraŭ funkciantaj organizaĵoj en kelkaj neŭtralaj landoj kaj la aktivaj Esperantistoj. Aperis regule „Esperanto“ ĉiumonate kun interesaj artikoloj pro la tutmondaj problemoj el la plumo de ĝia kompetenta redaktoro Hodler. En la jaro 1916 aperis Jarlibro, kiu enhavis ĉefajn informojn kaj la adresaron de Delegitoj. Plie aperis dufoje libreto: *Esperanto dum la milito*, kiu enhavis resumon de la stato de nia movado.

Sed elokvente parolis pri la sekvoj de la milito la ciferoj. En jaro 1914 la nombro de pagintaj anoj estis 7233, en 1915 estis 2699, por malsupreniri ĝis 1958 en 1918, kiam finis la milito. Kun iom pli ol unu kvarono de la estinta stato UEA eniris la novan epokon.

La reconstruo de UEA

Je la 11a de Novembro 1918 silentis la kanonoj. Libera spiro malpezigis la bruston de ĉiu, kaj espero je pli bona tempo* streĉis la forton. Tion ni konstatis tiutempe en la Centra Oficejo, kiam alvenis la unuaj korespondantoj de revenintaj soldatoj. Kortuŝe estis legi tiujn leterojn, plenaj je firma kredo kaj bonvolo. Ni staris antaŭ la tasko, kunigi denove la internaciemajn Esperantistojn por rekonstrui la tuton. Kaj ne malgranda estis tiu ĉi laboro. Antaŭ ni trovigis mondo kun plene ŝanĝitaj kondiĉoj, la formo de novaj ŝtatoj ankoraŭ ne fiksiĝis, ĉio estas ŝvebanta, malcerta, neklara.

Per *Alvoko al la Esperantistaro*, kiu aperis en la numero 221 (Januaro 1919) en „Esperanto“, subskribita de S-roj Hodler kaj Stettler, UEA anoncis la reprenon de la laboroj kaj insistis je energia klopodado kaj helpo al ĉiuj organizaĵoj. La Centra Oficejo dissendis dum Februaro 1919 al ĉiuj adresoj, kiujn ĝi posedis, presajon, kaj al la Delegitoj regulan Demandaron por sciigi pri ilia preteco reakcepti tiun taskon. Fruko de tiuj ĉi preparoj estis la Adresaro de UEA, fundamento por la unua postmilita Jarlibro, kiu aperis en 1920. Dum Marto 1919 la Centra Oficejo translokiĝis al Bern por faciligi pli rician laboron inter la oficistoj kaj tiama Direktoro, S-ro Ed. Stettler. Gravaj laboroj atendis plenumon: Nova statuto, elekto de komitato, repreno de rilatoj kun la propagandaj organizaĵoj Esperantistaj, kaj krome la kutima taga laborado. La malsano de S-ro Hodler devigis ŝanĝon en la administra gvidado, kiun akceptis S-ro Stettler, la ĝisnuna Vicdirektoro, ĝis esprimo de la Delegitoj per voĉdono reguligis la juran situation.

La jaro 1919 estis do plene dediĉita rekonstrui la Asocion. Ke ĝi ne plenumiĝas en unu jaro, pri tio ni konsciiĝis, sed la fundamentoj estis metitaj. Sinsekve revenis fideluloj, kaj la entuziasmo, ke epoko de justeco kaj rajto ekkomenciĝas, plenis la korojn: Ni laboru kaj ni esperu!

Je la fino de la administra jaro 1919 UEA kalkulis 3114 anojn. La sumo de poŝtaĵoj ricevitaj kaj senditaj atingis denove 20 000 kontraŭ 8 300 en la jaro 1918.

De Hago al Helsinki

1920 — 1922

Du tre gravaj okazintaĵoj distingas la jaron 1920: La morto de Hector Hodler kaj la okazigo de l' unua postmilita kongreso en Hago. Ambaŭ faktoj, malsamaj laŭ efiko, donis novan direkton al UEA kaj al la movado. Jam en 1919 kunvenis en Parizo kelkaj gvidantaj personoj de la movado por diskuti la reprenon de la antaŭaj laboroj kaj ĉefe la reokazigon de la jara kongreso. UEA ne partoprenis tiun kunvenon, preziditan de meritplena samideano franca, S-ro Rollet de l'Isle, pli poste ano de la Internacia Centra Komitato. S-ro Hodler, kiu pro pulmomalsano loĝis en la montaro, sentis sin pli bona, multe korespondis kun samideanoj, kiuj sin turnis al li, redaktis la gazeton kaj kompilis la Jarlibron 1920 kaj eĉ intencis denove ekloĝi en la valo, pli proksime de la Oficejo. Subite morto venis, neatendite por la edzino, neatendite por ni, kiuj regule rilatis kun li skribe. La 31a de Marto 1920 signis finon de tro mallonga vivo de viro, kiu en alia medio estus atinginta gloron kaj famon. Por UEA kaj la movado lia malapero estis bato, kiun nur scias taksi la Esperantistoj el tiu ĉi tempo. Novaj cirkonstancoj kreas novajn metodojn, la vivo daŭrigas sian iron.

Ne estas nia intenco, skizi la vivon de la „animo de UEA“, kio estis Hodler. Plenumis tion pli kompetente lia amiko Edmond Privat en artikoloj aperintaj en „Esperanto“. Biografion verkis Eduard Stettler, kunlaborinto en Genevo dum multaj jaroj. Monumenton Hodler ne bezonas. Tion li kreis en UEA, en kio li metis sian tutan koron, amon kaj inteligenton. Absolute fremda al persona gloro, Hodler profunde malsatis honorigojn kaj evitis solenaĵojn, kie li povis. Memorinda estas jena okazintaĵo:

En 1913, post la libertempo, Hodler anoncis sian revenon al la laboro. La oficistoj volis plezurigi lin, ornamis la skribotablon per floroj kaj fiksis al la pordo desegnitajn afiŝeton kun teksto „Koran bonvenon“. Reveninte kaj eklaborinte Hodler poste simplanime demandis al oficisto: „Diru, ĉu venas vizito?“ Li ne povis kompreni, ke floroj kaj ĉensaluto estis por li.

En li Esperanto perdis sian unuan veran apostolon. Ĉiuj eminentaj Esperantistoj, kiom ajn grava estis ilia merito, plenumis la laboron honorofice, krom profesia laboro. Hodler dediĉis sian vivon al nia afero en plena senco de l'

vorto, laboregis kvazaŭ salajrita oficisto de mateno ĝis vespero. Ne mankis voĉoj, kiuj disdiris, ke li profitas en Esperanto. Rilate je tiaj diroj, Hodler posedis eksterordinaran anim-ekvilibron, neniel koleris, sed nur ridetis. Lin ne povis eksciti malspriteco, dume sprita kritiko lin altiris.

Modeste li vivis, kaj el la rento, kiun la patro pagis al li, li uzis parton de la mono por kovri la deficiton de la gazeto „Esperanto“. Sed la plej belan memorajon, kiun li lasis, estis la donacego de kapitalo, kiu devis certigi la ekziston de UEA por ĉiam kaj samtempe instigi aliajn bonvolulojn agi simile.

*

La jara kongreso de Esperanto estas kvazaŭ plej alta punkto de nia agado. Komence niaj kongresoj estis konsideritaj kiel speco de Esperantista Parlamento. La kreskanta movado, la neebleco de multaj — kaj ne de la plej senvaloraj — Esperantistoj, partopreni la kongreson, igis tiun deziron de decidpova instanco per la kongreso veran iluziaĵon. Efektive al la kongreso venas krom la novuloj, sciivolemuloj kaj kelkaj konstantaj kongresanoj *eta* malplimulto de aktivaj samideanoj. La konsekvenco do estas, ke la kongreso fariĝas prave: Manifestacio propaganda. Pri efektiva laboro dum kongreso ni ja ne parolu, sufiĉas nur rigardi kongres-programon por konstati, ke la plimulton de la tempo formangas la ordinaraĵoj kun informa kaj debata karaktero, plie la plezurarangoj ktp. Sed restas la kongreso kiel tia, kiel impona manifestacio kaj kiel pruvo, ke ni ekzistas.

La nederlandaj samideanoj prenis sur sin organizi la unuan postmilitan kongreson. Tute ne facila estis la tasko. Hezito, malcerteco, timo je unu flanko, pasporto, vizo, valuto aliflanke estis baroj, kiuj malfaciligis al multaj la partoprenon. Tamen la kongreso okazis. Familia festo kun 400 ĝis 500 partoprenintoj el 27 landoj. Prezidis S-ro Isrucker. Agrable impresis la samideana atmosfero post la jaroj de izoleco. La taktoplena gvidado de la aferoj, la modesta simplanima sinteno de la nederlandaj Esperantistoj, organizintaj la kongreson, multe helpis al la transiro en la novan serion de kongresoj.

La ĉefaj traktotaĵoj estis la problemo de organizo internacia Esperantista, la reorganizado de la Lingva Komitato kaj la teknikaj vortaroj, afero ligita al la laboroj de la L. K. La organizan problemon tie sublevis per energiaĵ vortoj

S-ro Komandanto Alessio, postulante, ke pli racia ordigo de la fortoj kaj rimedoj necesas, sed nur sur la bazo de UEA. Komisiono estis elektita por prepari proponon kaj statuton, submetotan al la 13a kongreso en Praha.

UEA havis siajn proprajn kunvenojn por la sesa kongreso. Ĉiu kongresano ricevis centpaĝan dokumentaron de UEA, kiu enhavis biografion de Hector Hodler, raporton pri la agado dum 1914 ĝis 1919, fine la proponon pri la nova statuto. La ĉefa laboro estis la diskuto pri la statuto, kiu fine estis akceptita kun iuj ŝanĝoj kaj kompletigoj. Tiu ĉi nova statuto, kiu bazas sur la akiritaj spertoj de 1908 ĝis 1918, estis verkita de Eduard Stettler. En klaraj ĉapitroj metode grupigitaj ĝi entenas ĉion, kio ĝis 1918 formis la juran bazon de UEA. La antaŭa statuto kun malpli da ĉapitroj necesigis aron da regularoj, kiuj simile je hedero ĉirkaŭkreskis la trunkon. La nova statuto forigis kaj kompletigis, sed ĉefe sistemigis la teorion kaj praktikan gvidadon de la Asocio. Prave la kongreso de UEA, ĉe kiu partoprenis la du-triono de la kongresanaro, forte dankis kaj aplaudis la verkinton.

La trajto de la du kongresoj en Hago do estis: Firmigo de UEA sur nova konstitucio kaj rekomendo de la diskutoj pri la organiza problemoj.

*

En Praha 1921 brila kongreso. 2500 kongresanoj el 35 landoj kaj 30 registaroj reprezentitaj. Prezidis Dro Kamaryt. La kongreso staris sub la signo de la Ligo de Nacioj respektive de la klopodoj, kiujn entreprenis Dro Privat por altiri la atenton je nia celado. Ĉeestis alta funkciulo de la Ligo de Nacioj: Vicsekretario Generala Dro Nitobé, japano, sincera amiko de Esperanto.

Plie ĉeestis la Komisiono starigita dum la Haga kongreso, konsistanta el S-ro Dro Arnhold (Dresden), Page (Edinburgh), Poncet (Lyon); du reprezentantoj de la tiama Centra Oficejo Esperantista en Paris: S-roj Warden kaj Chavet; la Komisiono de UEA per du reprezentantoj: S-roj Stettler kaj Privat. Prezidis la Komisionon S-ro Page.

Al la diskuto de la kongreso venis propono de *Universala Ligo Esperantista*, plano verkita de S-ro Page. Li klopodis kunigi la plej malsamajn elementojn en unu faskon, genie surkonstruis ponton inter malsamaj principoj, ĉerpante el la aro da ekzistantaj regularoj kaj statutoj, aldonante,

plibonigante kaj tranĉante. Lia plano verdire *antaŭiris* la tempon — aŭ venis tro *malfrue*. La kongreso tre respektive aŭskultis kaj fine akceptis rezolucion, kiu esprimas peton, ke la Komisiono ellaboru statuton, submetotan al la ĝenerala kritiko de la Esperantista publiko.

La sepa kongreso de UEA en sia tria kunveno ankaŭ traktis la planon de S-ro Page. Rezolucio estis akceptita, kiu petas la Komitaton de UEA, atente esplori la demandon submeti pretan statuton al la voĉdono de la Delegitoj. Energie oni pledis, ke UEA nepre konservu sian nomon kaj formon.

Kiel kutime UEA presigis Dokumentaron 34-paĝan, kun jara raporto pri 1920 kaj mallonga artikolo de S-ro Stettler pri Internacia Organizo Esperantista.

La finan decidon pri la organiza problemoj devis preni la kongreso en Helsinko. Inter Praha kaj Helsinko la tempo uzigis por skribaj traktadoj. Kio teorie ŝajnis tiom simpla, montriĝis en la praktiko kiel Herkulesa laboro. Al unueca organizo kontraŭstaris la malsamaj intereso kaj celoj, la malsama strukturo de la naciaj societoj kaj ĉefe la tradicia monmanko. Kiu iom atentas la budĝetojn de la Esperantistaj organizaĵoj, vidas la pravignon de tiu ĉi tezo.

La klara kaj jure plej logika projekto de S-ro Page do ne akceptiĝis. Dum la vojaĝo al Helsinko la du reprezentantoj, S-ro Chavet por la Esperantista Centra Oficejo en Parizo kaj Dro Edmond Privat de la Komisiono de UEA, traktis, por trovi ian solvon de kuna agado. Frukto de tio estis libera interkonsento, formulita en la Kontrakto de Helsinko. Oni konsciis, ke tiu ĉi Kontrakto ja nur povas esti la ŝtupo al plua evoluo iom post ioma. La ĉefa detalo rilatas al la internacia reprezento de la movado al komuna organizo de certaj internaciaj laboroj (Kongreso, Internacia propagando, Ligo de Nacioj). La Kontrakto estis farita inter la Naciaj Societoj, kiuj kune formis reprezentantaron, la Konstanta Reprezentantaro (mallonge Ko-Ro) kaj la Komitato de UEA. Fiksita estis, ke ĉiu nacia societo pagos dekonon de la sumo de simpla kotizo de Membro de UEA (sekve 0,50 Fr. sv. aŭ la ekvivalento laŭ la tabelo de UEA), dume UEA promesis subvencion. La Komitato de UEA akceptis la interkonsenton per decido dum Marto 1923, aperinta en la Oficiala Informilo en „Esperanto“ 1923, paĝo 54.

Demandita per cirkulero, la Komitato de UEA pritraktis diversajn negociojn kaj inter aliaj faris jenajn decidojn:

La Komitato de Universala Esperanto-Asocio deklaras en ĝia nomo la aliĝon al la „Oficiala Esperantista Organizo“, akceptita de la XIVa Universala Kongreso en Helsinko.

Konsiderante, ke mankas en la organiza statuto artikolo pri ĝia ebla revizo, la Komitato limigas la aliĝon al periodo de tri jaroj ĝis 31a de Decembro 1925, post kiu ĝi denove decidus.

La Komitato petas sian Komisionon elekti la reprezentantojn kaj fiksi la subvencio de la Asocio, konforme al ĝia financa situacio, la pagoj de la aliaj kontraktintoj kaj la monbezonoj de la Centra Esperanto-Komitato; dankas al S-roj W. Page kaj Dro Edmond Privat por ilia laboro favore de la ĝenerala organizo.

Jen la nova bazo de kunlaboro inter-Esperantista. Dependas nature de la maniero, laŭ kiu oni efektigos tiun ĉi interkonsenton. Sed — laŭ la premisoj kaj eblecoj — libera interkonsento, formulita en Kontrakto, estis la solvo kaj samtempe la evoluo al plia ŝtupo de la organizo.

*

De Helsinko al Parizo

Se ni komparas jaron 1922 al 1932, tiam oni konstatas, ke en ĉio la mondo malprogresis. La jaroj 1922/23 estis precipe por Centra Eŭropo kaj speciale por Aŭstrio, Germanujo — pli-malpli la orientaj ŝtatoj kaj la Balkano — jaro de terura elproviĝo. La siatempa monkrizo, pri kies kaŭzoj kaj sekvoj oni hodiaŭ konsciigas, estas superombrita de la hodiaŭa stato de la tuta mondo. Senlabor-eco giganta en ĉiuj landoj, senvaloriganta mono, malfido ĝenerala. Dek jaroj de klopodoj, de espero kaj de suferoj — por reveni je sama punkto, ja eĉ fali en pli profundan abismon.

Se ni komparas la evoluon de la monda stato kun tiu de nia movado, ni povas trovi paralelon eĉ surprizigan. En 1922 oni trovis fine solvon de problemo, kiu por la unua tempo ŝajnis bona kaj taŭga kaj en multaj rilatoj ankaŭ estis tia. Dek jarojn poste ni staras antaŭ sama problemo, akriĝita nur per la sento, ke oni vane elspezis tempon, monon kaj entuziasmon por ideo, kies efektivego postulas tute aliajn rimedojn tiom moralajn kiom financajn, ol ni disponas nuntempe.

La tempo 1922 ĝis 1932 estas do la epoko sub la Kontrakto de Helsinko. Per ĝi UEA fordonis libervole certajn aferojn kaj laborojn, kiujn ĝi ĝis tiam plenumis. Tio okazis unuflanke pro la kelkfoje aŭdita riproĉo, ke UEA volas ĉion regi en Esperantujo, aliflanke certaj taskoj en si mem necesigas apartan organon por plenumi. Ni pensu nur pri la kongresoj, organizo de konferencoj kaj aliaj malpli gravaj klopodoj, sed kiuj kune prezentas sumon de laboro, neplenumeblan per samaj rimedoj financaj kaj aliaj.

La evoluo de UEA dum tiu ĉi epoko 1922 ĝis 1932 iris sian vojon, regule kaj decide. Ĝi ĉefe dediĉis sin al la firmigo de la propra organizaĵo, al la plibonigo de la servoj, al la plidensigo de la Delegita reto kaj al la pligrandigo de la membraro. Post la financa stabiliĝo de Centra Eŭropo, de kiu grandparte dependis sana evoluo de niaj aferoj, UEA speciale dediĉis sin al la kreo de novaj servoj. Ne ĉio realiĝis, kiel ni deziris, sed ni rajtas diri, ke la maksimumon oni provis. Restas la demando, ĉu pli multe estis farebla, ĉu oni efektive provis ĉion por sukcesigi la Asocion kaj ĝiajn celojn. Pri tio parolu la faktoj.

*

La laborado de UEA

UEA estas entrepreno esence fundita je reciproka kunlaboro. Aplikante komercajn metodojn en aro da fakoj, ĝi tamen ne estas komerca kaj tion akcente deklaras per la Statuto en Artikolo 4, dua frazo: *UEA deklaras sian Asocio kun celo ideala kaj je ne limigita daŭro, konforme al Artikolo 60 de la Svisa Civila Kodo.*

La laborado de UEA estas varia. Kunteni la internacieman Esperantistojn, servi ilin en konvena maniero kaj montri al la mondo, ke Esperanto ne estas lingvaĵo parolebla inter spertuloj, sed ke ĝi estas fakte lingvo popola.

Kiel UEA nun sukcesis en tiuj taskoj? Tion montras la sekvantaj ĉapitroj, kiuj sisteme informas pri la ĉefaj laboraĵoj.

Membraro

La membreco al UEA estas individua. Tio signifas, ke en la Asocio ne ekzistas lokaj aŭ landaj grupigoj. Tiu ĉi regulo havas du kaŭzojn, nome, ne krei ion similan apud la propagandaj societoj, kaj due, ne forigi la supernacian

karakteron de la Asocio. La membreco mem. kiel ni ĝin konas nun en la kelkaj kategorioj, trairis evoluon, komence iom maltrankvilan, sed poste firman. La akcepto de la Statuto 1920 aprobis la kreon de la kategorioj de *Membro*, *Membro-Abonanto*, *Membro-Subtenanto*, *Dumviva Membro* kaj *Honora Membro*. Tio estas kvar kategorioj, kiuj pagas, kaj unu, kiu estas senpaga, la Honora. Tamen unu escepton ni faris kiel provon; tio estas la kategorio de *Helpmembro*, proponita siatempe de S-ro Balkányi (Budapest) por la malriĉaj landoj kaj etendita por la parencoj de regula ano. Tiu ĉi kategorio de Helpmembro estas provizora. La ekonomia stato de la Esperantistoj pravigas tiun eblecon de malkara aliĝo. Ni konstatu per la ciferoj, ke la emo aliĝi malkare, ne estas granda. Esperantisto, kiu jam deziras aliĝi internacie, volas ricevi ankaŭ la Jarlibron, kion Helpmembro ne rajtas.

Kiam fondiĝis UEA, la kotizo de membro estis — 75 centimoj, sen Jarlibro. Tiun ĉi oni povis aĉeti aparte, komence por 40 centimoj ĝis fine 75 centimoj en la jaro 1910. Tiam okazis la unua radikala ŝanĝo: Kotizo de 1,25 Fr., sed kun ricevo de la Jarlibro. Tiu ĉi tre malalta kotizo havigis al la Asocio 11 000 membrojn, sed financajn zorgojn kaj deficitajn. Plia paŝo estis tiam la akcepto de *Financa Reformo* laŭ la propono de S-ro Ed. Stettler. Tio okazis en la jaro 1912 en Krakovo dum la tria kongreso de UEA: Kotizo de 2,50 Fr. por simpla membro, 5,— Fr. por membro-subtenanto, 25,— Fr. por kompleta subtenanto (Jarlibro, gazeto, luksa eldono, membreco ĉe ĉiuj fakoj), kaj fine dumviva ano (garantiantoj de 125,— Fr.

La nova kotizo fundamenta de 2,50 Fr. kaŭzis malkreskon de la membraro en 1913, sed sendeficitan bilancon. Tiam simpla membro ricevis la membrkarton kun ĉiam sama numero kaj la Jarlibron. En 1913 ni enkondukis la konstantan membrkontrolo, la ĉefa instalaĵo de nia Oficejo. Ĉiu membro kun du slipoj (kartfolioj), unu la ĉefa kun lia membrnumero, la alia kun la nomo, alfabeto klasita. Ni komenciĝis en 1913 kun n-ro 1, kaj finis la tiaman jaron kun 7500 proksimume. Ĉiu nova ano ricevis ĉiam la sekvantan numeron. Malplenaj numeroj — de personoj eksigintaj, de mortintaj ktp. — restas neuzataj. Tiel ni atingis en 1932 la numeron 39 600, preskaŭ 40 000 personoj, kiuj aliĝis al UEA dum la daŭro de 20 jaroj. Tiu ĉi rigida, severa kaj precizege administrata membrkontrolo

estas unika en Esperantujo. Ĝi permesas, havi la maksimumon de ordo, ne atingebla per alia sistemo malpli laboriga.

Interesa konstato: Se ni prenas la sumon de 40 000 kiel finan ciferon de 1932 kaj deprenas de tio 8 600 (rondcifere), la staton de la anoj 1932, la nombro 31 400 formas la negativan statistikon de UEA. En tiu ĉi nombro de 31 400 troviĝas la nombro de la mortintaj anoj dum daŭro de 20 jaroj, kio laŭ niaj notoj kaj listoj estas inter 70 ĝis 80 personoj jare; ni diru kune 1400. Tiam la resto estus 30 000 personoj, kiuj aliĝis kaj eksigis, kio estus jare 1500 de tielnomitaj *gasto-membroj*.

Tiuj ciferoj aperas tinnigaj. Ni informiĝis ĉe similaj societoj kaj konstatis, ke la fluado ne estas speciala trajto de Esperantista membro. Proporcio jara de 15 ĝis 20% da ŝanĝoj estas ankoraŭ bonega rezultato. Komparu kun nacia societo Esperantista ne estas ebla, ĉar neniu ŝajne el la naciaj societoj posedas tian regulan kontrolon kiel UEA.

Ni parolis jam pri la *Dumvivaj anoj* de UEA. Estas nun 200 tiaj, kies nomojn vi trovas en la Jarlibro. La samideanoj, kiuj antaŭ la milito pagis 125,— Fr. por esti dumviva ano, ja efektive faris bonan negocon. Dum 20 jaroj UEA liveris la promesitajn objektojn, escepte dum tri jaroj (1915, 1917, 1918) la Jarlibron, kiu ne povis aperi pro la milito. De post 1925 la dumvivaj anoj ricevas aŭtomate, sen speciala peto de ilia flanko, premion de frupago.

La Honoraj Membroj de UEA sumas je fino de 1932 30 personoj, inter ili kelkaj, kiuj estas samtempe dumvivaj anoj, pagintaj por tio. La Honora Membreco estas esprimo de danko al meritplenaj samideanoj laborintaj multe por UEA kaj Esperanto. Krome per la Honora Membreco la Asocio deziras distingi personojn, kiuj — nur Esperantemaj — subtenis aŭ subtenas nian laboron, ekzemple anojn de registaroj. Tiel estis Honoraj Membroj de UEA jam pluraj ministroj, amikoj kaj defendintoj de Esperanto.

Delegitaro

La Delegito de UEA estas la angulŝtono de la konstruaĵo UEA. Neniu certe estus pensinta tiam en 1905 kaj 1906, kion oni povos atingi el efektiviĝo de propono, starigi en ĉiu loko, kie ekzistas Esperantistoj, konsulon. Juna UEA, kies fondintoj mem estis junuloj, ne esceptiĝis ilin kaj efektive troviĝis inter la tiamaj Delegitoj (1908 ĝis 1914): aro da junuloj, kiujn hodiaŭ la pli severa regulo ne akceptus. Longa sperto kondukis al pli zorga elekto de la

personoj, kiuj estu Delegitoj. La Statuto, Artikolo 18, fiksas la kvalitojn, kiujn havu Delegito:

La elekto de Delegito fariĝu laŭeble konforma al jenaj principoj: Li bone konu la Esperantan lingvon kaj movadon; li abonu kaj regule legu la gazeton de la Asocio; li estu plenaĝa enlandano daŭre loĝanta en sia loko, kaj, sub la kutima rezervo de gravaj malhelpoj, promesu plenumi sian oficon tri sinsekvajn jarojn.

La Jarlibro de 1909, eldonita dum Majo, do precize unu jaron post la fondo de UEA, indikas 585 lokojn kun Delegitoj de UEA. La Jarlibro 1933 montras ĉirkaŭ 2000. La nombro estus certe pli granda, se ne estus la severaj kondiĉoj de akcepto, kaj la foresto de Ruslando (Unio de Sovjetaj Respublikoj), kie UEA estas malpermesata „burĝa“ Asocio. En la teritorio de la nuna U. S. S. R. Esperanto ja havas multajn anojn, kaj se UEA iam estos allasata sub kia ajn formo, belega listo de lokoj kun Delegitoj ornamus denove la Jarlibron.

La tasko de Delegito de UEA estas formulata en la Statuto, Artikolo 20, kiu tekstas:

La Delegito:

Reprezentas en sia loko la Asocion kaj rilate al la estraro de UEA siajn membrojn;

Propagandas, varbas membrojn, enkasigas kotizon kaj prizorgas la administrajn aferojn;

Respondas la informetojn de la membroj kaj helpas ilin okaze de vojaĝo;

Klopodas starigi en sia loko la aliajn oficialajn servojn kaj kontrolas ilian funkciadon;

Konservas en bonordo ĉiujn leterojn kaj dokumentojn koncernantajn lian oficon.

Ampleksa tasko. Se ĉiuj Delegitoj varbus plenforte, UEA estus giganta Asocio. Ĉefe lia laboro estas la servoj, pri kiuj ni parolos aliloke. Plej „agrabla“ okupo estas la enkasigo de la kotizoj. Sed resumante ĉion, oni povas rajte diri, ke inter ĉiuj funkcioj, kiujn kreis la Esperantomovado kaj ĝia organizo, la Delegito de UEA estas la plej interesa, la plej alloga.

La plej fidela ano de la Asocio estas, kiel pruvas nia statistiko, la Delegito. Nome: la ĉiujara ŝanĝo de la membraro, kiu estas inter 20 ĝis 25%, estas nur 6 ĝis 7% de la Delegitoj. Tio signifas en konkretaj ciferoj, ke la

2500 Delegitoj proksimume estas forstrekataj pro nepago de la kotizo 150 ĝis 180. La konkludo estus tiam, ke ĉiuj anoj de UEA estu Delegitoj laŭ fideleco kaj kompreno.

Ĉu estas Delegitoj de UEA, kiuj partoprenas la Asocion de la komenco kaj estis Delegitoj seninterrompe de 1908 ĝis 1933? Tiun demandon ni respondas per jes, kaj ni citas la nomojn de tiuj fideluloj:

S-ro Antonio Carbonell y Bosque, Alcira (Hispanujo)

S-ro Charles Brunet, Bordeaux (Francujo)

S-ro Georges Baire, Boulogne-sur-Mer (Francujo)

S-ro Walter B. Currie, Burnley (Britujo)

S-ro J. Garzon Ruiz, San Fernando (Hispanujo)

S-ro Charles Cresp, Cannes (Francujo)

S-ro Albéric Humez, Douai (Francujo)

S-ro Armand Landenne, Huy (Belglando)

S-ro Fernand Jammes, Le Puy-en-Velay (Francujo)

S-ro Charles Jayet, Morges (Svislando)

S-ro Georges Stroele, Neuchâtel (Svislando)

S-ro Louis Bouvier, Poix (Francujo)

S-ro P. J. Vermaas, Rotterdam (Nederlando)

S-ro Eugène Gabert, Saint-Etienne (Francujo)

S-ro Ernest Deligny, Saint-Omer (Francujo)

S-ro Fr. Soubranne, Tulle (Francujo)

S-ro Ludwig Istel, Wiesbaden (Germanujo)

Estas 17 Delegitoj el 346, kies nomoj aperis en la unua Jarlibro 1908. Tio formas 5% de la tiama stato kaj estas bonega proporcio, se oni konsideras la rapidan malinteresiĝon de la homoj je societaj aferoj. Ne atentitaj estas en tiuj ciferoj la Delegitoj en Ruslando kaj la translokigoj. Aldonante tiujn ŝanĝojn, la procentaĵo de la fidela Delegito de UEA estus inter 10% kaj 12%.

Cefdelegitoj

La centrigo de agado estas grava problemo en socia vivo. Internacia organizo, ĉu tia per rekta membreco, ĉu alia laŭ sistemo korporacia, troviĝas antaŭ tiu ĉi demando: Ĉu malcentrigi certajn branĉojn de la agado, ĉu ĉion centrigi al unu punkto? Estas tre grava demando kaj la efektivego tre ofte sekvata de surprizoj.

UEA jam frue atentis ĝin. En frua tempo oni kreis distriktojn kun distriktaĵaj delegitoj, speco de kontrolorganoj. La arbitra arango de tiuj distriktoj ne kontentigis. La nova statuto de 1920 valorigis la spertojn akiritajn, kaj oni venis

al la pli simpla maniero, bazigi la administrajn provincojn de UEA je la ŝtata landdivido. La provinco de UEA nomigas do *teritorio*, ĝi respondas al ekzistantaj dividoj de la koncerna lando. Kiel novaĵo la statuto de 1920 enkondukis la tutlandan teritorion, do teritorio de UEA formata de tuta regno. Estras kaj gvidas tion la Ĉefdelegito, kun anstataŭanto, se necese.

La agadon de Ĉefdelegito kaj lian kompetentecon fiksas la Statuto, Artikoloj 25 ĝis 30. Pri lia tasko mem diras Artikolo 26:

Al Ĉefdelegitoj la Komisiono povas doni jenajn taskojn:

Reprezenti la Asocion en sia teritorio, konsili kaj gvidi la Delegitojn, koncentrigi la administradon kaj certajn servojn ĉe sekretario, de li kontrolata;

Propagandi por la Asocio, kie ĝi ne estas sufiĉe reprezentata, elektigi Delegitojn kaj funkcigi la servojn:

Peradi la rilatojn inter la Centra Oficejo kaj la Delegitojn en teritorioj tre malproksimaj aŭ kun speciale malfavoraj postaj kondiĉoj.

Kun la konsento de la Direktoro povos esti donataj al Ĉefdelegito kelkaj el la direktoraj kompetentecoj, speciale la elekto de Delegitoj ne havantaj dek membrojn. La Ĉefdelegito raportas ĉiujare ĝis fino de Novembro al la Direktoro pri sia agado, la sekretario kaj eblaj kasaferoj.

La evoluo de la teritoria organizo estas rezulto de pure praktikaj konsideroj. Por ke progresigu la Asocio, ke la membraro pligrandiĝu kaj ke tiu ĉi restu fidela, necesas rapide kaj bone servi, individue prilabori petojn, atenti je la deziroj de la kolizanto. Servo al la kliento nomas tion la moderna komerco.

Alia neceso estis, kiom eble plej multe malsarĝi la Centran Oficejon en Genevo je certaj laboroj, fareblaj en la koncerna lando pli malmultekoste kaj ĉiokaze pli rapide. Tiu ĉi malcentrigo do ankaŭ favore influis la rubrikon „Salajroj“ en niaj kalkuloj.

Hodiaŭ, 13 jarojn post la akcepto de la Statuto, nia ĉefdelegita kolegaro nombras 30 personojn, kiuj laboras por UEA en malsama maniero. Ekzistas do dek plene organizataj teritorioj, dek kvar ordinaraĵoj, du teritorioj kun peranto, tri pagocentroj.

Plej grava estas la plene organizita teritorio. La evoluo de tiu ĉi tipo de administra malcentrigo komencas per jena oficiala informo en „Esperanto“, Aprilo 1923, paĝo 78:

Nova teritorio. — Laŭ iniciato de S-ro Rud. Hromada, Komitatano de UEA, la Delegitoj en Ĉeĥoslovakujo voĉdonis pri la kreo de Teritorio Ĉeĥoslovaka laŭ la limoj de la 84 respubliko.

Respondis el 84 demanditaj Delegitoj 57; 55 kun „jes“ kaj 2 kun „ne“. Necesa duono: 42. Teritorio akceptita.

La kandidatoj por la ofico de Ĉefdelegito kaj anstataŭanto: S-ro O. Sklenĉka, Delegito en Hradec Králové, S-ro Johann Klinger, Delegito en Bodenbach-Podmokly, ricevis saman nombron de voĉoj kaj estas do elektitaj. La Centra Oficejo uzas la okazon afable danki S-ron Hromada por lia kunhelpo. Al la du novaj Ĉefdelegitoj, malnovaj amikoj de UEA, ni sincere gratulas, esperante de ilia laboro rapidan kreskon de nia Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko, kie ĝi kalkulas konsiderindan nombron de membroj.

La voĉdono pri Teritoria Kaso ne donis la necesan nombron da voĉoj, kiu laŭstatute devas esti tri kvaronoj de la nombro de Delegitoj (tri kvaronoj de 84 = 63, voĉdonis 57). Tiu ĉi demando estas pli poste reprenebla.

La protokolo pri la voĉdono estas datita: 20a de Februaro 1923, kaj subskribita de S-roj Hromada, Ginz kaj Brambora.

Dek jaroj jam pasis. Dek jaroj de malegoisma, sindona kaj persista laboro flanke de la Ĉefdelegito S-ro Sklenĉka. Ni konfesas, ke ni komence hezitis transdoni la tutan administradon de grava lando al unu persono. Ni konstata, ke nia komenca timo entute fariĝis la kontraŭo. La modela laboro de S-ro Sklenĉka, subtenita de aro da bonvolaj Delegitoj en la pli gravaj lokoj, kaŭzis, ke Ĉeĥoslovakujo staras unuavice laŭproporcie al la loĝantaro en UEA. La Teritoria Oficejo de UEA en Hradec Králové estas promesplena ido de la Centra Oficejo kaj en multaj rilatoj servas kiel ekzemplo al teritoriaj oficejoj en aliaj landoj.

Simila laŭ arango estas la *Nederlanda Teritorio*, kie oficas S-ro Jakob Telling kiel Ĉefdelegito kaj S-ro Boon kiel anstataŭanto. Post la ekziĝo de S-ro Onnen la Delegitaro nederlanda elektis en 1931 la nunan Ĉefdelegiton, kaj UEA spertis agrablan surprizon en lia persono aĝema, iniciatema kaj rapida.

Lando, kie la malcentrigo sin trudas de si mem, estas Usono. En tiu ĉi lando Esperanto ne havas adeptaron proporciajn laŭ nombro de loĝantoj al eŭropaj landoj pro la unulingveco, kio malfaciligas la propagandon por Esperanto. Aliflanke por Esperantista organizo la lando de la Dolaro estas de granda valoro. Antaŭ la milito UEA jam havis Amerikan Oficejon, sed la spertoj ne estis kontentigaj, ĝis en jaro 1913 S-ro D. E. Parrish akceptis esti peranto. Post la milito penplene ni povis regroupigi la anaron. Malfacile estis varbi. Tiam en jaro 1928 S-ro Parrish de propra iniciato reakceptis la oficon de peranto sub la titolo de Nacia Sekretario. La influo sentiĝis tuj. Grandstila reklamado en kontakto kun la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko por unu bato plibonigis la situacion.

Plej juna Cefdelegito estas S-ro Saldanha Carreira, la tre laborema UEA-defendanto en Portugala Lando. Elektita en 1932, li sisteme kaj metode klopodis, tiel ke tiu ĉi lando nun ankaŭ komencas brili en la vico de la teritorioj.

Metropolaj Cefdelegitoj nun ekzistas en *Berlin* (S-ro Adolf Münz), *Praha* (S-ro O. Ginz), *London* (nia ĉiam gaja S-ro Moy Thomas), *Paris* (S-ro Charles Marseille), *New York* (S-ro Berthold Schmidt). La laboro de metropola Cefdelegito estas sufiĉe ampleksa, tiom rilate je servoj kiom pri administrado.

Por interligi la Cefdelegitojn pli intime al la Centra Oficejo, aperis antaŭ jaroj — pli-malpli regule — Teritoria Informilo. Pro la tro granda varieco en la teritorioj la diskutoj pri negocoj plenumotaj fariĝas skribe kaj individue.

Menciinda detalo en la laboro de Cefdelegito estas la daŭra regula kaj unuforma interrilato de Teritoria Oficejo al la enlandaj Delegitoj. Cirkuleroj ne respondas al la bezono. Estas la ĉeĥoslovaka Cefdelegito, kiu kreis tiurilate ankaŭ modelan informilon: estas la Teritoria Tribuno, periodaĵo aperanta laŭbezone. Formato de la Jarlibro, malgrandaj artikoloj pri vivo kaj funkcio de UEA, konsilioj al la Delegitoj ktp.

Je la fino de 1932 la teritoria organizo de UEA enfermas kvar kvinonojn de la tuta membraro de UEA. Ni povas diri, ke sen la malcentrigo kaj la enlanda plenumo de multaj laboroj UEA ne starus tiel bone kiel nun. Ja venis aliaj malhelpoj kaj komplikaj, tamen restas la fakto supre montrita.

La Cefdelegitoj de UEA meritas la sinceran dankon por la laboro plenumita.

Cefdelegitoj, sekretarioj, perantoj:

Teritorio:	Nomo:	Oficas de post:
Aŭstria	Erwin Gerhard Bernfeld	1926
Belga	Frans Schoofs	1926
Berlina	Adolf Münz	1924
Brazila	Dro C. Dominguez	1928
Brita	Cefdelegito: H. Moy Thomas Vic-Cefdelegito: D. R. Tullo Sekretario: Fred E. Wadham	1924 1928 1932
Bulgara	Peranto: R. K. Tričkoff	1927
Ĉeĥoslovaka	O. Sklenčka — Joh. Klinger	1923
Estona	F-ino Helmi Dresen	1924
Finnlanda	Sekretario: Olli Laukkanen	1928
Germana	Peranto: Fritz Rockmann	1923
Hungara	Paŭlo Balkányi	1921
Japana	Yoshi Ishiguro	1924
Latva	Talivaldo Indra	1925
Nederlanda	Jakob Telling	1931
Norvega	A. Arnessen	1932
Novzelanda	L. E. Dust	1931
Pariza	Inĝ. Ch. Marseille	1928
Pola	J. Sapiro	1927
Portugala	J. de Saldanha Carreira	1932
Rumana	Sekretariino: F-ino E. Morariu	1923
Saar	E. A. Omlor	1921
Saksa	Cefdelegito: Joh. Karsch Vic-Cefdelegito: Bernh. Kötz	1924
Urugvajaj	Pedro Casas	1929
Usona	Nacia Sekretario: D. E. Parrish	1928

Eksterordinaraj cirkonstancoj devigas je eksterordinaraj aranĝoj. Kiam en Germanujo la inflacio malebligis preskaŭ, varbi anojn al nia Asocio, kaj la valoro de la mono degelis kiel butero sub la suno, ni starigis pagocentron en urbo Magdeburg, kie ni presigis la revuon „Esperanto“. Akceptis tiun ĉi laboron malnova amiko kaj Komitatano de UEA, S-ro Fritz Rockmann, Honora Membro de la Asocio. La ofico de Peranto (Artikolo 48 de la Statuto) pravigis pro tiuj specialaj kondiĉoj, kaj la efiko pravigas la daŭrigon. En Magdeburg UEA posedas malgrandan oficejon, kie centrigas ĉio rilata je administrado. La rezultato estas la sama

kiel ĉe teritoria organizo: rapida servo, ŝparo de afranko, plenumo de aro da laboroj en la lando mem.

Pasis ankaŭ dek jaroj, ke S-ro Rockmann akceptis tiun ĉi laboron, kiun li senlace kaj persiste plenumas.

Tiaj pagocentroj ekzistas nun kun Perantoj en Germanujo, Bulgarujo, Francujo kaj Italujo; la du lastaj estas starigitaj komence de 1933.

Estraro de UEA

La ĝenerala gvidado de la Asocio estas komisiata al *Komitato*. Ĝi konsistas el 15 ĝis 25 membroj diversnaciaj, elektitaj de la Delegitoj por tri jaroj.

Jen kion diras la Statuto, Artikolo 31, pri la Estraro de UEA kaj la laboroj de tiu ĉi Komitato, kiuj ne konsistas en simpla jesado, kiel montras la sekvanta artikolo:

La Komitato:

Elektas inter siaj membroj: la Prezidanton, la Vicprezidanton kaj la Komisionon de UEA. Plie ĝi elektas: la Direktoron kaj Vicdirektoron, la Redaktoron kaj la Honorajn Membrojn. Ĝi rajtas elekti Honoran Prezidanton.

Fiksas la ĝeneralan agadon de UEA laŭ la voĉdonoj de la Delegitoj kaj la deziresprimoj de la Kongreso;

Privoĉdonas la jaran raporton kaj kontrolas la administradon de la asocia kapitalo;

Decidas pri apelacioj kaj pri la aliaj aferoj al ĝi rezervataj.

Ni sekvu rapide la evoluon de la Komitato de UEA. Antaŭ 1920 ĝi konsistis el 10 anoj, kaj post la ekvalidigo de la nova Statuto en 1920 inter 21 ĝis 27 anoj. La unua postmilita Komitato kalkulis 21 anojn. La elekto okazis dum Novembro-Decembero 1920, kaj la rezulto aperis en la Oficiala Informilo, Januaro 1921, paĝo 13, de la gazeto „Esperanto“. Interesa estas la nombro de partoprenintoj en la elekto. Rajtas kaj devas partopreni ĉiu Delegito kaj Vicdelegito, Cefdelegito kaj anstataŭintoj. Se iu okupas du oficojn, li rajtas voĉdoni nur por unu. Tiutempe do decidis la sorton de UEA 630 personoj. En 1931 okazis la kvara elekto de la Komitato; tiam la nombro de voĉrajtigitoj atingis 2484.

La elekto de la Komitato estas la plej grava volesprimo de la Delegitaro. Pro ĝia graveco ni donas al ĝi ankaŭ la plej grandan atenton. La elekto kaŭzas al ni ĉiam ampleksan laboron kaj koston. Pro tio ni ankaŭ klopodis ĉiam, ke

kun la dokumentoj por elekto povu esti sendataj aliaj paperoj por almenaŭ profiti je la afranko. Grava malhelpo en tiu ĉi elekto estas la distancoj kaj la inerteco de la homoj. Tio rezultigas, ke daŭras sufiĉe longe, ĝis la rezultato estas fiksita.

La plej malnovaj Komitatoj estas: *Paul Blaise* (de 1908), *Fritz Rockmann* kaj *Dro Privat* (de 1909).

Komisiono

Komitato internacia kun 21 ĝis 25 anoj ne povas facile okupiĝi pri urĝaj aferoj. Pro tio la Statuto kreis Komisionon (Artikolo 34), konsistantan el Prezidanto kaj kvar ĝis ses Komitatoj. La tasko de la Komisiono estas:

La Komisiono konsistas el la Prezidanto aŭ Vicprezidanto de UEA, kaj, laŭ decido de la Komitato, el kvar aŭ el ses pliaj Komitatoj, loĝantaj en landoj ne tro malproksimaj de la oficiala sidejo.

La Komisiono:

Decidas konforme al la instrukcioj de la Komitato pri ĉiuj aferoj superantaj la kompetentecojn de la Direktoro, Redaktoro kaj Cefdelegitoj;

Starigas novajn servojn aŭ aranĝojn, fiksante la ĝeneralajn regularojn pri ili; voĉdonas pri la fakoj;

Kontrolas la Centran Oficejon kaj la Redakcion;

Adminstras la kapitalon de la Asocio;

Prizorgas la aliajn aferojn al ĝi komisiitaj de la Komitato aŭ per tiu Statuto.

Al la Komisiono de UEA apartenas je fino 1932 S-roj Stettler, Karsch, Blaise, Rockmann, Hromada kaj Dro Poncet. Ĉiujare la Komisiono kunvenas en Genevo dum Pasko por okupiĝi pri la aferoj de la Asocio, superantaj la kompetentecon de la Direktoro, kaj por kontroli la agadon kaj la staton de la Centra Oficejo. La amplekso de la tuta Asocia laboro ja necesigas tiun kunvenon. Labori dum kongreso meze de festoj kaj aranĝoj estas — milde dirite — iluzio.

Pri la kunveno de la Komisiono detala protokolo estas sendata al la Komitato, kiu povas sin esprimi pri la negocoj. Tiuj kunvenoj dum Pasko, kiuj kutime daŭras tri tagojn (vendredo, sabato, dimanĉo) kun 25 ĝis 30 horoj kune, neniel estas anstataŭigeblaj per kunvenoj dum la kongreso. Ili donas al la Komitato kaj al la membraro la maksimumon

de certeco pri laŭstatuta plenumo de la laboroj de ĉiuj faktoroj de la Asocio.

Prezido

La prezidon de UEA plenumas Prezidanto laŭ la reguloj fiksataj en Artikolo 33 de la Statuto. Tiu ĉi ofico, verdire sendanka, estas okupata je la fino de 1932 de S-ro Ed. Stettler de Bern. Esti Prezidanto de Asocio, kiu ne gajnas monon, rezultigas gravan oferon de la koncerna persono. Variaj estas la postuloj de tiu ĉi ofico: Juro, administrado, ĝeneralaj konoj, sufiĉa tempo kaj financa sendependeco. Je tiu ĉi okazo ni volas nur mencii la fakton, ke UEA nur kun peno kaj klopodo sukcesas pagi modestegan helpon al la Komisionoj de UEA, kiuj veturas dum Pasko al Genevo por sidi tie kaj diskuti pri la aferoj de la Asocio.

Nia Prezidanto ja partoprenas la Asocion de ĝia fondo kaj estis Vicdelegito de UEA en Bern (1908). Poste dum tri jaroj (1909 ĝis 1911) li vivis en Genevo kaj laboris kun S-ro Hodler. Ligita al lia nomo estas la Financa Reformo en 1912, la starigo de la Garantia Kapitalo (1913), la nova Statuto (1920). Multaj valoraj detaloj de UEA venas de li, kaj ne estas malmalmodeste diri, ke la gvido de UEA ne povas esti en pli bonaj manoj. Aŭtoritateco per la forto de lia karaktero, kompetenteco sen trudo, kaj simpla, jen la trajtoj de la Prezidanto de UEA. La homoj, kiuj laboras kun li, nepre estimas kaj ŝatas lin.

S-ro Stettler fariĝis Prezidanto de UEA post la morto de Hector Hodler (1920) kaj okupis tiun ĉi oficon ĝis sia malsaniĝo en 1924, kiam Dro Privat lin anstataŭis, ĝia tiama Vicprezidanto. Elektite Honora Prezidanto, S-ro Stettler, laŭ la peto de la Komitato, reakceptis la oficon, malplenan pro rezigno de Dro Privat (1928).

Prezidis la Asocion de la fondo ĝis lia morto en 1916 Harold Bolingbroke Mudie, tiama Prezidanto de la Brita Esperantista Asocio. Lin sekvis nur por mallonga tempo S-ro Hodler (1919 kaj 1920).

Apud la Prezidanto estas la Vicprezidanto. Tiun oficon okupis de 1911 ĝis sia morto en 1917 Profesoro Théophile Rousseau, loĝinta en Bourg, poste en Dijon. S-ro Rousseau, matematika profesoro ĉe liceo, submasonis per siaj artikoloj en „Esperanto“ la ĉefajn ideojn de UEA.

En la komenca tempo de UEA la gvido estis en manoj de junuloj, kion la tiamaj estroj de la „oficiala“ movado

ne flankklasis rimarkigi okaze de kritikoj. Al tiuj junuloj Rousseau aligis, matura kaj sperta, persono kun socia rango. Por la tiama oficej-estro, redaktoro, direktoro, ĉio en unu persono, nome Hodler, la aktiva kunhelpo de sperta persono ja estis valorega. Helpis ankaŭ la proksimeco de Bourg en apuda franca departemento Ain por renkontiĝi en iu vilaĝo de la Jura Montaro. Ofte la du renkontiĝis dum dimanĉo por fiksi laborplanon, faratajn aferojn, starigi regularojn. Internacia asocio devas esti internacie gvidata, pro tio la gvidantoj apartenantaj al malsamaj landoj havas malfacilajn por sidi kune kaj diskuti.

La morto de Rousseau, kiu ĝis laste korespondis kun la Oficejo, senigis UEA je kompetenta gvidanto, kies manko sentigis kelkfoje en tre gravaj aferoj de UEA en Francujo.

De post 1924 ĝis 1928 oficis kiel Vicprezidanto S-ro Page en Edinburgh, ellaborinto de plano de Universala Ligo Esperantista. Sekvis lin S-ro Johannes Karsch (Dresden), elektita en 1928 kaj reelektita en 1931 al tiu ĉi ofico. S-ro Karsch transprenis — kion ni jam citis en jarraportoj — konsiderindan laboron: ekzamenon de korespondadoj, organizon de servoj (Turismo, Propagando), ĉio ligita kun montego da skriblaboro.

La servoj de UEA

Kvin verboj esprimas la aktivecon de UEA laŭ la Statuto: Disvastigi, plifaciligi, krei, kreskigi kaj disvolviĝi. Ni sekvu la evoluon de la tria verbo en UEA, kiun difinas la Statuto jene:

Krei internaciajn servojn uzablaj de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materialaj interesoj celas trans la limoj de ilia ĝenta aŭ lingva teritorio.

Servi al siaj membroj, estas la ĉefa principo de UEA. Kiel tiu ĉi ideo progresis, montras la kelkaj linioj sekvantaj.

Jam la Jarlibro de 1908 indikas tri fakojn por la prilaboro de servoj: Administrado, financoj, oficiala ĵurnalo: Esperanto-konsuloj kaj oficejoj; Turismo. Sekvis: Komercokaj industrioj; Junuloj; Aerveturado. Plej grava el ĉiuj servoj estas tiu de Informpetoj, plenumata de la Delegitoj.

La servoj evoluis malegale, ĉar la limigitaj rimedoj de la Asocio neniam permesis riski gravajn monsumojn. Plej atentinda kaj daŭra estas la Servo Turisma, kiu entenas ne nur organizon de vojaĝoj, sed ankaŭ la turisman reklamon per Esperantaj gvidfolioj kaj libroj. UEA kreis

serion de gvidfolioj unuformaj, kaj jam fine de Aŭgusto 1914 ekzistis 81 gvidfolioj kaj libroj eldonitaj sub la aŭspicioj de UEA.

Post la milito necesis ankaŭ pensi je la restarigo de la servoj. Kio estis la antaŭaj malhelpoj kontraŭ tiuj de la postmilita tempo? Nenio. Pro tio ni ankaŭ ne kuragisa entrepreni ion, antaŭ ol ni estas certaj, ke minimuma sukceso estos atendebla.

Hezitaj provoj, unue revivigi la Turisman Servon, ne plene kontentigis. La financa kaj ekonomia stabiligo de Eŭropo en 1924 permesis rigardi pli optimisme en la estonton, kaj dum tiu ĉi jaro la Direktoro submetis planon al la Komitato de UEA, kiel restarigi la ekzistantajn kaj starigi novajn servojn. El tiuj proponoj konkretiĝis kaj funkcias hodiaŭ la servoj: de Bibliografio, de Ekspozicioj, de Gazetabono, de Hoteloj, de Librovendo, de Propagando, de Reklamo, de Respondkuponoj kaj de Turismo. Funkcias nur okaze la servoj: de Eldono, de Kongreso, de Libertempejoj.


Estas inter tiuj servoj kelkaj, kiuj donas profiton, kaj kiel montras la bilancoj de la jaroj 1927 ĝis 1930, tiu ĉi profito estis kelkfoje ŝatinda. Tiuj profitoj venas ĉefe el Libroservo, Reklamo, Turismo. El ili parto utilas kovri eblan perdon ĉe aliaj servoj, kiuj ne havas enspezojn.

Por informi la membraron pri la funkciado de kelkaj servoj, ni eldonis en 1932 libreton *Servaro de UEA*, senditan al ĉiuj membroj de UEA.

Plej nova servo efektivigita estas la Propaganda Servo. Ĝi celas eldoni unuformajn — laŭ aspekto kaj arango — varbilojn por nia afero en nacia lingvo. La organizon de tiu ĉi servo ni priskribis en „Esperanto“ de Decembro 1932 (paĝoj 194 kaj 195). La provo sukcesis, kaj aperis nun tiaj varbiloj en lingvoj ĉeĥa, germana kaj hungara. En preparo estas aliaj, inter ili angla, bulgara, kataluna kaj pola. La ĉefaj karakterizoj de la varbilo estas:

1. Amplekso: alta 22 cm, larĝa 14 cm, tio estas proksimume la duono de la formato de nia revuo. Etendita (do malfaldita) ĝi mezuras 60 cm.

2. Moderna bela skribo, allogaj titoloj. La titolo germanlingva estas: *Dem Weltverkehr eine Weltsprache!* La titolo de l' ĉeĥlingva varbilo estas: *Jeden jazyk pro celý svět!* La titolo estu adaptita al la mentaleco de l' diversaj landoj, tamen rilatante al la bildo.



3. La unua eldono germanlingva estas je 20 000 ekzempleroj, sur glata papero kolora. La ĉeĥa sumas 10 000.

4. La unua paĝo montras la bildon kaj la titolon, la sekvantaj paĝoj la informan tekston, paĝo kvina tekston de Nacia Societo kun listo de lernolibroj kaj vortaroj en la koncerna lingvo; paĝo sesa tekston pri UEA. Restas spaco libera por aldoni, se necese, lokan tekston pri malfermo de kurso ktp.

5. La fotomuntaĵo montras la modernajn ilojn, kiuj malgrandigas la distancojn kaj alproksimigas la homojn: Radio (Eiffelturo), Aerŝipo (Zeppelin), Aeroplano, oceanŝipo, rapidvagonaro (Fluganta Skoto), aŭtomobilo, motociklo.

6. La granda kvanto permesas liveri la varbilon tre malkare. La germana kostas: 100 ekzempleroj 2,— RM, 1000 ekzempleroj 15,— RM. Pri la prezoj de l' alilingvaj ni informas sinsekve.

La akcepto de la diversaj servoj ĉe la Esperantista publiko estas ĝojiga. La intereso je ili montras, ke la ebleco, partopreni kaj kunlabori je tiaj nurpraktikaj aferoj, respondas al la deziro de aro da homoj. Kaj efektive: la servoj estas nenio alia ol feliĉa kunigo de ekzistantaj faktoroj, de vera kunlaboro.

Daŭre la Estraro de UEA serĉis kaj serĉas krei novajn servojn, de kiuj povas profiti la membroj de la Asocio. Kosciante, ke la rimedoj por tio estas limigitaj, plia subteno el la vico de malavaraĵ Esperantistoj estus bona. Tio rilatas ĉefe al tiuj servoj, kiuj ne enspezigas monon, ekzemple la Bibliografia. Mankas al ni la mono, dungi konstantan oficiston por la prizorgo de tiu ĉi servo: klasigado de libroj novaj, kompletigo de la ekzistanta materialo kaj bibliografia prilaboro. Necesas ja por tio ne granda sumo, ĉar ejo kaj materialo ekzistas. Per minimumo de 2000 Frankoj svisaj jare la afero estus farebla. Parolante pri tiu ĉi servo, ankoraŭ ni volas danke memori la bonvolajn donacintojn de libroj kaj sendantoj de valoraj informoj, ekzemple la redakcion de la Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana, de Eugen Wüster, kiu regule nin informas pri interesaj, sendinte fotoreproduktaĵojn de aferoj valoraj.

Servoj, pri kiuj ni jam laboris kaj posedas planojn, estas tia pri Asekuro de la membroj (kun la kotizo), tia pri Statistikio internacia de la kursoj de Esperanto. Dependas de cirkonstancoj, de tempo kaj de — mono, daŭrigi en tiu ĉi direkto. Bonvolaj proponoj pri aliaj servoj estas ĉiam

atentataj kaj prilaborataj kun la sama zorgo kiel aliaj laboroj de UEA. La devizo de la Asocio estu:

Servante ni utilas kaj konsumiĝas!

La eldonaĵoj de UEA

La eldonaĵoj de UEA estas duspecaj: Laŭ la Statuto la Asocio eldonas — je sia risko — oficialan gazeton „Esperanto“, Jarlibron, de tempo al tempo Oficialan Bultenon (sendatan nur al la Delegitoj), raporton al la jara kongreso; krom tio varbilojn kaj presaĵojn, kiuj necesas por la propagando. La historio de niaj ĉefaj eldonaĵoj estas — por tiel diri — heroa batalo inter deziro kaj ebleco, tio estas, ke oni volis nepre liveri maksimumon, sed enspezoj ne ĉiam tion permesis. Ni sekvu en kelkaj linioj la sorton de la revuo „Esperanto“.

Revuo

Per letero, iom antaŭ sia morto, S-ro Hodler donacis la gazeton „Esperanto“ al UEA. Malsimile al bonvolaj donacintoj de objektoj, kies konstanta prizorgo postulas rimedojn ne egaligeblajn per enspezoj, li postlasis ankaŭ sumon, kiu servu por kovri eblan mankon. Dum 15 jaroj S-ro Hodler estis posedinto kaj redaktoro de la gazeto kaj neniam sukcesis tiri eĉ modestan profiton. Kontraŭe, en unuaj jaroj li devis ĉiam alpagi. Liajn penadojn kaj zorgojn pri sia „infano“ sprite rakontis S-ro Stettler en la biografio pri Hector Hodler, aperinta en la Kongresa Dokumentaro de UEA por la Haga Kongreso (1920) kaj represita en la libro „Hector Hodler, lia vivo kaj verko“.

Fondis la gazeton S-ro Paul Berthelot, franca samideano (1883—1910), kies pseŭdonimo estis Verema. Post dujara baraktado li transdonis ĝin en 1907 al S-ro Hodler. Tiam kaj ĝis 1910 ĝi aperis en granda formato, alta 48 cm, larĝa 34 cm, en jaro 1909 eĉ 60 cm alta kaj 44 cm larĝa, la „lituka“ periodo. Ĝis la jaro 1914 ĝi aperis dufoje monate kun preskaŭ matematika reguleco, de post kiam ĝi aperis en presejo Büchler en Bern. La enhavo de la gazeto estis lerta miksaĵo de tagaj kaj Esperantistaj okazintaĵoj. Jam en la unuaj numeroj montriĝas la talento de Hodler, turni la atenton al praktikaj aferoj.

Videbla estis la tendenco de la redaktoro, atenti sociajn problemojn, kaj mirige estas ankoraŭ nun konstati, kiom

lerte li sukcesis ĉiam reveni je la ĉefa ideo: Harmonia kunlaboro de ĉiuj popoloj pere de Esperanto. La realigo ne atendigis longe: En 1908 fondiĝis UEA, konkreta solvo de tiu ĉi ideo.

La kvar jaroj 1907 ĝis 1910 estis kvazaŭ lernjaroj. En 1911 la gazeto transformiĝis en revuo laŭ la nuna formato, sed dufoje en la monato. Aperis en 1911 23 numeroj kun 372 paĝoj da teksto. La abono estis tiam 5 Frankoj, kio ŝajnas preskaŭ neveraĵo hodiaŭ.

Promesiga estis la evoluo, kaj novaj planoj ekaperis. Trancis tion la milito, kiu kreis ankaŭ tute aliajn kondiĉojn.

Post kelkmonata interrompo reapervis la revuo en 1915. En artikoloj ankoraŭ nun legindaj la redaktoro montris la kaŭzojn de la tutmonda katastrofo, laŭgrade evoluante la ĉefajn ideojn pri la intergenta malordo. Tiu ĉi serio de artikoloj fine alvenis per priskribo, kiel devos esti la estonta organizo de la mondo. Kiom profunde li konis la realaĵojn de la mondo — li, idealisto —, montras jenaj linioj, ekstrakto el ĉefartikolo de 1920 „Novjaraj pensoj“, linioj skribitaj kelkaj monatoj antaŭ lia morto.

Nova jaro. Malĝoje, korpreme komencas ĝin la homaro. Korpe malsana, spirite disbatita homaro. En vasta parto de Eŭropo agonianta, viroj ankoraŭ bučas unu la alian; nedireblan mizeron travivas tutaj popoloj, al tomo trenataj de malsato, elĉerpiĝo, senespero. Ĉie vivbatalo pli akra ol iam, milionoj kaj milionoj da estaĵoj ĉiutage baraktantaj kontraŭ premanta fatalo; ĉie suspektaĵoj, malpacoj, insidoj, perfortaĵoj inter nacioj, inter klasoj, inter partioj. Kaj spite ĉiuj malfeliĉoj, aŭ eble ĝuste pro ili, ĉie plezursoifo, ĝuemo, senpenso avideco, dancado en la ruinoj.

La esperojn, kiuj vivigis la homaranojn, kiam ekĉesis la furiozo batala, prezentas nur fantoma Ligo, malfeliĉa infaneto tute pala, sensanga, miskreskinta, pri kiu eĉ la gepatroj ŝajne perdis vivesperon.

Multe pli gravan rolon ol politiko rilate la plialtiĝon homaran ludas edukado. „Donu al mi edukadon“, diris Leibniz, „kaj mi aliformigos Eŭropon antaŭ unu jarcento.“ Estas ĉagrenige konstati, ke dum malgrandaj politikaj demandoj estas temo de sennombraj diskutoj kaj penoj, edukaj problemoj, multe pli gravaj, estas apenaŭ atentataj. Precipe nun edukado devus esti prizorgata. Tro laca, tro suferinta estas la nuna generacio, por ke ĝi mem

povu plenumi la grandajn taskojn, kiujn postulas la starigo de pli bona mondo.

Politiko similas al unu el tiuj militaj kampoj, kiuj estis tiom disŝiritaj de kugloj, ke nenio plu povas tie esti kulturata. Kontraŭe, edukado estas kampo, en kiun ni povas ĵeti ĝermantan grenon. Penu, penu, ke la morgaŭa rikolto estu blanda.

S-ro Hodler donacis la revuon al UEA. Tio metis la Estraron de UEA antaŭ grava tasko, trovi redaktoron kompetentan, kiu plenumu la taskon laŭ la Statuto de UEA:

La gazeto estu gvidata laŭ la ĝisnuna tradicio kaj enhavu nenion kontraŭ la celoj aŭ la interesoj de la Asocio. Escepte tio, la Redaktoro ĝuu en sia laboro plej eblan liberecon.

La elekto de la Komitato de UEA falis sur personon, kiu pro sia rilato al la mortinto, pro sia rolo en la movado kaj pro siaj ecoj estis kvazaŭ destinita transpreni tiun ĉi taskon: Dro Edmond Privat. La decido de la Komitato aperis en „Esperanto“, Oficiala Informilo de UEA, Julio-Aŭgusto 1920, paĝo 145.

La nova redaktoro fidele sekvis la tradicion de la revuo kaj klopodis igi ĝin tribunon de plej noblaj ideoj. Riĉa kapablo lingva kun eksterordinara facileco esprimi klare kaj koncize komplikajn temojn kaj profundajn sentojn, tiel ni konis Dro Privat kiel oratoron de la kongreso. Kaj ni lin retrovas en la revuo „Esperanto“, kie li donacis al la legantaro dum la 13 jaroj multajn verkojn, kiuj meritis pli belan vestaĵon ol la sobra kaj modesta kostumo de „Esperanto“. Lia ĉefa kampo estas la ideo homarana, tiel kiel esprimis Dro Zamenhof, kies genia interpretisto ja fariĝis la redaktoro de „Esperanto“ ne nur per la paroladoj, artikoloj Esperantistaj, sed ankaŭ per liaj penadoj en aliaj medioj, kie li sukcese defendis kaj reprezentis nian movadon.

La teknikano parton de la gazeto, la rilatojn kun presistoj kaj kunlaborantoj, la administradon plenumas la Centra Oficejo. Kiel estas ja atendebla, ankaŭ la enhavo, la aranĝo kaj la sinteno de la revuo de UEA ne kontentigis ĉiujn, kaj aŭdiĝis regule plendoj, ja eĉ severaj kritikoj. Estas delikata temo, defendi la sintenon de la redakcio, kiu, devigata atenti multajn dezirojn, vidpunktojn kaj preferojn, ne ĉiam trovos la ĝustan mezon. Tamen senpartia juĝanto konfesos, ke ĉiam estis videbla la volo plibonigi la enhavon kaj aspekton de la ĉefa eldonaĵo de UEA. Periodaĵo, kiu servas

por movado kun nepolitika karaktero, por movado lingva, internacia, kaj kies legantaro grupiĝas el ĉiuj klasoj sociaj, havas certan malfacilecon. Aŭ ĝi fariĝos senkolora, oficiala komunikilo plej teda, aŭ ĝi estos amuziga kafotabla legaĵo kun rakontetoj infanecaj. La tasko estas varia: Lingva, informo, oficiala, kun ĉefa devo sekvi en ĉio rektan linion. Multaj temoj estas neeblaj por ĝi, aliaj postulas atenton, dekstre kaj maldekstre, dume restas ankoraŭ la plia malhelpo, ke la legantaro ne estas unuforma.

Kunigu ĉiujn malfacilaĵojn, kaj vi konsentos kun la raportanto, ke oni klopodis kontentigi maksimumon de la legantaro. Dum la kongresoj, kie raportas la Estraro de UEA, ja oni ĉiam atendis aŭdi konkretajn proponojn pri la enhavo. Tomba silento eĉ post trifoja insistado kaj peto nur povis kredigi, ke ĉiuj estas pli-malpli kontentaj. Se ne, tiam ĉiu uzu sian rajton de libera kritiko.

Jarlibro

La dua plej grava eldonaĵo de UEA estas la Jarlibro. Ĝi plej elokvente pravas la evoluon de la Asocio. El la modestaj broŝuroj de 1908 kaj 1909 fariĝis la dika libro, kiun vi konas.

Redaktas kaj kunmetas ĝin la Direktoro de UEA, laŭ Artikolo 43 de la Statuto. Tiu ĉi artikolo ne fiksas speciale la karakteron de la Jarlibro kaj lasas al la redaktanto vastan liberecon, kiu tamen trovas unu barilon, ne facile forigeblan: la kosto. La nuna Jarlibro estas la 21a, ne la 25a, kiel devus esti. Mankas kvar militjaroj, precize, la jaroj 1915, 1917, 1918, 1919 (en 1919 aperis Adresaro de la Delegitoj).

Diversfoje ni aludis, kiun celon ni havis antaŭ ni kun la Jarlibro. Ĝi ne devus esti nura adresaro, sed informilo ĝenerala, internacia, instrua kaj dokumentiga samtempe. Sisteme ni sekvis tiun ĉi ideon de la fondinto de UEA kaj atingis en la jaro 1928 la plej altan ŝtupon de evoluo kun 600-paĝa eldonaĵo, riĉa je ĉiaspecaj informoj precipe turismaj. La krizo metis finpunkton al tiu ĉi bela evoluo. La sekvintaj Jarlibroj, 1929 ĝis 1932, respondis al la reala stato de la financoj. Esperinde, ke iam oni povos reveni al tiu ĉi bela stato de 1928. De post 1924 la Jarlibro de UEA estas la Jarlibro de la Esperanto-Movado kaj estas la nuna eldonaĵo la deka, kiu portas tiun ĉi titolon.

La Premioj

Plej atentinda servo al la membroj estas la Premioj. Tiu ĉi servo estas naskiĝinta el la praktiko, kaj kiel ni konstatas, trovis la ŝaton de la membroj. Neniul ni imagis al ni en 1924, ke tiu ĉi provo, disdoni librojn al niaj membroj, kreskos je tiom konsiderinda servo. La disdono de premioj komencis en jaro 1924, unue, por Subtenantoj, poste por frupagantoj kaj poste por la varbantoj. El modesta listo de kelkaj verketoj evoluigis la listego de 75 numeroj, aperinta en la speciala numero de „Esperanto“ (verda) dum Novembro 1932. De la komenco en 1924 ĝis fino 1932 UEA disdonis iom pli ol 60 000 librojn kun valoro de proksimume 50 000 Frankoj svisaj (nia propra kosto).

Diversaj proponoj, plibonigi tiun ĉi liveron, ni konsideras kiel pruvon de la ŝato por la ideo. Inter tiuj proponoj estas ekzemple tiu, ke UEA mem eldonu ĉiujare iun libron, elekteblan kiel premio. En certa senco ni tion komencis efektiviĝi per la eldono de verketoj „Estonta Eduko“ kaj „Esprimo de Sentoj“, sed por ne tro puŝi UEA en riskon financan, ni preferas limigi tiun ĉi agadon. Ekzistas ja tiom da entreprenemaj eldonistoj, kiuj ne malŝatas, ke UEA uzas iliajn eldonaĵojn por premioj.

La financoj de UEA

La Statuto dediĉas al tiu ĉi grava ero nur kvin artikolojn el 70. Fakto estas, ke en aliaj partoj de la Statuto troviĝas ankaŭ reguloj, kiuj rilatas al financoj. La kvin artikoloj formas do la skemon, laŭ kiu laboru la Asocio, ĉu la Centra Oficejo, ĉu la Teritoriaj Oficejoj aŭ kasoj.

UEA vivas el la kotizoj. Kiu iom konas societatan administradon, scias, kiom daŭra estas la diferenco en vidpunktoj de la membroj (kiuj deziras kiom eble plej malaltan kotizon) kaj la estraro (kiu bezonas monon) pri la alteco de la kotizoj. Estas unu el la regulaj diskut-kaj disputpunktoj en kunvenoj, kaj la Esperantista movado ne faras escepton. En UEA la kotizoj estas fiksataj en svisa mono kaj la Delegitoj privoĉdonas ilin. Ekzemplon de stabila kaj kontinua laborado ni havas en tio, ke la nunaj oficialaj kotizoj en svisa mono estis proponitaj en 1920, voĉdonitaj en sama jaro kaj seninterrompe validaj. La sekureco de la svisa mono ankaŭ permesas sinsekvan manipuladojn kaj komparon.

Ĝis 1919 la risko de UEA estis relative malgranda. La ĉefa eldonaĵo estis la Jarlibro, la pliaj kostoj tiuj de Oficejo kaj de personaro. La grava elspezo pri la revuo apartenis al S-ro Hodler, kiu krom la laboro pri la revuo ankaŭ portis la riskon. Temis pri sufiĉe alta sumo ĉiujare (inter 10 000—12 000 Frankoj), mono laŭ antaŭa aĉetpovo.

La tendenco havi grandegan nombron da anoj, logike postulas malaltan kotizon. Nu, UEA komencis kun 60 centimoj (50 Pfennig, 6 Penco) sen la Jarlibro, aparte aĉetebla. La defendantoj de la tezo: „Malalta kotizo, alta membronombro“, prenu nur la ekzemplon de UEA kaj la spertojn, kiujn ĝi faris. La 60 centimoj fakte estis sumo, tro alta por ne tuj bankroti kaj ne sufiĉa por plenumi ion dece. La procedo de enkasigo, komparebla al la fizika leĝo de frotado, absorbas tro da mono, proporcie al la efiko. La 60 centimoj sen Jarlibro jam estis anstataŭigitaj per la propono de S-ro Stettler al la Unua Kongreso de UEA en Augsburg (paĝo 36 de la Kongresa Dokumentaro), fiksi kotizon de 1,50 Frankoj, sed kun ricevo de la Jarlibro. Ankaŭ tio ne notinde ŝanĝis la situacion, kaj tiam en jaro 1912 al la Kongreso en Krakovo venis la propono, fiksi 2,50 Frankojn por la simpla kotizo (Membrokarto kaj -rajtoj, Jarlibro). Tio, kun aliaj ŝanĝoj, estis la fama Financa Reformo, kium proponis S-ro Stettler kaj kiun la kongreso akceptis kaj poste la leĝfaranta povo: la Deleĝitoj. Efektive la reformo estis taŭga. La unua jaro sub la nova sistemo alportis mal-kreskon de la membraro, sed sanajn financojn kaj monon en la kaso. La jaro 1914 promesis, ke la perdo de membroj per la transiro estos regajnitaj, kiam la milito detruis la belan perspektivon.

Granda avantaĝo ĝis 1919 estis, ke la Centra Oficejo kaj la Centra Kaso laboris kun stabilaj monoj. Aparte strange por ni estas revidi en la kaslibroj, ke en 1914 franca bankbileto de 1000 Frankoj donis ioman profiton, ĉar oni pagis por ĝi 1002 ĝis eĉ 1003 Frankoj en svisa mono. (Svislando apartenis ĝis la jaro 1920 al la Latina Monunio, kiu entenis Belglandon, Francujon, Italujon kaj Greklandon.) Tiu ĉi simpleco, kalkuli ne nur kun firma mono, sed ankaŭ labori per monoj en firma rilato al la svisa Franko, ŝajnas hodiaŭ kiel revuo.

Dank' al favoraj kondiĉoj, relative malaltaj salajroj (kun despli ofte ŝanĝantaj oficistoj), la libervola laborado de S-roj Hodler kaj Stettler, UEA sukcesis kaj firmiĝis.

Tio ja ŝanĝigis komplete post la milito. La senvalorigo de la plimulto de eksterlandaj monoj devigis, ke ni trovu rimedon por ebligi la aligon al anoj en valutsuferantaj landoj. Konata fakto estis kaj estas ankoraŭ nun, ke la salajroj en ĉiuj valutsuferantaj landoj estas notinde malpli altaj, transkalkulante en oran monon en Dolaro aŭ en alia firma monunuo. Fakte tia stato estis konita al ni jam antaŭe. En kelkaj landoj — balkanaj, sudamerikaj kaj aziaj ŝtatoj — ekzistis jam antaŭ la milito tia misproporcio inter enlandaj prezoj kaj kostoj kaj eksterlanda valoro de la propra mono.

Kiel ni nin aranĝis? La Statuto de UEA antaŭvidas tiun ĉi tre gravan detalon kaj fiksas en Artikolo 47 (2—3) la leĝan bazon. Ĝi tekstas:

La Prezidanto rajtas provizore malaltigi la prezojn por landoj kun kurzoj tiel malfavoraj rilate al la svisa, ke plenvvaloraj prezoj malhelpus grandan parton de la tiaj Esperantistoj daŭrigi ilian membrecon.

Se kontraŭe la svisa mono multe perdas de sia laŭleĝa valoro, la Komisiono povas provizore deklari la oficialajn prezojn de alia lando kiel normalaj kaj rilatigi al ili la tabelon de la kotizoj.

La praktika apliko do estas, ke ni starigis tabelon kun naciaj prezoj. En 1920 ni montris 20 landojn kun prezoj en propra mono, en 1932 estis 40. Malsimpla afero, se oni konsideris, ke estas tri kotizoj, plie naŭ aliaj aferoj de UEA (anoncoj, entreprenoj, insignoj ktp.); ĉirkaŭ 500 prezoj, ĉiuj firme laŭ svisa mono kaj ŝanĝanta en fremda mono. Kompreneble ni serĉis certajn simpligojn, rilatigante la sumojn de unu al alia mono por pli facile kalkuli. Tamen restis aro da problemetoj, precipe la neebleco, tuj disponi pri enspezita mono por eviti perdon pro kurzfalo. La dua etapo en la solvo de tiu ĉi problemo estis la sistema malcentrigo en la ĉefaj landoj, ĉu per elekto de reprezentantoperanto aŭ de Ĉefdeleĝito. La tria etapo estis, ke — por respondi al la malpli altaj kotizoj de certaj landoj — ni presigis Jarlibron kaj revuon en eksterlando. Tiuj aranĝoj laŭ la bezono de l' momento ja ne povis esti faritaj tuj en la komenco. Mankis sperto, mankis la homoj, kaj kontraŭstaris ankaŭ certaj kondiĉoj de politika naturo.

La situacion tiutempe plej bone montras la ciferoj. Anstataŭ 4,50 Fr. por Membro kaj 11,25 Fr. por Membro-Abonanto la meza sumo enspezita dum la jaro estis 3,34 Fr. por Membro kaj 6,95 Fr. por Membro-Abonanto. Tio estis

20 kaj preskaŭ 40 procentoj da perdo en la du ĉefaj kategorioj. Ni staris antaŭ la grava demando, ĉu ni devus daŭrigi tiel aŭ serĉi alian solvon. La raporto de 1920 enhavis jenan konkludon de la Prezidanto:

Unuavide ĝi aspektas des pli senespera, ke la pasintan jaron ni ne faris elspezojn eksterordinarajn, escepte iom multe por Jarlibro kaj Kongreso. Por tiu ĉi jaro mi promesas ŝparemon ĉie ajn, sed ne ŝparojn. La Oficejo en Genevo kostas 1000 Frankojn pli multe kaj ankaŭ la salajroj estos pli altaj. En Bern ni laboris relative malmultekoste. Nuntempe, kiam la komunumoj pagas 4000 ĝis 6000 Frankojn por tranĉi trambiletojn aŭ kontroli gازهurilojn, sumo de 17 000 Frankoj por oficejo bezonanta kvar ĝis kvin oficistojn tute praviĝas; same estas kun la korespondado estonte pli alta kaj la ceteraj elspezoj.

Efikaj ŝparoj estus efektivegeblaj per la ŝanĝo de la tuta labormetodo de UEA. Forigo de la centra kontrolo de la membroj, sekve, de la membrokarto, forigo de ordigita delegita sistemo, maldikigo de la Jarlibro je eble 100 paĝoj, ĉesigo de la korespondado pri ĝeneralaj aferoj kaj servoj ktp. UEA fariĝus aro da abonantoj, kiuj laŭvole ion alpagas al kvazaŭa propagandejo.

Sed konforme al tio ankaŭ nia gazeto perdus sian karakteron de centra organo de bone ordigita Asocio. Tio signifus, ni restu konsciaj pri ĝi, la ĉesigo de pli ol 20-jara evoluo, eble eĉ plena malapero de UEA. Supozeble malmultaj el la kunlaborintoj ŝatus rekomenci tute modeste al direkto, kiu nepre kondukus al aranĝo tre simila al tiu, kiun ni forlasus nun. Dufoje ne ripetigis la historio.

Ne facilanime, sed konvinkite, ke nuntempa ŝanĝo nin pereigus, mi rekomendas al vi daŭrigi kiel kutime almenaŭ unu jaron. Ni rajtas esperi internaciajn viukondiĉojn pli bonajn, ĉar pli malbonaj ili ne plu povas fariĝi. Kelkajn jarojn ni povas certe vivi el la kapitalo, tial tro frua ĉesigo ne estas komprenata de niaj membroj. La Oficejo jam notis 4000 kotizojn kontraŭ 3600 de la tuta pasinta jaro kaj esperas pliajn dank' al la aperonta Jarlibro. Ankaŭ la tiujara kotizo en eksterlanda mono estas iom pli alta, kaj mi intencas ĝin ree altigi por la proksima jaro (la normalan ni lasu senŝanĝe).

Por daŭrigi, oni bezonas pli multan kuraĝon ol por likvidi. Ni havu tiun kuraĝon.

Tiuj linioj estis skribitaj en Julio 1921, tri semajnojn antaŭ la Kongreso en Praha. La espero esprimita en kresko de la membraro kaj malkresko de la perdo en la regula administra konto, efektiviĝis. La fido de la membraro, la plibonigo de la eksteraj kondiĉoj praviĝis la daŭrigo de la Asocio laŭ la sama maniero. Sinsekve ni povis realigi novajn planojn, plibonigi servojn, Jarlibron, kaj ĉio promesis konstantan evoluon trankvilan, kiam en 1926 ŝanĝis denove la aspekto de la mondo. En la aldonitaj tabeloj atenta leganto trovas la konfirmon. Tie ĉi ni volas ankoraŭ doni kelkajn principajn klarigojn.

Aŭdiĝis plendoj kaj riproĉoj, ke UEA elspezas tro multe, ke ĝi devas eviti deficitajn. Estas ekster ĉia dubo, ke pri sendeficitaj vivo de nia Asocio ĉiuj konsentas. Restas la problemo, kiel tion atingi. Asocio internacia kun taskoj fiksitaj laŭ la Statuto ja ne povas en ĉiuj aferoj agi kiel komerca entrepreno. Simpla pruvo de tiu ĉi vero estas, ke neniam komerca entrepreno konsentus la tielnomatajn *favorprezojn* je la kotizoj, kiujn ni devis konsenti, por konservi al la movado valorajn fortojn. Nia financa konduto sekvis severe simplan sperton pli ol dekjaran. Tio estas, ke taŭga dividado de la bezono estas proksimume: Unu triono de la budĝeto por salajroj, unu triono por la ĉefaj presajtoj; Jarlibro kaj revuo, la resto por ceteraj kostoj; premioj, aŭrango, Oficejo, rentumo, amortizo ktp.

Pri la kaŭzoj de tiuj monperdoj aperis jam detalaj kaj fakulaj klarigoj. Ni mem atendis la ekvilibron de ĉiuj elspezoj ne de unu flanko (nur redukto de la kostoj, alĝigo de la enspezoj), sed de la du. Rilate je la unua, sistema malaltigo de la kostoj, ni trovis tre atentindan faktoron: presigi alilande la ĉefajn presajtojn. Pri la dua, la alĝigo de la enspezoj, ni atendis ĝin de la plibonigo laŭkurza, kio fakte okazis ĝis la jaro 1928, videbla el la tabeloj pri la ĉeza sumo ricevita por kotizo. Alia faktoro, kiu malpli videble realiĝis, estis la nombra kresko de la membraro kaj speciale la fideleco de malnovaj anoj. Dank' al nia membrokontrolo ni povis ĉiam tre bone konstati, kiom estas la nombro de la „gastoj“, do de tiuj anoj, kiuj aliĝas por unu jaro ekzemple kaj poste aliĝas. Neniu Esperantista societo posedas tian kontroleblecon, kaj ankaŭ neniu alia povas fari la samajn konstatojn kiel ni. La ĉiujara ekŝigo plus forstreko pro nepago preskaŭ regule estis kompensata per novaj aliĝoj. Sed ĉiu nova aliĝo, kiu anstataŭas

antaŭan anon; estas ligita kun certaj laboroj kaj sekve elspezoj. Plia detalo estas la afranko. Ne ekzistas alia movado, kiu — proporcie laŭ sia graveco — donas tiom da profito al la — poŝto. Sajne ankaŭ ne ekzistas alia movado, en kiu oni tiom multe skribas ol en la nia. Povas esti, ke tio estas intime ligata al la lingva karaktero de la movado, sekve fundamenta kaŭzo. Estas dilemo: ne respondi aŭ nur per formuloj — aŭ respondi kaj, inter dek okazoj, gajni per ĝentila detala informado valoran kunbatalanton. Oni ja ne scias, kiu estas la skribanto, sekve estas devo plej elementa, respondi plej rapide, respondi, tiel ke la skribinto havu la impreson de individua interrilato. Tio kostas, ne nur por afranko, sed la korespondado mem, postulas tempon, sekve monon.

Plia kaŭzo estas, ke la varbado de membroj estas sufiĉe multekosta en Esperantujo. La amaso de la presajoj necesaj, la klopodoj por gajni novan anon, estas faktoro, kiun la kutima kritikanto tute malatentas. Oni povas pretendi, ke presaĵo ordinara, presata plej malmultekoste, faru la saman servon kiel bonaspekta varbilo. Ni ankaŭ provis tion por akiri juĝeblecon, kaj ni venis al kontraŭa vidpunkto. Organizaĵo, kiu volas varbi por si, ne sukcesas tion per primitiva presita foliaĉo. Tute ne intencante imiti la luksan usonan manieron, ni konstatas, ke ankaŭ por movado la reklamo devas sekvi modernan vojon.

Pri aliaj kritikoj kontraŭ la financa procedado valoras konigi kelkajn faktojn. La financa manipulado sekvas jenan vojon: Dum Septembro-Oktobro ĉiujare la Direktoro starigas la budĝeton por la nova jaro, korespondas pri ĝi kun la Komisiono kaj poste sendas sian proponon al la tuta Komitato. Tiu ĉi respondas, kaj laŭ tiuj respondoj, ofte akompanataj de longaj leteroj, la Direktoro publikigas la budĝeton, informante pri la akcepto per la Komitato. Ĉar tia budĝeto entenas tion, kion fiksas la Statuto, estas malofta opozicio pro la rubrikoj unuopaj. Tia budĝet-propono nun ne estas tiom simpla afero, ĉar sekvata de ampleksa korespondado kun aro da Komitatanoj. Estas ĝojiga pruvo pri la sento de respondeco de la Estraro de UEA, kaj ne malofte rezultigis valoraj plibonigoj el tiu ĉi ĝisfunda informigado.

La jara bilanco (post Oktobro) kun detala raporto pri ĉio estas sendata al la Komitato. Tiu ĉi raporto, kompletigita, servos por la kutima raporto al la kongreso.

La kontrolo de la oficejaj financoj okazas per spertulo pri librotenado, elektita de la Komisiono de UEA. La Komisiono mem esploras ĉiujare surloke la staton laŭ la libroj kaj dokumentoj. Respondecas pri la financa manipulado de la Centra Kaso la Direktoro, pri la Teritoriaj Kasoj la Cefdelegitoj ĝis formala akcepto per la Estraro.

*

Je la fino de 1932 la pensoj reiris al 1922, kiam en Helsinki okazis la stabiligo de la movado per ambaŭflanka interkonsento, kaj kiam ankaŭ stabiligis pli-malpli la mondkondiĉoj de la mondo, almenaŭ de grava parto. En 1932 ni staras je sama punkto kiel en 1922, kun pli da spertoj sed eble ne taŭgaj por la novaj komplikajoj, kiuj rezultigis el la du krizoj: La ĝenerala tutmonda krizo kaj la organiza krizo en Esperantujo. La unua pezas sur ĉiuj senescepte, la dua montris pinton kontraŭ UEA. Ci tiu devas do batali kontraŭ du frontoj, kio nature influas kaj rimarkigas en niaj financoj. Konstatinde estas, ke la grandega plimulto de la Esperantistaro ne volas ion scii pri eksperimentoj, malaprobas revolucion, sed deziras evoluon. Esperinde estas, ke tiu ĉi interna krizo trovu solvon, kiel esprimis sin la Komitato de UEA en sia „Deklaro pri la organiza projekto“ (aperinta en numero 1/1933 de „Esperanto“).

La Centra Oficejo

La sidejo de UEA troviĝas ĉe sia Oficejo en Genevo (Svislando). UEA deklaras sin Asocio kun celo ideala kaj je ne limigita daŭro, konforme al Artikolo 6o de la Svisa Civila Kodo. La Centra Oficejo de UEA estas oficiale nomata „Internacia Esperanto-Oficejo“.

La Komitato rajtas translokigi la sidejon de la Asocio en alian svisan lokon kaj laŭbezone ilin enskribi en- kaj eksterlande en la ŝtatajn registrojn por societoj.

Jen la Artikolo de la Statuto, kiu fiksas la lokon de la sidejo de UEA. Tio estas kvazaŭ la ekstera trajto, dume la internajn oni trovas en Artikoloj 39—43.

Granda avantaĝo por UEA estas la liberama spirito de la Svisa Leĝaro. Valoras, ke ni citu la Artikolon 6o de la Svisa Civila Kodo, la jura bazo de UEA:

Unuiĝoj kun celoj politikaj, religiaj, sciencaj, artaj, sociaj aŭ aliaj ne ekonomiaj, akiras la personecon, se esprimiĝas en la statuto la volo ekzisti kiel korporacio.

La statutoj devas esti skribite faritaj, informi pri la celo de la unuiĝo, ĝiajn rimedojn kaj ĝian organizon.

Tiu ĉi artikolo forigas ĉiun malhelpon, kiun renkontas societoj sen komerca celo en multaj landoj. Ne necesas polica permeso kaj neniam enskribo en registro de firmaoj. Sekve UEA kapablas procesi, protekti sian nomon kaj el-donaĵojn, rajtas posedi terenon aŭ domon.

Kelkaj vortoj pri la Centra Oficejo kaj la sidejo. Genevo, kie sidas kelkdekoj da internaciaj societoj, ja estas taŭga, eble la plej taŭga loko por supernacia organizajo. La Svisa Leĝaro, tre liberala rilate je societoj, la karaktero de kvarlingva lando, la popolregada spirito estas feliĉaj kondiĉoj, ne facile troveblaj alilande. La politika neŭtraleco de la svisa ŝtato ankaŭ ne estas malsatinda faktoro, tute ne parolante pri la certe atentinda rolo de Genevo kiel gastiganto de la Ligo de Nacioj, pli precize, de ĝiaj gravaj organoj: la Sekretariejo kaj la Internacia Labora Oficejo. Pli Genevo posedas kvalitojn, malpli konatajn al fremdulo. Tio estas ĝia ege simpla vivmaniero kaj la manko de variaj distraĵoj, je kio distingigas ekzemple franca aŭ germana urbo je sama grandeco. La veno de la Ligo de Nacioj, kio ja ĉiujare alveturigas milojn da fremduloj alispecaj ol la kutima turisto, certe influis iom la vivon tie ĉi, kvankam la ekstera bildo ne multe ŝanĝiĝis. Postrestas eble al la urbo Genevo la puritana spirito de reformatoro Calvin, se ne ĉe la tuta loĝantaro, almenaŭ en la malnovaj familioj Genevaj. La loĝantaro mem estas la plej kosmopolita, superata nur de Novjorko, Londono kaj Parizo. Stranga fakto estas, ke 70% de la loĝantaro ne estas Genevanoj, kaj el tiuj 70% pli ol la duono estas ne-svisoj. Tiu ĉi kosmopoliteco vidigas tamen nur el la statistiko, dume en la vivo de la urbo la franca lingvo nete estras. En societa vivo ne estas eksterordinare, troviĝi kune kun anoj de dek ĝis dudek diversaj nacioj.

Tiu ĉi karaktero de la urbo influis ankaŭ la Centran Oficejon de UEA. La stabo konsistis ĉiam el personoj el malsamaj landoj, kaj tial la uzo de Esperanto estis kvazaŭ deviga.

UEA fondiĝis sen kapitalo. Ĝi estis provo, kaj ĝiaj fondintoj devis plenumi la plej ordinariajn laborojn ĝuste,

ĉar ne estis eble dungi tiom da personoj, kiom postulas la laboro plenumota, kaj pagi iom dece. La malcerteco de la fondaĵo, kiu ja devis unue pruvi sian vivkapablon, la klara malversajno gajni konvene, ne entuziasmigis spertulojn por dediĉi sin al tiu ĉi laboro. Granda laborkvanto restis tial sur la gvidantoj. Neniu miras, se pro la teda laborado pri sensignifaj aferetoj la fervoro malgrandiĝis. Ĉiu, kiu iam gvidis kaj laboris en tia medio, komprenas tion.

La stabo konsistis en la unuaj jaroj el studentoj diversnaciaj, kies efektiva bonvolo devis kompensi la mankon de sperto je administraj laboroj. Nur pro la Financa Reformo, kiun ni dankas al la persisto de S-ro Stettler, la kaso pleniĝis je mono, kaj UEA povis dungi oficistojn, pli konvene pagatajn. Parenteze ni memorigu tie ĉi, ke ekzemple oficisto, kiu plenumis la rolon de „sekretario“, ricevis la „gigantan“ sumon de 100 Frankoj monate, kio estis tiutempe la salajro de junulo post fino de la trijara lernado en oficejo.

Kiel dirite, la financa reformo de UEA en 1912 plibonigis la staton. Pleniĝis la Oficejo per sindonaj oficistoj, la librotenado transiris al bankoficisto, ĝenerala sekretario malsarĝis la Direktoron, kiu ja multe oferis al Esperanto kaj UEA.

La jaroj 1913 kaj 1914 (ĝis Aŭgusto) estis la plej bonaj por nia Asocio kaj ankaŭ por la Centra Oficejo. Taŭga instalo, elprovita labormetodo interna, inteligenta disciplino, ĉio kuniĝis por certigi sanan evoluon de la Asocio. Malmultiĝis la plendoj, multiĝis la dankesprimoj pri bona funkciado de la Asocio kaj de ĝia Oficejo. La militdeklaro metis dikan strekon sub ĉio tio, kaj malhela aperis la estonto.

La postmilita epoko ja ŝanĝis profunde ĉion. La grandaj taskoj postulis aron da oficistoj, sed la rimedoj neniel venis aŭ povis veni el la kotizoj de tri- ĝis kvarmilanoj. Dependis do ĉio fakte de kvar ĝis kvin personoj, kiuj metis lastan provizon de sindono, fervoro kaj abnegacio en la aferon, kun espero, ke venos pli bona epoko. Ĉiam estis problemo por nia Asocio, trovi kaj konservi la oficistojn. Lerninte en internacia oficejo multon, kiu aliloke ne estas lernebla, Genevo kun aro da internaciaj oficistoj prezentis eblecon al inteligenta persono kun sperto, trovi oficon pli bone pagatan. Estis kaj estas por oficjestro de UEA delikata problemo, trovi oficistojn sindonajn, kiuj (ne kalkulas la laborhorojn) posedas ĝeneralajn konojn, scias krom Esperanto du ĉefajn lingvojn kaj fine kontentiĝas kun

malalta ĝis meza salajro. La foresto de sociaj asekuroj por malsano kaj invalideco por oficistoj estas fakto ne tre konvena. Svislando ne konas tion aŭ lasas liberecon al la entreprenoj aŭ privataj kaso, tion organizi.

Interesa, kvankam duagrada laŭ graveco, estas la labor-metodoj, kiujn aplikis la Centra Oficejo. Fondita de entuziasmuloj, la Asocio havis siajn „infanmalsanojn“ rilate je organizaj detaloj kaj metodoj. Ankaŭ la Centra Oficejo estis vera batalkampoj de ĉiaspeca eksperimentado de labor-metodoj kaj sistemoj. La malmultaj rimedoj ne permesis aĉeti modernajn ilojn por maŝina laborado. Ankaŭ sperto devis esti akirita. La manio organizi ĉion kaj kion ajn, trovis do eblecon furiozi, ĝis kiam post malbonaj spertoj oni revenis al la elementa vero, ke ju pli simple estas la metodo, des pli reala estos la efiko.

Valoras retiri el la forgeso kelkajn el tiuj „eksperimentoj“. Unu el ĝi estas la decimala (po-deka) klasigado. Malnovaj membroj retrovas la aplikon de la sistemo de l' Internacia Bibliografia Instituto en Bruselo, sur la bazo de la teorio de Dewey. Ĉiu loko havas sian numeron. Ni sekvas la klarigon laŭ la unua Jarlibro 1908. Ekzemple: 44434,2 — tio signifas, ke la unua 4 montras Eŭropon, la du 4 montras Francujon; 3 montras Departementon Saône-et-Loire; la kvara 4 montras la regionon de Louhans (kvara regiono de tiu ĉi Departemento). Fine la 2 post la komo montras la subregionon de Saint-Germain-du-Bois, kie ni havas Delegiton.

Grandioza, ĉu ne? Laŭ tio la lokoj en la Jarlibro havis ciferojn, erare kelkfoje prenitajn por la nombro de lokantoj. Ne imagu al vi, kiom da cerbumado necesis, por difini la korektan decimalan klasignumeron por iu ajn loko. Sed la tiama oficejestro nur sekvis manion tre disvastigitan: Ĉion premi en kesto, meti — se eble — kabalistan ciferon, kompreneblan nur al specialistoj, glui ŝildeton kun se eble latina surskribo kiel en apoteko. Tri jarojn preskaŭ daŭris tiu cifermado, ĝis la nuna Prezidanto per eleganta puŝo forigis tiun ĉi balaston.

Alia provo estis la Esperantista mono. Geneva scienculo, Profesoro de Saussure (posteulo de la fama naturisto H. B. de Saussure, kiu unue supreniris al la Monto-Blanka), elpensis konsistemon kun Esperanta nomo. Estis la Spesmilo, kiu valoris 2,50 Frankojn orajn proksimume, aŭ pli precize, 10 Spesmiloj egalas 1 Funton, laŭ tiama bazo. UEA uzis tiun sistemon de kalkulado apud la enlanda mono. En

la tiama librotendado troviĝis kolono por tiu ĉi malfeliĉa Spesmilo. Pli kompatinda estis la librotendado, ĉar la homoj, kun kiuj ni rilatis, nature kalkulis laŭ sia mono, ni laŭ la nia, kaj kiel nekonata fantomo ŝvebis super ĉio la Spesmilo. Ankaŭ tiun infanmalsanon de UEA kuracis la nuna Prezidanto kaj povis sin apogi tiom sur la teoriajn erarojn de la sistemo kiom sur praktikaj spertoj de Oficejo dum jaroj laborinta pri kaj kun la Spesmilo. Al la bonintencaj samideanoj, kiuj intencas refondi Spesmilan Bankon, valoras la diro: Spertiĝas saĝa homo per eraro de aliulo — Neniam per la propraj lernos ja la malsaĝulo.

Unu el la tre gravaj laboroj estas la konservo de la korespondado. Jam aliloke ni diris, kiom ampleksa estas relative kaj proporcie la korespondado en Esperantista Oficejo. Ampleksa kiel tiu ĉi korespondado estas en certa grado ankaŭ la manko de ordo ĉe la Esperantista publiko. Sekve, por atingi maksimumon de bonordo, necesas taŭga sistemo de klasigado. Nu, ekzistas pluraj, kaj la Centra Oficejo provis ilin. Unu el ĝi estis la klasigo laŭregiona. Belaj kovertoj kun nomo de lokoj servis por konservi la korespondadojn kaj la kopiojn de la respondo. Nigraj skatoloj el kartono enhavis la alfabeto ordigitan koverton. Povas esti, ke en certaj branĉoj komercaj tia sistemo estas nepre uzinda, eble la sola. Ni mem havis okazon, tion konstati en entrepreno tre grava, kie oni laboris tiel. Sed temis pri komercaj firmoj, kiuj ne ŝanĝas la logikon de tago al tago, simile al migrantaj birdoj. Por movado kreita de junuloj daŭre ŝanĝantaj lokon tiu ĉi sistemo havis nur malavantaĝojn. Estis denove S-ro Stettler, kiu (versajne kolera ne trovinte lerton de kara samideano) forigis tiun labormanieron kaj metis pli simplan je ĝia loko.

Plej laboriga kaj tempoperdiga estis la membrokontrolado. La Oficejo laboris nur laŭ listoj, kiujn sendis la Delegito. Post enskribo ĉe la Centra Kaso, kiu donis sinsekan numeron laŭ alveno al ĉiu ano, la membrolisto estis klasigita laŭregione kaj laŭlande. Kompreneble la malalta kotizo ne rajtigis starigi la sole eblan sistemon, tiun de persona slipo, la ĉefa kun la numero de la membreco, la dua laŭ la alfabeto vico. Tiu ĉi sistemo enkondukita en 1913 montriĝis la plej taŭga. Novaj manieroj ja ekzistas, sed la principo mem restas la sama.

Post la milito kaj pli precize post 1924 ni iom post iom modernigis la oficejon. Idiota laboro estis la skrib-

ado de adresoj por la ekspedo de „Esperanto“. Ankaŭ por tiu ĉi detalo ni provis ĉion: Manskribado (pradiluvia procedo), skribado per maŝino kun kopioj por kelkfoja sendo, tipografia presado, starigita je unu tago, kun fundamenta listo en libro, sur kiu oni notis la ŝanĝojn. La adresoj de novaj abonantoj estis maŝine skribitaj, ĝis nova kompostado de la listo ŝajnis necesa. Tiu ĉi sistemo estis relative la plej bona kaj eĉ ankoraŭ nun uzebla. Sed estas konata fakto, ke presisto neniel emas je la presado de tiaj listoj, kies kostoj ĉiam estas tro altaj. Ankaŭ malhelpis en certa grado niaj tro variaj nomoj, kun supersignoj ĉiulingvaj, ktp. La kresko de la nombro de abonantoj devigis nin anstataŭi tiun procedon per alia pli racia. La solvo estis la akiro de la adresmaŝino usona „Eliott“, kiu post sepjara praktikado meritas la noton „tre bona“. Longe ni studis la diversajn maŝinojn kaj modelojn, ĝis ni venis al la menciita. Siatempo ni faris kalkulon, kiom kostas unu adreso por tuta jaro de „Esperanto“; la sumoj estis: *Tipografie* 0,44 Fr., *per skribmaŝino* 0,27 Fr., *per adresmaŝino* 0,10 Fr. (En lasta sumo estas enkalkulita la amortizo de la instalado dum daŭro de kvin jaroj.)

La maŝino por permana funkciado estas nun anstataŭita per tia funkciigebla per piedo, kio permesas laboradon de unu persono anstataŭ du kiel kun la alia, okaze de preso sur bendoj servantaj por la ekspedo.

Ĉefa fako de nia Oficejo estas la kaso kaj la librotenado, ne pro la „kolosaj“ sumoj, kiuj eniras, sed pro la simpla vero, ke ankaŭ idealisma afero laboru laŭ seriozaj principoj. La librotenado de UEA post pluraj provoj laboras laŭ la simpla sistemo de amerikana librotenado (tabelara), alfarita laŭ la bezonoj de nia speciala agado. De 1915 ni uzas tiun procedon (firma libro kun kontslipoj movigeblaj), kaj malgraŭ afablaj invitoj ni opinias ne necese forlasi ĝin. Verdire ni esploris la enkondukon de „racia“ moderna sistemo. La nesufiĉa unuformeco de la prilaborataj negocoj ne konsilis ŝanĝi. Iam, kiam UEA havos la dekoblon de nuna membraro kaj logike la dekoblon de negocoj enskribotaj, tiam oni povas pensi je maŝina librotenado. Granda avantaĝo estas, ke ni povas aŭtomate trovi ĉiun membron, kiu pagis la kotizon, la manieron, la kiel kaj kiam. Tio sufiĉas.

Hodiaŭ post 25 jaroj la Oficejo de UEA prezentigas inde, orde kaj responde al sia celo. Impresa estas la slip-

aro de la membroj, fidela barometro de la Esperantista aktiveco kaj oferemo. Konvinka por ne-Esperantista vilitanto estas la meblaro por la korespondado. Hazarde elirita klasilo de persa, ĉina, japana, pola, greka, turka Delegitoj pravas la uzeblecon de la lingvo kaj la unuformecon de la negocokorespondado en tiu ĉi lingvo. Entuziasmiga estas la biblioteko, kie Esperantisto vidas bone ordigite en nigraj skatoloj kun surskriboj la trezorojn de nia literaturo.

La komenco de UEA estis pli ol modesta, oni povas diri eĉ primitiva. Cambreto en la tiama oficejo de la Internacia Scienca Asocio Esperantista, unuigo subtenita finance de bonhava Genevano René de Saussure, devis sufiĉi. La Oficejo troviĝis en la banka kvartalo, kontraŭ la Victoria-Hall, domo, en kiu malfermiĝis la 17a kongreso 1925. Sed jam unu jaron poste UEA luis oficejon en la Rue de la Bourse, kie ĝi restis ĝis 1919, por iri al Berno. Reveninte al Genevo pro la Ligo de Nacioj kaj aliaj kaŭzoj, ni trovis oficejon denove en sama kvartalo, kontraŭ la teatro, sekve Boulevard du Théâtre. Tie ni restis dum naŭ jaroj. Neklaraj kondiĉoj pri daŭrigo de la luo kaj ĉefe la manko de spaco devigis al solvo. Ja ne mankas loĝejoj (vere Genevo neniam konis veran mankon de loĝejoj), sed UEA estas pretendema. Hela, granda, kvartalo deca kaj ĉefe ne multekosta. Post ekzameno de dudeko da loĝejoj ni trovis la nunan oficejon, kie ĉiuj kondiĉoj almenaŭ ĝis 75% laŭ niaj deziroj kuniĝis. Ĉefe gravas spaco, ĉar oficejo, kiu ekzistas 25 jarojn, posedas multon, kion oni ne simple povas forjeti. Ne plu estas la infano de 1908, sed la plenkreskulo de 1930. Oni fine trovis tion, kio vere taŭgas. Neniam ni havis ejon por okazaj kunvenoj. La biblioteka ĉambro en la turo, malfacile uzebla alie, estas kvazaŭ konstruita por tiu ĉi celo. La fino de sia 25-jara ekzisto UEA troviĝas en loko deca kaj inda kaj kio gravas je kondiĉoj agrablaj. Por ŝpari monon, ni subluas oficejan spacon, oferante komforton kaj belaspekton.

Konkludo

La nuna historia skizo malkompleta kaj ŝparema tuŝis la ĉefajn erojn de tiu granda aparato, kia fariĝis UEA. Mankas en la skizo resumo de la eksteraj klopodoj de la Asocio ĝis Helsinko, inter tio la tre grava provo, atingi pere de la Ligo de Nacioj oficialan rekomendon. Mankas ankaŭ en ĝi detaloj pri la konferencoj teknikaj, kiujn parte organizis UEA sub la gvido de Dro Privat. Mankas ankaŭ

informoj pri la sinteno de nia Asocio al aliaj Esperantistaj organizaĵoj, precipe al la fratoj, tio estas la fakaj societoj, kun kiuj UEA ja havas regulajn kaj valorajn rilatojn. Ĉio tio igus la nunan rerigardon tro granda. Aliflanke tiuj historiaĵoj meritas foje pli kompetentan priskribon, ol povas tion fari tia resumo.

Estas nia deziro, ke atenta leganto trovu tie ĉi informojn, pri kiuj mankis al li ebleco sciigi, ke li havu la impreson pri la nepre bona volo de la Estraro de l' Asocio, fari la maksimumon por plenumi la taskon, kiun konfidis al ĝi la Statuto. Ĝi servu plie, eklumigi certajn faktojn, pri kiuj la rapide iranta tempo pasas. Kaj se rezultas el atenta legado plifortiĝo de la intereso al la Asocio kaj ĝiaj laboroj, tiam la kompilinto opinias tion plej valora kompenco por la laboro plenumita.

Intereseĝa libro japana posedinda eĉ de
ne-japanlingvaj Esperantistoj
estas la nova verko:

PRAKTIKA GUIDO DE LA KORESPONDO EN ESPERANTO

verkita de Yoshi Ishiguro
Eldonita de Bunrishoin, Tokio

Moderna kovrilo, solida bindo, bela preso kaj luksa papero, multaj ilustraĵoj kiuj ekzempligas la instruon

Prezo: 5 Fr. svis. afrankite

Mendebila ĉe eŭropa deponejo:

Libroservo de UEA, Genève

H. HODLER

Direktoro de U. E. A.

Kiel nin organizi?

STUDO KAJ PROPONO

pri la Organizo de la Esperanto-Movado



LEONARD ADAMCZEWSKI

1912

UNIVERSALA ESPERANTIA LIBREJO

10, rue de la Bourse, GENÈVE

Prezo: 10 Sd.

Kiel nin organizi?

STUDO KAJ PROPONO

pri la Organizo de la Esperanto-Movado

I

La neceseco de organizo por ĉiu ajn movado havanta socian celon estas tiel ĝenerale rekonata, ke insisti pri ĝi estas ja tute superflue. Sed se pri la *principo* de organizo akordigas ĉiuj, ĉesas tiu akordo, kiam oni devas decidi pri *formo* de tiu organizo. Tiam, se oni volas eviti haoson, estas necese ne sole empirie krei diversspecajn organizaĵojn, sed ankaŭ scii antaŭvili, kiamaniere ili interrilatos kaj dependos unu de la alia, tiel ke ili estu harmoniaj partoj de unu tuto, sed ne memstaraj centroj sin reciproke konkurencaj kaj malhelpantaj. Starigi organizaĵojn, voĉdoni regularojn, disdoni novajn titolojn, ne signifas krei ordon. Ordo estas atingata nur, kiam ĉiuj organizaĵoj rilatantaj al sama movado havas klaran propran taskon kaj povas harmonie kunlabori. Tiu harmonio ne devas esti sole la rezultato de la bonvolo de l' individuoj, esence ŝanĝiĝema, sed la rezultato de la organizo mem de la institucioj.

En la plimulto de la movadoj, la demando pri organizo elvokis disputojn, ofte tre akrajn, ĝis pli-malpli definitiva ordo povis esti starigita.

Ankoraŭ en la periodo de diskutado staras nun nia movado. Kompletan harmonian organizon ĝi ne ankoraŭ havas, sed multajn disajn organizaĵojn, pli-malpli fortajn, kun pli-malpli difinita tasko.

Sed antaŭ ol vidi, kiamaniere tiu organizo povas esti realigata, estas utile ekzameni, kiuj organizaĵoj nun ekzistas, en kia vico ili naskiĝis, kiun bezonon ili celas respondi. Estas evidente, ke la maniero, laŭ kiu estis kreitaj la ĝisnunaj organizaĵoj kaj rigardo super ilia nuna laboro, estas valoraj montraj por la estonteco. Vivkapabla ordo estos

starigebla ne per detruado de ĉio ekzistanta kaj rekonstruado de io nova neelprovita, sed per kunligado kaj unuigo de tio, kio ekzistas kaj pri kio la sperto montris, ke ĝi havas realan utilon.

* * *

Se oni trarigardas la historion de Esperanto, oni konstatis, ke jam ofte la demando pri organizo okupis la atenton de niaj samideanoj. Jam frue, kiam la nombro de la Esperantistoj ne superis milon, ili sentis la bezonon kunigi siajn disajn fortojn per organizo. Oni konas la malfeliĉajn provojn de „Ligoj de la Esperantistoj“, starigitaj en tiu tempo. Sed la malsukceso de tiuj cetere tre malfirmaj kaj neregulaj organizaĵoj ne venas de tio, ke organizo de la Esperantistoj estas neebla aŭ nedezirinda, sed de tio, ke ili estis starigitaj sur principoj, kiuj povis nur detrui ilin.

La „Ligo“, efektive, celis samtempe la propagandon kaj la reformadon de la lingvo, t. e. du celoj absolute kontraŭaj. La lingva unueco estas la unua kondiĉo por ĉia progreso de nia movado, kaj ĉiu Esperantista organizaĵo, kiu volos vivi, nepre devos konsideri la lingvon kiel faktoron ekster diskuto. Oni ne devas miri, ke — ne atentinte tion — la „Ligo“ pereis meze de senfinaj lingvaj diskutoj. Almenaŭ al la lasta el ili oni ŝuldas la decidon, ke la lingvo restu senŝange — kio fine permesis al la Esperantistaro sin dediĉi al pli fruktoparta laboro.

La „Ligo“ estis provo de internacia organizaĵo konsistanta el individuoj. Post ĝia malsukceso oni provis alian vojon, nome organizi la Esperantistojn laŭ la teritorio, sub la influo de tiu ideo, ke la kondiĉoj de propagando (oni ĉesis paroli pri reformado, sed ne ankoraŭ parolis pri uzado) esence varias laŭ la landoj kaj lokoj, kaj sekve postulas memstarajn organizaĵojn. Jam ĉirkaŭ 1896 ekzistis kelkaj Esperantistaj grupoj — la unua organizaĵo en nia movado — kaj en 1898 fondiĝis la unua nacia societo kun propra organo. Tiu societo, kiu limigis sian agadon al Francujo, celis la propagandon kaj la instruadon de la lingvo, kaj la klopodojn de la oficialaj aŭtoritatoj. Laŭ la ekzemplo de Francujo, la Esperantistoj de aliaj landoj starigis similan nacian societon.

Je la epoko de la Bulonja Kongreso ekzistis kelkaj naciaj societoj kaj sufiĉe granda nombro de grupoj. Tiam denove aperis proponoj por internacia organizo de la Esperant-

istoj. Unuj deziris nur lingvan aŭtoritaton por gardi la unuecon de la lingvo; aliaj deziris lingvan kaj propagandan organizaĵon. Ni rimarku, ke tiam oni tute ne parolis pri uzado. Oni scias, kio okazis. La Kongreso voĉdonis la Deklaron pri Esperantismo, laŭ kiu la lingvo estis fiksata per la Fundamento, kaj por konstati ĝian evoluadon, ĝi elektis Lingvan Komitaton; la aliajn projektojn ĝi ne diskutis. Cetere la Kongreso estis videble kontraŭa al ĉiu aŭtoritato, kiu direktus la propagandon. Ni atentu, ke la Kongreso, laŭ sia deveno, tute ne havis leĝdonan povon. Ĝi konsistis simple el la personoj povantaj veturi al la kongresurbo, kaj rajtis nur esprimi dezirojn. Ĝi estis konsiderata pli kiel festo kaj manifestado, ol kiel labora kunido. Estas do klare, ke la Kongreso, kiu ne reprezentis la organizitan Esperantistaron, ne povis starigi oficialajn organizaĵojn, kiuj havus aŭtoritaton por la tuta Esperantistaro. La Lingva Komitato, ekzemple, havas nur moralan aŭtoritaton, kiu estos tiom pli granda, kiom pli influaj per siaj verkoj estas ĝiaj membroj, sed leĝdonan povon ĝi ne havas — pri kio ni cetere estu feliĉaj.

Kelkan tempon post la Bulonja Kongreso, dank' al privata iniciato, fondiĝis en Parizo *Centra Oficejo Esperantista*, kiu celis faciligi la preparajn laborojn de la Kongreso, servi kiel sekretario al la Lingva kaj Kongresa Komitatoj, kolekti statistikajn informojn pri la Esperantista movado. Kiel ĝin konigis D-ro Zamenhof, tiu institucio estis privata. En Genevo, la dua Kongreso konfirmis la Lingvan Komitaton, starigis Konstantan Komitaton de la Kongresoj por prepari ilian tagordon, kaj difinis, ke la sekretarioj de tiuj institucioj sidos provizore ĉe la Centra Oficejo en Parizo.

Kiel ni supre vidis, la Kongreso ne reprezentis la Esperantistaron — kiu ne estis organizita — kaj ĝi ne havis la povon oficialigi, ĉar oficiala ĝi mem ne estis. Oni do ne komprenas, kial je tiu tempo oni komencas paroli pri *oficialaj* institucioj Esperantistaj, kvazaŭ la Esperantistaro estus enŝermata en ia organizaĵo. La strangeco kaj danĝero de tiu situacio aperis sufiĉe dum la Delegacia afero por ke ni bezonu reĝistri pri ĝi.

Ni konstatas, ke ĝis nun oni parolis nur pri propagando kaj lingvo. Post la spertoj de la Delegaciaj faktoj, aperis la neceseco de l'uzado de la lingvo, kio estas fakte la celo de nia movado. Montriĝis en plej alta grado la bezono de internacia organizo de la Esperantistaro. El tiu postulo

kreiĝis UEA. En tri jaroj ĝi grupigis 8000 personojn el ĉiuj landoj, kio reprezentas la pli grandan parton de la tuta Esperantistaro, kaj ĝi laŭpove laboris. Flanke de ĝi organiziĝis kelkaj fakaj societoj, sed oni povas konstati, ke la plimulto el ili estas en la realeco nenio alia ol propagandaj societoj, kiuj anstataŭ agi ĉe iu loko, agas internacie ĉe iu fako. Ili do ne estas plene kompareblaj al UEA.

Post la kreo de UEA oni daŭris sin okupi pri internacia organizo. La institucioj nomitaj „oficialaj“ estis fakte tiel malmulte oficialaj, ke iliaj monrimedoj havis privatan fonton. Venis do la neceseco facile komprenebla ilin certigi en pli konstanta maniero. Plie, la sukceso de UEA konvinkis multajn, ke regula internacia organizo estas ebla — kion ili antaŭe neis — sed, pro homa eco tre ofta, ili juĝis pli bone imiti la organizaĵon de UEA kaj provi la kreadon, flanke de ĝi, de nova internacia organizaĵo. En Barcelono la demando estis denove agitata, kaj oni decidis krei nur Financan Konsilantaron.

En Antverpeno (1909) la Kongreso transformiĝis en rajtigitan delegitaron de la propagandaj organizaĵoj kaj elektis komisionon por studi la organizaĵan demandon por la proksima kongreso. Ni bone rimarku, ke la kongresa rajtigita delegitaro ne reprezentas la tutan Esperantistaron, kiel oni kelkfoje erare diras, sed nur la propagandajn organizaĵojn, kiuj elektis ĝin. En tiuj organizaĵoj ekzistas multaj personoj, kiuj ne scias la lingvon kaj tial ne estas Esperantistoj (laŭ la Bulonja deklaro, kiu estis sankciita de la rajtigitaj delegitoj mem). Aliparte ni vidis, ke flanke de la propagando reprezentata de la grupoj, naciaj societoj kaj kongresaj institucioj, ekzistas la uzado reprezentata de UEA, kiu kunigas uzantojn de la lingvo kaj sekve enhavas nur Esperantistojn. La propagandaj organizaĵoj estis ĝis nun organizitaj nur loke kaj nacie (ĉar propagando kaj instruado de la lingvo estas ĉefe lokaj kaj naciaj aferoj), dum, UEA estis organizita internacie (ĉar la uzado de Esperanto estas esence internacia afero). Se oni nun kreas internacian propagandan organizaĵon, tiam estos du memstaraj organizaĵoj internaciaj, unupartite la jam ekzistanta UEA, aliparte la dirita propaganda organizaĵo. La neevitebla rezultato de tiu duco estos konkurenco kaj malordo. Kiel ni jam diris, la peresperanta kaj poresperanta flankoj de nia movado ne estas tiel apartigitaj, ke por ĉiu el ili ni povu havi unu specialan organizaĵon. Ambaŭ organizaĵoj sin turnos proksimume al la sama publiko kaj laboros kun la samaj personoj; ambaŭ bezonos

monon, subtenon kaj laborantojn — tiom da kaŭzoj por konkurenco kaj disperdo de fortoj. Mi ne kredas, ke la Esperantistaro estas preta pagi internacie de kotizaĵojn por la plezuro havi du instituciojn, kiuj malhelpos unu al la alia kaj sekve pligrandigos la konfuzecon de la organizo de nia movado, jam tiel komplika ke el dek Esperantistoj la duono komprenas nenion pri ĝi kaj la resto ofte eraras. Organizi la Esperantistaron sur la ekskluziva bazo de la propagandaj institucioj estus eble ĉe la epoko de la Bulonja kaj Geneva Kongresoj, ĉar oni tiam celis nur propagandon. Nun, oni komprenis kaj konstatas, ke estas io alia, egale interesa kaj grava por la estonto de nia movado, nome la internacia uzado de Esperanto, por kiu estis kreita speciala organizaĵo. Diru, ke unu estas oficiala kaj la alia privata afero estas facila aserto, kiun neniu fakto pravigas. Rilate al la Esperantista movado nenio estas oficiala ĉar tiu movado ne estas organizata. Propagando kaj uzado ne reprezentas du malsamajn movadojn. Ili estas intime ligataj unu al la alia, sin reciproke helpas kaj kompletigas. Por ke tiu solidareco ne estu sole teoria, sed praktika, estas necese, ke ĝi troviĝu en la institucioj mem.

Restas do nur unu solvo, se oni volas veran ordon, nome organizo de nia tuta movado. Tiuj vortoj povus al kelkaj supozigi grandegan laboron. En la realeco, oni devas malpli organizi, ol kunligi, reguligi, harmonie vivigi sub sama tegmento ĝis nun disajn organizaĵojn.

Antaŭ ol transiri al la praktika realigo de tiu ideo, konvenas rememorigi la elementojn de la solvata problemo:

En la organizo de la Esperanto-movado devos havi lokon laŭ vico de naskiĝo:

La propagandaj organizaĵoj, t. e. la grupoj plej ofte kunigitaj en naciaj societoj, kiuj en kelkaj landoj estas forte organizitaj.

La lingvaj institucioj kiel la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio.

La kongresaj institucioj kiel la Konstanta Komitato de la Kongresoj, la Esperantista Centra Oficejo kun ĝia Administrativa Konsilantaro (anstataŭanta la Financan Konsilantaron), kaj la kongreso mem.

UEA reprezentanta la uzadon de Esperanto.

Fakaj societoj, ĉu enkorporigitaj en UEA, ĉu memstaraj. Plie, ni rimarku, ke internacie unu el tiuj institucioj, nome UEA, jam havas por si mem elproviditan kompletan organizon kaj kunigas grandan parton de la Esperantistoj.

Ni vidis, ke por atingi harmonian organizon de la Esperanto-movado, ni ne bezonas krei novajn organismojn — kiuj povus nur pligrandigi la nunan konfuzon — sed nur kunligi tiujn, kiuj ekzistas, difini al ili precizajn taskojn kaj ebligi ilian kunlaboron en la intereso de l' tuta movado.

Ni aliparte konstatis, ke en tia organizo devos trovi lokon la naciaj societoj, kun siaj grupoj, UEA kaj la fakaj societoj, la kongresaj kaj lingvaj institucioj. (Centra Oficejo, Kongresa Komitato, Lingva Komitato ktp.).

Unu el tiuj institucioj, nome UEA, estas jam internacie organizita. Ĝi kunigas la pli grandan parton de la aktiva Esperantistaro (8000 membroj pagantaj individuajn kotizaĵojn, interŝanĝe de kiu ili rajtas difinitajn servojn) kaj ĝi estas tiamaniere organizata, ke interne de ĝi povas ekzisti memstaraj grupoj por pli specialaj interesoj. Dank' al la deziresprimo, jam parte realigita, de ĝia dua kongreso, la pli multaj fakaj societoj povos facile enkorporigi en UEA, konservante sian memstarecon kaj tamen ĝuante la profitojn de jam ekzistanta kaj elprovida organizaĵo. Dank' al la uzebleco de iniciatraĵoj kaj referendumrajto, posedataj de la Delegitoj regule balotataj de la membroj, ĝi estas starigita sur vere demokratia principoj. Dum 1911 ĝia Jarlibro estis disvastigata je 8000 ekzempleroj kaj ĝia oficiala organo je 3000; la movado de la korespondaj atingis 40 000 kaj de la spezoj 12 000 Sm. (sen la ĵurnalo). Tiujn ciferojn ni neniel citas pro fanfaronemo — kiu havus nenian sencen, se oni konsideras la grandan laboron, kiu restas plenumota — sed por montri, ke kompari UEA al unu el la pli-malpli firme ekzistantaj fakaj societoj kaj rigardi ĝin kiel flanklasindan faktoron en la organiza demando, estas granda eraro de juĝo.

La supre cititaj ciferoj estas sendube per si mem ne altaj, sed en la nuna stato de la Esperanta movado, ili estas tamen atentindaj.

Nu, ni asertas ke flanke de tiu institucio, funkcia post multe da penoj, starigi novan internacian organizaĵon, kiu sin turnos proksimume al la sama publiko, agos kun la samaj laborantoj en la plej multaj okazoj, publikigos oficialan jarlibron kaj oficialan ĵurnalon, kaj — se ĝi volas vivi — devos organizi servojn, estas simpla absurdaĵo, precipe kiam oni konas la ankoraŭ modestan staton de la Esperantistaro, la malfacilaĵojn por starigi seriozan kaj viv-

kapablan organizaĵon. El organiza vidpunkto, ĝi estas plia konfuzajo; el financa, ĝi estas malutila malŝparo, kiun nia movado certe ne bezonas. Konkurencon UEA certe ne timas por si mem, se oni ĝin trudas al ĝi, sed ni demandas ĉiun saĝan Esperantiston, en la momento kiam oni ankoraŭ povas ĝin eviti, ĉu la kunlaborado, kiun ni proponas, ne estas pli bezonata, ol interna konkurado kaj batalado, kun ĉiuj iliaj ordinariaj konsekvencoj?

La plej elementa saĝo konsilas, ke anstataŭ starigi novan pezan organismon kaj rekomenci laboron, kiu jam estis farata, plej praktike estas, uzi tion, kio ekzistas kaj ĝin kompletigi, se bezone, evitante tiel ĉian malŝparon aŭ duoblan uzon de fortoj multe pli utilaj por ekstera agado.

Kia estas la solvo prezentata de UEA?

Ĝi proponas, ke la diversaj ekzistantaj organismoj *kunfederiĝu* (ne kunfandiĝu!) sur la *bazo de UEA*, kies organizo jam estas elprovita de tri jaroj, kaj estas sufiĉe fleksibla por adaptiĝi al novaj bezonoj. Kiamaniere povas okazi tiu kunfederiĝo? Tiun demandon ni respondos, reprenante la projekton, kiu estis akceptita de la Komitato de UEA en Antverpeno, kaj ni ĝin akompanos per kelkaj pluaj klarigoj.

Fundamentaj principoj. — Ĉiuj ĝisnunaĵaj institucioj estas konservataj kaj kunfederiĝas sur la fundamento de UEA, kiu sekve havos kiel celon disvastigi Esperanton kaj per ĝi plifaciligi la rilatojn inter la homoj.

Tiu organizaĵo konsideras Esperanton kiel vivantan lingvon, kies prizorgo apartenas sole al la institucioj speciale kreitaj por tio.

Necese estas atenti, ke UEA, tiamaniere kompletigata, *ne mem* sin senpere okupos pri propagando kaj instruado de la lingvo, kiujn ĝi konsideras kiel pli speciale naciajn aferojn. La ĝenerala propagando kaj la instruado de la lingvo estos kiel nun prizorgataj de la *naciaj societoj* kaj iliaj grupoj, federacioj, ligoj ktp. Tiuj naciaj societoj, kiel ĝis nun, daŭros sin organizi kiel ili deziras. Ili do estos tute memstaraj.

La internacia organizaĵo, t. e. UEA kompletigata, sin limigos al la prizorgo de internacia propagando en la okazoj limigitaj, kiam kunagado estas necesa, al la arango de kongresoj, subteno de lingvaj institucioj, bibliografiaj kaj statistikaj servoj, interrilatado de naciaj societoj por demandoj de komuna intereso.

Organizo. — En ĝenerala maniero, la organizo de UEA restos la sama, kiel ĝi nun estas fiksita de ĝia Statuto, krom

pri la jenaj punktoj, en kiuj kelkaj ŝanĝoj estas necesaj pro la kunfederiĝo de novaj organismoj.

Komitato. — En la komenco ĝi havos dudek membrojn, t. e. la dek nunaj membroj de la Komitato de UEA kaj dek novaj, kiuj por la unua fojo estus elektotaj inter la Komitato de la Kongresoj, la Administra Konsilantaro, la estraro de la naciaj societoj. En la estonteco la Komitato estos regule balotata de la delegitoj kaj reprezentantoj (vidu poste). Ĝia tasko estos la sama kiel tiu de la Komitato de la nuna UEA, nome fiksi la ĝeneralan agadon de la Asocio laŭ la deziresprimoj de la Kongreso kaj la decidoj de la Delegitoj, difini la organizon de la diversaj servoj, kontroli ilian administradon, voĉdoni la regularojn sub rezervo de la aprobo per ĝenerala voĉdonado (referendumo), starigi la buĝeton, baloti la Direktorojn de la Oficejoj, la faktestrojn, la komisionojn ktp.

Oficejoj. — La du Oficejoj en Genevo (Centra Oficejo de UEA) kaj en Parizo (Centra Oficejo Esperantista) restas kiel ĝis nun. La unua sin okupos pri la praktikaj fakoj, la dua pri la propagandaj kun la tasko, kiun ĝi havis ĝis nun.

Delegitoj kaj reprezentantoj. — La *individua* kotizajo al UEA, kiel ĝi nun estas, estas konservata. La aliĝo estas laŭvola.

La Esperantistaj organizaĵoj, por esti oficiale enregistritaj en la oficialan jarlibron kaj havi la rajton elekti reprezentantojn, devos pagi specialan kotizajon (kiel la ĝisnunaĵaj Esperantiaj Entreprenoj havantaj Esperantistan karakteron), kiun oni ekzemple povus fiksi je 2 *Sm.* por cent membroj. Tiuj kotizajoj estos pagataj de la naciaj societoj.

La reprezentado de la Esperantistaro estos duobla:

a) Reprezentado de la Esperantistoj kiel individuoj, per la *Delegitoj* elektataj laŭ la ĝisnuna maniero uzata por la Delegitoj de UEA. Tiuj Delegitoj, kiel nun, kolektos la kotizajojn, zorgos pri la servoj ktp. Do, nenia ŝanĝo en tiu rilato.

b) Reprezentado de la Esperantistaj propagandaj organizaĵoj per la *Reprezentantoj*. Tiuj reprezentantoj estos elektataj de la naciaj propagandaj societoj, proporcie je la nombro de iliaj membroj. Oni kalkulos nur la membrojn, kiuj apartenas al la grupoj, kiuj pagis la kolektivajn kotizajojn supre preparolitan.

La Delegitoj kaj Reprezentantoj havus egalajn rajtojn. Ili voĉdonos pri la regularoj, partoprenus en la balotoj, laŭ

la samaj principoj ĝis nun aplikitaj en UEA (entenante referendumon kaj iniciataĵon).

Se oni legas § 3o kaj 3r de la Statuto de UEA, oni rimarkas, ke la institucio de reprezentantoj estis jam antaŭvidita por la fakaj organizaĵoj. Sufiĉos do anstataŭigi fakajn organizaĵojn per propagandaj kaj ŝanĝi la proporcion de la reprezentantoj, tiel ke ili estu proksimume samnombraj kun la Delegitoj.

La voĉdonoj kaj balotoj, kiel ĝis nun en UEA, estos ĉiam korespondaj kaj sekretaj. — necesa garantio por ĉiu serioza demokrata organizo.

Kongreso. — El tio, kio estas supre dirita, sekvas, ke ekzistas nur unu Kongreso. La Kongreso ekzamenas la agadon de la Komitato dum la estinta jaro, kaj, per deziresprimoj, fiksas la grandajn liniojn de la agado dum la venonta jaro.

La rajtigitaj delegitoj de la propagandaj organizaĵoj elektitaj en Antverpeno por la unua fojo, estus anstataŭataj de la Representantoj. Sajnas efektive tute ne necese nun komplikigi la organizon per elekto de specialaj dumkongresaj delegitoj. La Kongreso ekzamenas tion, kio estas farita dum la jaro kaj laŭ la raportoj, kiuj estas prezentataj al ĝi, esprimas dezirojn pri tio, kio estas farota dum la venonta jaro, lasante al la Komitato helpata de la specialaj komisionoj la taskon, ellabori la regularojn de la diversaj servoj sub rezervo de la aprobo de la Delegitoj kaj Representantoj.

La sperto montris, ke kongreso, kiu kunvenas nur dum kelkaj tagoj, ne povas detale diskuti regularojn kaj serioze pritrakti demandojn sub ĉiuj ĝiaj aspektoj. Ofte ĝi eĉ ne estas kompetenta por tio kaj tial sisteme akceptas ĉion, kion oni prezentas al ĝi, se nur ĝi estas lerte prezentata. Poste kompreneble naskiĝas protestoj. Pli proksima al demokrateco kaj ankaŭ pli justa estas la sistemo, laŭ kiu la lasta instanco estas la Delegitoj kaj Representantoj, voĉdonantaj hejme post interŝanĝo de ideoj kun siaj samloka samideanoj, anstataŭ rapide dum kongreso post pli-malpli brila parolado.

Financaj rimedoj. — La kolizaĵoj de la membroj estas speciale difinitaj por la fakoj prizorgataj ĉe la Geneva Oficejo (praktikaj servoj). La kolektivaj kotizaĵoj de la grupoj, alcentrigataj de la naciaj societoj, kiel ni supre vidis, estos difinitaj por la fakoj prizorgataj de la Pariza Oficejo (nome subteno de la lingvaj institucioj, bibliografio kaj statistiko, internacia propagando).

La donacoj (ekz. super 10 Sm.) povos esti difinitaj por tiu aŭ alia fako, laŭ la volo de la donacinto; se ne, ili estos egalparte dividataj inter ambaŭ Oficejoj.

Ni rimarku, ke ŝparoj estos fareblaj dank' al la unueco de organizaĵo (1). Oni efektive havos nur unu jarlibron, nur unu gazeton. Pli komunikajoj pri la laboro plenumata de la organizaĵo povos esti sendataj al ĉiuj Esperantaj gazetoj (kiel nun faras UEA), tiel ke la Esperantistoj estu regule informataj pri ĝi. Aliparte, la fakto, ke estas nur unu internacia organizaĵo certe helpos al la pligrandigo de la enspezoj, forigante ĉiun konkurencon pri tio. Male, la duco de organizo povus nur malinstigi la donacemulojn.

Fakaj societoj. — Dank' al la sistemo alprenita de UEA, povas interne de ĝi kreiĝi memstaraj fakaj sekcioj. Jam nun ekzistas tri el ili kaj oni povos pligrandigi ilian nombron laŭ la bezonoj. Tiuj fakoj memstare organiziĝas kaj laboras uzante la perecon de la ekzistanta centra administracio.

La fakaj societoj, kiuj havas partian aŭ religian karakteron, kompreneble restas absolute memstaraj kiel ĝis nun.

* * *

Tia estas, resumite, la esenco de la solvo proponata de UEA. Tiuj proponoj, fakte, konservas ĉiujn nunajn instituciojn, respektas la necesan memstarecon de la naciaj organismoj, faciligas ilian kunlaboradon en tiuj okazoj, kiam ĉi tiu estas necesa, kaj el la vidpunkto financa, ili simpligas, kaj ŝparigas, evitante ĉian neutilan konkurencon kaj ducon. Ni havas la konvinkon, ke kunfederigo de la nunaj organizismoj sur la jam ekzistanta kaj elprovida bazo, kiun ni proponas, certe enkondukos pli da harmonio kaj pli da ordo en nia movado.

III

Ni montris la ĝeneralan staton de la organiza demando kaj la solvon, kiun ni proponas, nome kunfederigo de ĉiuj Esperantaj fortoj sur la bazo de la jam ekzistanta UEA. Ni montris, ke tiu solvo estas praktika, facila kaj simpla. La Esperantistaro tute ne deziras la kreon de novaj organizaĵoj, nepre naskontaj novan konfuzon; ĝi deziras la kunligon de tiuj, kiuj ekzistas, kaj ordon, kiu estas la necesa kondiĉo por ĉiu plua laboro. Ĝi precipe deziras, ke la polemikoj kaj personaj disputoj ĉesu esti la unua priokupo de la Esperantistoj. Esperantismo ne bezonas politikaĉistojn, ĝi be-

zonas laborantojn. Al tiuj lastaj ni nin turnas. Ke al la unuaj eble ne plaĉas niaj ideoj, ni facile antaŭvidas, sed tio estas al ni plene indiferenta.

Restas al ni la tasko respondi al kelkaj argumentoj de la personoj, kiuj ĝis nun pli aŭ malpli kontraŭstaris al nia projekto.

La ĉefa el tiuj argumentoj estas, ke la poresperanta movado kaj la peresperanta estas tute apartaj kaj sekve por ĉiu el ili devas ekzisti speciala internacia organizaĵo. Ke la peresperanta agado estas malsama ol la poresperanta, ni ne asertas, sed ke ili estas tiel malsamaj kaj esence apartigitaj, ke ĉiu el ili bezonas propran internacian organizaĵon, estas tute kontestebla. La poresperanta kaj la peresperanta laboroj estas du aspektoj de la sama klopodado. Ili sin reciproke subtenas, helpas kaj kompletigas. Diri, ke la propagandaj organizaĵoj semas, dum UEA rikoltas, estas aserto, kiun nenio pravigas. Povas elmeti tiajn tranĉajn opiniojn nur la personoj, kiuj nenion scias pri UEA kaj ne havas la plej malgrandan ideon pri la malfacilaĵoj, kiujn ni renkontis en nia agado. Ĉu oni kredas, ke organizi servojn, funkciigi ilin en serioza maniero, kun tre malalta kotizaĵo, estas pli facile, ol aranĝi paroladojn kaj fari kursojn? Ĉu, same kiel UEA uzas la elementojn varbitajn de la grupoj, la propagandaj organizaĵoj, reciproke, ne profitas de la laboro plenumata de UEA por varbi novajn adeptojn kaj ilin allogi, ne pro amo al la teoria ideo de lingvo internacia, sed pro la servoj, kiujn ili ricevas — servoj grandparte aranĝitaj de UEA? La vero estas, ke meti unu kontraŭ la alia propagandajn organizaĵojn kaj UEA estas malutila laboro. Nia movado prosperos nur per ilia kunlaborado, kaj tiu kunlaborado estas praktike ebla kaj daŭra nur se ĝi havas kiel kadron komunan organizaĵon.

La teorion, ke ekzistas neta diferenco inter la poresperanta kaj la peresperanta agado cetere neas la faktoj. Ĉu la personoj, kiuj sin okupas pri la unua ne zorgas ankau pri la dua kaj ofte estas samtempe grupsekretarioj kaj delegitoj de UEA? Ĉu grupoj ne eldonas gvidfoliojn, aranĝas ekskursojn, zorgas pri varbado de komercaj firmoj; t. e. agas *per* Esperanto? Ĉu, kiam UEA faras servojn al firmo aŭ societo, ĝi ne plej bone agas *por* Esperanto, pruvante, ke ĉi tiu valoras ne sole per sia estonta, sed ankaŭ per sia estanta valoro? Ĉu ĉiu propaganda organizaĵo, kiu volas vivi, ne devas aranĝi praktikajn servojn?

La diferenco inter la du agadoj estas precipe teritoria. Dum UEA por siaj servoj estas ĉefe internacie organizita, la propagandaj kaj instruadaj servoj estas regione aŭ nacie organizitaj, ĉar ili varias laŭ la enlandaj cirkonstancoj. Tial, laŭ nia projekto, la naciaj kaj regionaj societoj konservas pri propagando kaj instruado sian ĝisnunan memstarecon; nur kiam ili bezonas interrilati aŭ havi komunajn servojn, ili uzas la perecon de la internacia organizaĵo.

Ni rimarku, ke se oni kreas internacian pure *propagandan* organizaĵon, oni starigas ion super ili kaj sekve forprenas grandan parton de la memstareco de la naciaj societoj. Tio ne okazas kun la principo de kunfederigo supre proponita.

* * *

Alia argumento, malpli teoria, sed tamen iam timeme formulita: „UEA volas ĉion ensorbi!“ „Se ni ne zorgas, ĝi nin ĉiujn englutos!“ tion ni aŭdis en Antverpeno de iu samideano. La personoj, kiuj tiel rezonas, tre certe neniam legis nian projekton. Se ili tion farus, ili konstatus, ke UEA nenion ensorbas. Ĝi ensorbus nur se ni proponus la kunfandigon, la nuligon de ĉiuj ekzistantaj organizaĵoj en UEA, sed nia projekto staras ĝuste sur mala ideo, t. e. sur la ideo pri kunfederigo. Sufiĉas ekzameni niajn proponojn por konstati, ke ensorbo estas neebla. Cetere, oni forgesas, ke UEA estas ne tiu aŭ alia persono, sed organizaĵo starigita sur demokratiaj principoj, kaj se iam ĝiaj kondukantoj ne agus konforme al la volo de la membraro, tiu ĉi havas facilajn kaj regulajn rimedojn por esprimi siajn dezirojn en nedubebla maniero.

La esenca demando, fine, ne estas ĉu tiu ĉi ensorbas tiun aŭ reciproke, sed ĉu la proponita sistemo de kunfederigo estas utila al Esperantismo.

* * *

Alia malkomprenigo estas pri la vorto „oficiala“. Oni timas, ke UEA, ĝis nun „neoficiala“, fariĝus tiamaniere „oficiala“. Ni tute ne vidas, kial UEA fariĝus pli aŭ malpli oficiala, ĉar la naciaj societoj rajtus elekti en ĝi reprezentantojn. Ĝi nur fariĝus pli kompleta. La vorto „oficiala“ povas ricevi tiel multe da interpretoj, ke ŝajnas preferinde ĝin ne uzi, ol komenci longajn pure teoriajn diskutojn pri ĝia apliko. UEA ĝis nun, estis tiel oficiala aŭ neoficiala kiel la aliaj institucioj de nia movado. Se ĝia organizo estas kompletigata, ĝia karaktero tamen ne ŝanĝiĝos.

Oni ankaŭ timas, ke la alpreno de nia projekto dividus la Esperantistojn en du klasoj: tiuj, kiuj apartenas al la internacia organizaĵo, kaj . . . la aliaj. Sed tio jam ekzistas nun, eĉ kun pli ol du klasoj. Estas Esperantistoj, kiuj apartenas al propagandaj organizaĵoj kaj al UEA, aliaj apartenantaj sole al propaganda organizaĵo, aliaj sole al UEA, aliaj apartenantaj al nenia organizaĵo. Tamen, ĉiuj rajtas sin nomi Esperantistoj, se ili — laŭ la Bulonja deklaro — scias kaj uzas Esperanton tute egale por kiaj celoj. Kunfederiĝo sur la bazo de UEA, ne ŝanĝus tion. La personoj, kiuj deziros uzi aŭ subteni la servojn de la Asocio, pagos la individuajn kotizaĵojn de UEA kaj partoprenos en la balotado de la Delegitoj; la personoj interesiĝantaj nur pri propagando aŭ instruado aliĝos al grupoj kaj naciaj societoj, kiuj elektos reprezentantojn. Ĉar la delegitoj kaj reprezentantoj estos egalrajtaj, preskaŭ ĉiuj Esperantistoj estos pere aŭ senpere reprezentataj, al kiu ajn organizaĵo ili apartenos. Kompreneble, la personoj, kiuj volos partopreni en nenia organizaĵo, neniel povos esti malhelpataj, sed oni konfesos, ke ili ĝis nun en nia movado estis vere malmultaj.

* * *

Kiamaniere estas realigebla nia projekto? Ni jam rimarkis, ke ĝi alportas relative malmulte da ŝanĝoj en la nuna organizaĵo de UEA ĉu de la ceteraj organizaĵoj. Sufiĉus unupartite precizigi, ke UEA sin okupas ne nur pri aranĝo de servoj per Esperanto, sed ankaŭ pri diskonigo de Esperanto; tiu lasta tasko estos plenumata ne de UEA rekte, sed de la naciaj societoj kunfederitaj en ĝi. Por fakte tiun kunlaboradon, estus necese, ke la naciaj societoj povu elekti reprezentantojn, kiuj havos la rajtojn antaŭe priskribitajn.

Tiuj aldonoj estos proponataj al la ĝenerala voĉdonado de la Delegitoj de UEA, tuj kiam la propagandaj organizaĵoj, per sia kongresa rajtigita delegitaro, akceptos la kunfederiĝon kun UEA. Tiamaniere, sen rompo kaj per regula vojo, la unueco estus atingata. La Komitato, pligrandigita en la maniero, kiun ni priskribis, reguligus la aliajn punktojn pri interligo de la diversaj ekzistantaj institucioj kaj diskonigo de la organizaĵo en ĝia kompletigita formo.

* * *

Jam de multaj jaroj la Esperantistaro diskutadas pri organigo. Dum ĝi diskutadas, enmiksante necviteble la per-

sonajn demandojn, ĝi sin ne dediĉas al alia laboro. Tia senĉesa diskutado estas tiom da tempo perdita por pozitivaj taskoj. Ni havas la okazon reguligi la situacion kaj meti finon al disputoj tiel tedaj kiel malutilaj.

Ni montris, ke anstataŭ konstrui novan organizaĵon, re-fari spertojn jam faritajn, plenumi duoblan laboron, pli saĝe, pli praktike, pli ŝparige estas uzi tion, kio ekzistas, kaj kunligi la nunajn organizaĵojn sur la bazo de UEA. Ni montris, ke tio povas efektiviĝi kun la minimumo de ŝanĝoj kaj iom da reciproka bonvolo. Ni havas la firman konvinkon, ke tiamaniere organizita nia movado plifortikiĝus, unue per la fino de la nunaj internaj bataloj, due per la nekontesteblaj profitoj, kiuj por nia agado rezultus el la unueco de organigo.

La Esperantistaro nun vidu, esploru kaj decidu!

*

La Komitato de UEA aprobis la tekston de la supra projekto (kunfederiĝo de la naciaj societoj sur la bazo de UEA), tian, kia ĝi estas formulata sur paĝoj 10, 11, 12, 13, 14 de tiu ĉi broŝuro.

====

La Komitato de U&A 1908—1933

(Steletoj indikas Prez. kaj Vicprezidantojn)

N o m o	1-a periodo 1908—1912	2-a periodo 1913—1919	3-a periodo 1920—1923	4-a periodo 1924—1927	5-a periodo 1928—1931	6-a periodo 1932—1934
Baudet, A., Paris						1932—1934
Behrendt, A., Berlin . . .		1913—1919				
Blaise, Paul, London . . .	1908—1912	1913—1919	1920—1923	1924—1927	1928—1931	1932—1934
Bouvier, P., Genève . . .				1926—1927	1928—1929	
Blicher, S-ino, Kopenhago			1920—1923	1924—1927	1928—1930	
Bujwid, O., D-ro, Kraków				1925—1927	1928—1931	1932—1934
Carles, A., Béziers	1908—1912	1913—1919	1920—1923	1924—1927		
Cseh, A., Hago					1928—1931	1932—1934
Dietterle, J., D-ro, Leipzig				—1927	1928—1930	
Edmonds, Ch., H., London				1925—1927		
Finholdt, F-ino, Oslo . . .			1920—1923†			

Fischer, H., Bucuresti . . .	1908—1912			1925—1927		
Gènermant, M., Moulin . . .			1920—1923	1924—1927	1928—1931	
*Hodler, H., Genève			1919—1920†			
Hetzel, H. W., P'delphia . .					1928—1931	1932—1934
Hromada, Rud., Praha			1920—1923	1924—1927	1928—1931	1932—1934
Isbrücker, I. R. G., Hago . . .				1925—1927	1928—1931	1932—1934
Jansson, S., Lidingö					1928—1931	1932—1934
Kandt, D-ro, Bromberg . . .	1909—1912†				1928—1931	1932—1934
*Karsch, Joh., Dresden		1913—1919	1920—1923	1924—1927	1928—1931	1932—1934
Kamaryt, D-ro, Bratislava . .						1932—1934
Křepelka, I., Vinkovci			1920—1923			
Linares, Paul, Cordoba	1911—1912	1913—1919	1920—1923			
Maruzzi, D-ro D., Zagreb . . .				1925—1927	1928—1931	1932—1934
Mees, D-ro H. C., Hago		1913—1919	1920—1923			
Medem, P., Kaunas				1925—1927†		
Mesny, R., Paris	1908—1909					
Metzger, D-ro M., Graz			1920—1923			
Meyer, Sam., La Rochelle . .	1908—1909†					

La Komitato de U&A 1908—1933

(Steletoj indikas Prez. kaj Vicprezidantojn)

N o m o	1-a periodo 1908—1912	2-a periodo 1913—1919	3-a periodo 1920—1923	4-a periodo 1924—1927	5-a periodo 1928—1931	6-a periodo 1932—1934
Minkov, St., Sofia			1920—1923	1924—1927	1928—1931	1932—1934
*Mudie, H. B., London	1908—1912	1913-1916†				
Nemseči, D., Tabriz					1928—1931	1932—1934
*Page, W. M., Edinburgh			1920—1923			
Parrish, D. E., Buffalo				1925—1927		
Petiau, Henri			1921—1923	1924—1927	1928—1931	1932—1934
Piño, A., Valencia					1928—1931	
*Privat, E. D-ro, Genève	1910—1912	1913—1919	1920—1923	1924—1927	1928—1931	1932—1934
Poncet, D-ro, L. Bourg					1928—1931	1932—1934
Rockmann, Fr., Magdeburg	1909—1912	1913—1919	1920—1923	1924—1927	1928—1931	1932—1934
Rousseau, Th., Dijon	1908—1912	1913-1917†				
Roy, G.	1909—					
Setälä, Vilho, Helsinki			1920—1923	1924—1927	1928—1931	1933—1934
Schmid, J., Bern	1908—1912	1913—1914				
Scholze, G., Reichenberg				1925—1927	1928—1931	1933—1934
Stamatiadis, D-ro, Atena			1920—1923			
Sós, D-ro E., Wien					1928—1931	
*Stettler, Ed., Bern			1920—1923		1928—1931	1932—1934
Stromboli, D-ro, Pisa	1911—1912	1913—1919				
Szabuniewicz, St., Moskvo	1911—1912	1913—1919	1920—1923			
Tellini, A., D-ro, Udine			1920—1923	1924—1927	1928—1931	1942—1934
Tolnai, Paul, Budapest						1932—1934
Tullo, D. R., Edinburgh						1932—1934
Vogler, W. A., Hamburg	1911-1912†					
Whitaker, D-ro	1909—					
Wollmann, D-ro, Wien						1932—1934
Zamenhof, Léon, D-ro, Warszawa			1920—1923			

La oficistoj de la Centra Oficejo de U&A 1908—1932

Nomo de l' oficisto	L a b o r k a m p o	Komencis — finis labori
Berthold, H.	Administrado de Esperanto	1911—1912
Bouvier, Ed.	Redakcio de Esperanto	1912—1913
Caburet, E.	Librejo-Ekspedado	1910—1911
Damon Pichat, F-ino, E.	Administrado ĝenerala	1920—1930
Damon Pichat, F-ino, J.	Korespondado, Librotenado	1923—
Drezet, H.	Administrado ĝenerala	1911—1911
Emery, S-ino, A.	Administrado de Esperanto	1910—1911
Fleck, Fr.	Ĝen. Sekretario	1912—1913
Geissler, Alb.	Administrado ĝenerala	1923—1927
Gürges, W.	Librejo — ekspedado	1912—1913
Humbel, J.	Administrado ĝenerala	1920—1923
Jakob, Hans	Administrado Direktado	1913—
Jakob-Notz, S-ino	Librotenado, kaso	1920—1923
Kapfer, F-ino, M.	Administrado ĝenerala	1928—
Kirkcaldy, S-ino	Administrado ĝenerala	1920—1920
Kocherhans, F-ino	Administrado ĝenerala	1923—1930
Loetzsch, Th.	Librejo	1912—1913
Lork, F-ino, E.	Administrado ĝenerala	1919—1920
Lucas, Fritz	Kaso-librotenado	1912—1914
Rehmann, Alf.	Administrado ĝenerala	1932—
Richez, Renaud	Admin. Redakcio, Kaso	1915—1923
Ring, F-ino, A.	Administrado ĝenerala	1913—1914
Rivollet, F-ino, R.	Administrado ĝenerala	1930—
Schild, André	Administrado ĝenerala	1928—1928
Sosnovski	Sekretario	1909—1910
Spiller, Jos.	Administrado : Sekretario	1912—1914
Stojan, Petro	Redakcio Biblioteko	1926—1930
Stučevski, V.	Librejo-Ekspedado	1910—1911
Vatré, Henri	Biblioteko	1931—
Virignin, F-ino, J.	Administrado ĝenerala	1913—1913
Zenišek, J.	Administrado ĝenerala	1910—1911
Zirlin, D.	Kaso Librotenado	1910—1912

La voĉdonoj de U&A 1919—1931

Jaro	Objekto de la voĉdonado	Numero de		Plimulto necesa	Voĉdonis		Partopreno	
		Deleg.	Voĉdonil.		Jes	Ne	Numero	%
1919	Novaj kotizoj	510	533	277	369	11	380	69
1920	Novajstatuto kaj komitato	630	779	263	512	5	525	67
1924	Nova Komitato	1267	1544	773	785	9	873	56
1928	Nova Komitato	1899	2322	545	974	115	1296	56
1931	Nova Komitato kaj Statuto-aldoj	2454	2715	629	1265	90	1365	50

U&A-Membraro 1920—1932

Landoj	1920	1921	1922	1923	1924	1925	1926	1927	1928	1929	1930	1931	1932
Albana											2	2	1
Aŭstria	43	103	172	166	253	283	239	243	315	326	316	285	273
Belga	72	67	74	77	83	160	187	243	289	314	315	297	292
Brita	677	708	714	659	722	706	719	735	745	702	704	687	653
Bulgara	45	125	112	111	217	210	164	200	218	191	178	150	99
Ĉeĥoslovaka . .	325	535	654	793	1015	1147	1225	1340	1361	1337	1309	1201	1194
Dana	71	70	75	77	75	77	89	80	80	82	75	76	80
Danzig	7	17	21	18	23	32	14	18	14	16	12	11	13
Estona	17	36	108	97	55	76	62	62	48	63	79	78	83
Finna	148	144	162	167	144	139	156	166	158	152	104	85	67
Franca	408	459	472	466	511	661	651	676	633	625	632	612	699
Germana	456	744	915	871	1741	1889	1419	1598	1403	1406	1374	1375	1185
Greka			1		44	15	5	14	10	21	32	37	23
Hispana	193	191	228	228	274	341	322	316	319	321	282	264	258
Hungara	95	189	144	148	188	250	192	135	117	120	134	143	131
Irlanda					11	13	13	19	14	7	9	6	
Islanda	2	3	4	5	4	7	6	11	10	7	8	18	13
Itala	106	166	168	171	226	338	390	369	302	265	309	303	255
Jugoslava	25	146	95	190	208	307	277	235	214	145	138	128	135
Latva	7	21	66	115	94	106	103	49	69	61	88	77	80
Litova	7	22	40	72	94	94	69	59	59	43	47	33	36

Nederlanda . . .	160	233	243	241	250	323	367	387	449	457	509	662	760
Norvega	59	59	42	37	40	39	40	35	37	45	36	41	49
Pola	131	312	344	239	311	484	303	296	352	422	390	450	418
Portugala	4	4	9	9	21	24	22	16	19	20	32	46	60
Rumana	8	90	182	246	382	318	301	320	350	268	224	213	141
Saarlanda	2	5	8	6	6	50	31	45	37	40	40	29	24
Soveta	11	10	47	40	49	9	13	17	25	23	23	20	19
Sveda	121	156	142	144	141	135	144	151	238	260	292	288	297
Svisa	125	189	210	203	227	261	249	258	258	256	253	235	236
Turka	30	67	26	13	13								13

Eŭropo	3350	4872	5478	5603	7411	8492	7759	8117	8148	8002	7944	7855	7593
Afriko	24	32	42	41	40	35	38	46	57	53	78	61	63
Kanado	22	23	24	20	21	19	26	24	24	34	31	24	29
Usono	244	281	245	213	264	305	343	311	366	551	507	414	363
Centr. Ameriko .	29	17	12	34	51	59	62	58	44	38	28	28	40
Suda Ameriko . .	65	123	101	101	106	109	100	117	129	105	133	121	181
Azio	54	96	157	205	230	274	246	285	255	260	239	244	234
Aŭstralio	57	120	194	115	142	131	113	140	132	142	151	129	116

Duoblaj pagoj	3845	5564	6253	6332	8265	9424	8687	9100	9155	9185	9111	8876	8619
Pagintoj post fino de la jara kalkulo	+ 49	+ 15							- 60	- 72	- 49	- 41	
S u m o	3894	5579	6253	6332	8265	9424	8687	9100	9095	9113	9062	8835	8619

Financoj de UEA

Rubrikoj	1920	1921	1922	1923	1924
1. Salajroj	17.826,62	25.177,90	24.878,40	25.414,50	22.943,50
2. Oficejo	2.156,25	4.816,73	4.260,35	4.084,30	3.585,20
3. Jarlibro	6.340,26	8.216,24	6.151,75	5.792,70	11.956,19
4. Revuo	16.168,30	20.071,85	16.523,25	8.459,77	15.929,—
5. Hiranko-oficejo	2.069,65	3.778,70	3.209,09	3.425,72	5.329,10
6. Hiranko Ter. ofic.					
7. Presaĵoj	3.070,26	2.033,27	2.273,92	2.330,09	3.020,82
8. Materialo	379,55	741,65	726,35	816,05	648,30
9. Vojaĝoj	569,64				235,50
10. Makleroj					
11. Kongreso	2.908,45	1.903,83	1.000,—	1.200,—	1.151,75
12. Tel. Tel.			78,20	55,50	70,50
13. ICK					
14. Premioj Subt.					394,55
15. Premioj Frupago Varbado					
16. Imposto			150,—	250,—	167,85
17. Elektro-Kom.					
18. Enk. Komisiono					
19. Statistiko					
20. Diversaj	478,71	512,10	62,20	192,32	675,04
21. Transkriboj	2.047,90	42,81	53,30		
22. Propagando			500,—		1.625,36
23. Konferenco			300,—		
24. Interezoj					
25. Translokigo					
26. Biblioteko					
27. Hmortizo	P(1) 494,49				
28. Oficeja ilaro					
	54.510 08	67.295 08	60.166.81	52.020 05	67.732.66

Komparo de la elspezoj de UEA 1920—1932

1925	1926	1927	1928	1929	1930	1932	1932	
25.391,80	27.658,50	23.500,—	24.170,—	25.191,50	23.860,—	22.495,—	20.821,25	
5.464,05	4.029,05	3.641,70	5.247,55	4.949,95	4.669,65	3.925,40	3.600,15	
17.093,97	14.139,93	14.181,21	17.174,26	13.082,26	11.029,25	9.919,10	7.110,—	
17.566,36	20.941,85	18.970,78	13.497,69	15.727,48	17.063,05	14.840,02	14.782,70	
5.674,15	4.940,75	5.850,50	4.265,80	3.549,25	4.214,05	3.610,40	4.087,95	
2.053,09	1.836,64	1.877,51	3.264,07	3.118,24	3.098,72	3.723,09	3.336,06	
5.289,07	4.588,56	4.469,95	3.811,24	2.970,53	2.697,15	2.485,10	1.526,45	
1.435,90	1.886,05	1.473,87	1.923,17	1.145,19	1.186,15	1.011,75	1.538,08	
575,20	1.360,48	501,80	2.472,28	992,72	1.006,75	962,95	840,—	
1.929,75	1.830,23	1.506,07	597,69	129,30				
	36,75	38,80	74,55	74,15	42,20	371,80	386,80	450,—
3.875,—	2.500,—	2.500,—	2.500,—	2.500,—	2.500,—	2.500,—	2.500,—	
3.071,42	3.124,87	3.165,05	1.864,19	2.716,53	1.885,85	3.057,95	2.909,45	
		1.706,36	2.997,19	2.710,09	2.952,75	3.251,15	2.825,65	
154,45	212,65	120,10	277,55	388,65	389,20	389,20	305,05	
			684,02			507,—		
			2.064,80					
			807,76					
498,65	513,62	1.345,40	995,95	1.270,39	1.489,65	1.578,47	1.341,95	
	418,47	80,—				920,35	1.306,—	
				1.107,50				
	450,—			1.541,25	1.000,—	1.400,—	1.200,—	
				510,25				
				146,25	525,55	304,25	216,96	
				1.625,—		300,—		
					539,70	270,55	510,40	
90.110,61	90.470,45	84.964,85	88.689,36	85.414,53	80.479,27	77.838,56	71.208,10	

Financoj de U&A

Rubrikoj	1920	1921	1922	1923	1924
1. HM Helpmembroj			9,51	29,52	77,—
2. M Membroj	3 531,76	3.752,52	4.115,25	4.740,39	6.065,42
3. MA Membro Abonantoj	17 729,18	26.099,41	28.333,28	31.854,62	41.926,21
4. MS Subtenantoj	1.298,43	1.505,37	2 614,97	3.249,30	6.039,38
Enspezoj el kotizoj	22.559,27	31.357,30	35.073,—	39.873,83	54.108,01
Aliaj enspezoj:					
5. Entreprenoj	615,32	536,32	451,01	491,52	850,05
6. Jarlibro-Aĵoncoj	1.021,47	1.012,27	1.185,76	1.042,95	2.344, 7
7. Gazet-Aĵoncoj	1.387,51	1.061,25	653,15	977,58	413,89
8. Abonoj-Grupoj	1.851,99	1.441,07	1.373,66	935,21	742,84
9. Vendo ponumera	15,89	8,10		27,90	28,—
10. Kongreso	893,75	571,20	173,40		
11. Aldonoj, div.	2.637,77	717,55	53,30	1.174,40	75,—
Ne kotizaj ^{ensp.} elsp.	8.423,70	5.347,76	3.890,28	4.649,56	4.454,35
Enspezoj el kotizoj	22.559,27	31.357,30	35.073,—	39.873,83	54.108,01
Sumoj el aliaj enspezoj	8.423,70	5.347,76	3.890,28	4.649,56	4.454,35
Sumoj	30.982,97	36.705,06	38.963,28	44.523,39	58.562,36

Komparo de l' enspezoj de UEA 1920—1932

1925	1926	1927	1928	1929	1930	1931	1932
206,88	224,90	149,11	90,18	53,87	42,55	155,05	257,45
8.516,68	8.156,23	9.434,77	8.957,85	9.801,80	9.797,96	10.149,12	10.646,54
51.454,80	49.780,27	52.417,06	52.108,47	53.126,70	49.349,—	44.069,59	36.401,51
9.914,89	9.533,63	10.652,30	10.081,98	8.279,18	8.385,19	10.570,96	11.066,06
70.093,25	67.695,03	72.653,24	71.238,48	71.261,55	67.574,70	64.944,72	58.371,56
692,01	779,86	588,35	803,46	873,50	713,85	894,22	618,06
3.348,30	2.128,71	1.457,10	1.737,11	1.545,23	1.242,62	1.213,25	308,20
697,52	1.664,22	1.485,85	1.282,17	1.124,86	1.177,75	756,82	1.207,36
731,04	662,22	615,99	589,17	364,17	486,39	483,80	435,33
10,—		119,85	36,13	30,62	329,50	190,65	59,75
5.013,40	1.910,20	449,—				234,10	
10.492,27	7.145,21	4.716,14	4.448,04	3.938,38	3.950,11	3.772,84	2.628,70
70.093,25	67.695,03	72.653,24	71.238,48	71.261,55	67.574,70	64.944,72	58.371,56
10.492,27	7.145,21	4.716,14	4.448,04	3.938,38	3.950,11	3.772,84	2.628,70
80.585,52	74.840,24	77.369,38	75.686,52	75.199,93	71.524,81	65.717,56	61.000,26

Financoj de U&A

Rubrikaj	Jaro	1920	1921	1922	1923	1923
	Sumo	54510	67296	60166	52020	67732
1. Salajro		32.70	37.41	41.45	48.86	33.87
2. Oficejo		3.95	7.15	7.09	7.85	5.29
3. Jarlibro		11.63	12.20	10.22	11.14	17.65
4. Revuo		29.66	29.84	27.46	16.25	23.52
5. Aŭfranko-Oficejo		3.80	5.62	5.33	6.59	7.87
6. Aŭfranko Terit. ofic.						
7. Presaĵoj		5.63	3.02	3.78	4.48	4.46
8. Materialo		0.70	1.10	1.21	1.57	0.96
9. Vojaĝoj		1.05				0.35
10. Makleroj						
11. Kongreso		5.33	2.83	1.66	2.31	1.70
12. Telef. telegr.				0.13	0.11	0.10
13. ICK						
14. Premioj Subt.						0.58
15. Premioj Frupago Varbado						
16. Impoŝto				0.25	0.47	0.25
17. Elektro-Kom.						
18. Enketa Kom.						
19. Statistiko						
20. Diversaj		0.90	0.76	0.10	0.37	1.—
21. Transkriboj		3.75	0.07	0.09		
22. Propagando				0.83		2.40
23. Konferenco				0.50		
24. Interzonoj						
25. Translokiĝo						
26. Biblioteko						
27. Amortizo		0.90				
28. Oficeja ilaro						
		100% _o	100% _o	100% _o	100% _o	100% _o

Laŭ procenta kaj laŭ rubrika divido de l'elspezoj 1920—1932

Statistika Tabelaro

1925	1926	1927	1928	1929	1930	1931	1932
90110	9470	84964	88689	83873	80479	77838	71208
28.19	30.57	27.66	27.25	29.49	29.65	28.90	29.20
6.05	4.45	3.84	5.92	5.80	5.80	5.04	5.06
18.97	15.63	16.69	19.37	15.32	13.71	12.74	9.99
19.50	23.15	23.33	15.24	18.41	21.20	19.06	20.76
6.30	5.46	6.89	4.81	4.15	5.24	4.64	5.75
2.28	2.03	2.21	3.68	3.65	3.85	4.78	4.68
5.87	5.07	5.26	4.29	3.47	3.36	3.19	2.15
1.59	2.08	1.73	2.17	1.34	1.47	1.30	2.16
0.64	1.50	0.59	2.79	1.15	1.25	1.24	1.18
2.14	2.02	1.77	0.67	0.16			
0.04	0.04	0.09	0.08	0.05	0.46	0.50	0.63
4.30	2.77	2.94	2.82	2.93	3.11	3.21	3.51
3.41	3.47	3.72	2.10	3.18	2.35	3.93	4.08
		2.—	3.38	3.17	3.67	4.18	3.98
0.17	0.23	0.14	0.31	0.46	0.48	0.50	0.43
			0.77			0.65	
			2.32				
			0.91				
0.55	0.57	1.58	1.12	1.49	1.84	2.02	1.89
	0.46	0.09				1.18	1.83
	0.50			1.30			
				1.80	1.24	1.80	1.69
				0.60			
				0.17	0.65	0.39	0.31
				1.91		0.38	
					0.67	0.37	0.72
100% _o	100% _o	100% _o	100% _o	100% _o	100% _o	100% _o	100% _o

Financoj de U&A

Kompara tabelo pri la meza kotizo

Jaro	Sumo de anoj	Sumo pagita por kotizoj	Meza kotizo	Divido laŭ kategorioj kaj la meza sumo ricevita po kotizo											
				Membro:						Membro-Abonanto			Subtenantoj		
				Nombro	Sumo	Meze	Nombro	Sumo	Meze	Nombro	Sumo	Meze	Nombro	Sumo	Meze
1920	3675	22.559,37	6.13	—	—	—	1055	3531.76	3.34	2551	17.729,18	6.94	69	1.298,43	18.81
1921	5387	31.357,30	5.82	—	—	—	1251	3752.52	3.00	4036	26.099,41	6.46	100	1.505,37	15.05
1922	5993	35.073,—	5.85	29	9.51	0.32	1456	4115.24	3.03	4379	28.333,28	6.47	129	2.614,97	20.27
1923	6153	39.873,83	6.49	71	29.52	0.41	1400	4740.39	3.38	4538	31.854,62	7.01	144	3.249,30	22.56
1924	8073	54.108,01	6.75	152	77.—	0.50	1793	6065.42	3.38	5839	41.926,21	7.10	289	6.039,38	20.89
1925	9239	70.093,25	7.58	187	206.88	1.10	2236	8516.68	3.80	6394	51.454,80	8.04	422	9.914,89	23.49
1926	8500	67.695,02	7.96	193	224.90	1.16	2179	8156.23	3.74	5722	49.780,27	8.69	406	9.533,63	23.48
1927	8913	72.653,24	8.15	127	149.11	1.17	2361	9434.77	3.99	5985	52.417,06	8.75	440	10.652,30	24.20
1928	8887	71.238.48	8.01	77	90.18	1.17	2400	8957.85	3.73	5966	52.108.47	8.73	444	10.081,98	22.70
1929	8899	71.261,55	8.00	43	53.87	1.25	2519	9801.80	3.89	5963	53.126,70	8.90	374	8.279,18	22.13
1930	8845	67.574,70	7.64	36	42.55	1.18	2675	9797.96	3.67	5749	49.349,—	8.58	385	8.385,19	21.77
1931	8620	64.944,72	7.53	113	155.05	1.37	2789	10449.12	3.63	5229	44.069,59	8.42	489	10.570,96	21.61
1932	8398	58.371,56	6.95	170	257.45	1.51	3027	10646.54	3.51	4654	36.401,51	7.82	547	11.066,06	20.23

Klarigo: Tiu ĉi tabelo montras la influon de la favoraj prezoj por multaj landoj. Ĝi estas la barometro de la monkurzoj. La Centra Kaso devus ricevi post depreno de la Delegita procentaĵo: Helpmembro: 2,25, Membro: 4,50, Membro-Abon. 11,25, Subtenanto 22,50 Frk. svissaj.

Financoj de U&A

Perdo-Gajno kalkuloj 1920—1932

Jaro	Spezoj de la Centra Kaso	Elspezoj	Enspezoj	Kruda perdo	Bilanca gajno		Neta perdo
					Rentumo	Servoj	
1920	151.750,77	54.510,08	30.982,97	23.527,11		1.237,81	22.289,30
1921	241.151,95	67.295,08	36.705,06	34.272,52		3.156,22	31.116,30
1922	247.335,86	60.166,81	38.963,28	21.203,53		2.018,19	19.185,34
1923	250.956,77	52.020,95	44.523,39	7.497,56		1.896,42	5.601,14
1924	250.330,19	67.732,66	58.562,36	9.170,30		2.267,12	6.903,18
1925	540.696,68	90.110,61	80.585,52	9.525,09	5.800,00	19,57	3.705,52
1926	374.370,18	90.470,45	74.840,24	15.630,21		1.407,15	14.223,06
1927	513.699,83	84.964,85	77.369,38	7.595,47	4.000,00	3.595,47	
1928	487.234,37	88.689,36	75.686,52	13.002,84	6.835,00	6.167,84	
1929	491.977,02	85.414,53	75.199,93	10.214,60	4.000,00	427,01	5.787,59
1930	498.458,99	80.479,27	71.524.81	8.954,46	4.000,00	1.680,83	3.273,63
1931	476.799,25	77.838.56	68.717,56	10.083,00	4.000,00	3.616,35	2.466,65
1932	389.098,02	71.208,10	61.000,26	11.985,00	3.500,00	4.943,00	3.542,00

Rimarko: 1920: Sub elspezoj troviĝas tie-ĉi plia sumo de 3682,50 por translokiĝo, sumo kiu pasis bilancan Perdo-Gajnon. 1931: Elspezoj entenas pliajn 962,— Fr. por senpagaj kotizoj. 1932: Same 1299,16 kaj 478,— por eksterbudĝeta amortizo. Ĉiuj tiuj sumoj pasis tra Bilanca P. G. kion ni kunigis tie-ĉi por ne fari novan rubrikon, ne-eble pro spaco.

Financoj de U&A

Jaro	Numero de ekz.	Paĝoj		Kosto de l' Jarlibro: en svisaj Frankoj				In'ekso 1913= 100 Unuekz.
		1) Anoncoj	2) Entute	Preso	Afranko	Sume	Unu ekz	
1913	7000	20	310	3771.—	1400.—	5171.—	0.74	100
1914	8000	50	354	4248.—	1600.—	5848.—	0.73	99
1916	3000	8	132	1200.—	177.—	1377.—	0.46	62
1920	4000	48	230	5540.—	800.—	6340.—	1.58	213
1921	6500	36	234	7500.—	716.—	8216.—	1.26	170
1922	6500	60	284	5500.—	652.—	6152.—	0.94	127
1923	6500	48	280	5000.—	793.—	5793.—	0.84	113
1924	9000	96	400	9000.—	2956.—	11956.—	1.33	180
1925	10000	116	468	14000.—	3094.—	17094.—	1.71	231
1926	9000	68	428	11000.—	3140.—	14140.—	1.57	212
1927	9500	32	512	10750.—	3431.—	14181.—	1.50	208
1928	10000	45	608	14000.—	3174.—	17174.—	1.71	235
1929	10000	30	480	9800.—	3282.—	13082.—	1.30	175
1930	10000	19	406	8945.—	2084.—	11029.—	1.10	148
1931	10000	18	420	8206.—	1713.—	9919.—	0.99	133
1932	9000	8	320	6000.—	1500.—	7500.—	0.87	145
1933	9000							

Komparo de l' kosto de la Jarlibro

La anoncoj, ilia influo sur la kostoj:						Presisto de la jarlibro
Kosto de unupaĝo	Enspezo por anoncoj	Po paĝo	Profito po paĝo	Procentaĵo de l'anoncoj	Kosto nela de unu ekz	
16.68	1085.—	54.25	37.57	21	0.58	Jobard, Dijon
16.52	1533.—	30.66	14.14	26	0.54	
10.42	133.—	16.62	6.20	1,2	0.41	
27.56	1021.—	21.27	6.30	16	1.33	
35.10	1012.—	28.11	6.99	12	1.11	August Pries, Leipzig
21.64	1186.—	19.76	1.88	19	0.76	
20.70	1043.—	21.72	1.02	18	0.73	
39.86	2345.—	24.42	15.44	19	1.07	
36.50	3348.—	29.—	7.50	19	1.37	
33.03	2129.—	31.30	1.73	15	1.33	Göring, Magdeburg
27.65	1457.—	45.53	17.88	10	1.34	
28.24	1737.—	38.50	10.26	10	1.54	
27.25	1545.—	51.50	23.80	12	1.15	
27.16	1243.—	65.26	38.10	11	0.97	
23.67	1213.—	67.39	43.72	11	0.87	
23.45	308.—	37.60	14.15	4	0.80	

ESPERANTO

Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER. Redaktoro : D-ro Edmond PRIVAT. Direktoro de UEA : Hans JAKOB.
Adreso de la Redakcio kaj Administracio : 1, Rue de la Tour de l'Île, Genève

DATOJ KAJ FAKTOJ

Fondita en 1904, la revuo „Esperanto“ estis ĝis 1920 persona posedajo de Hector Hodler, kiu laŭtestamente ĝin donacis al la Asocio, de li fondita. Redaktas ĝin Dro Edmond Privat de post 1920 kaj la teknikan aranĝon prizorgas la Direktoro. La adreso de la redakto kaj de la administracio estas 1 Tour de l'Île, Genevo. La presejo troviĝas en franca urbeto Annemasse, 8 km de Genevo, atingebla per tramo en 40 minutoj. Klopodante presigi kion eble plej profite, la revuo „Esperanto“ presiĝis krom Svislando jam en ĉiuj najbaraj landoj: Francujo, Germanujo, ja eĉ en Belgujo kaj Ĉeĥoslovakujo. De post 1928 ĝi presigas en Annemasse, kio prezentas por la redakcio grandan avantaĝon. Sed ĉio estu senescepte sendata al Genevo.

La redakcio de „Esperanto“ plezure akceptas kunlaboron de ĉiu, kiu sin sentas vokata. Post ricevo de manuskripto legas ĝin pluraj personoj, inter ili la Redaktoro kaj la Direktoro. Nepresebla manuskripto estos ĉiam resendata al la sendinto. La kunlaboro estas honora, sed en esceptaj kazoj, UEA faras honordonacon konsistantan el libroj de nia literaturo aŭ konsentas senpagan membrecon por unu jaro, laŭ la valoro, kiun havas la akceptita materialo.

Pri artikoloj respondecas ĝenerale la subskribinto. La oficialaj informoj de UEA aperas en aparte presata „Oficiala Informilo“ kutime sendata ĉiudumonte kun „Esperanto“ al ĉiuj abonantoj. (Depost 1932 en la revuo mem.)

La recenzadon de l' libroj plenumas honorofice de post 1920 S-ro Georges Stroele en Neuchâtel. Kutime nia redakcio ricevas du ekzemplerojn de ĉiu aperanta verko. Unu el ĝi por la recenzisto, la alia por la Biblioteko de UEA kaj de l' Bibliografia Servo.

Pri reklamoj, anoncoj kaj aldonoj vidu la koncernajn partojn.
Redakcio de „ESPERANTO“

La Esperanto-

Indiko	1920	1921	1922	1923	1924
1. Periodaĵoj					
a) en nacia lingvo	30	30	38	42	38
b) nur en Esperanto	12	14	19	24	20
Sume	42	44	57	66	58
2. Organizaĵoj					
a) Naciaj Societoj	23	23	26	30	39
b) Fakaj Societoj	9	21	22	32	33
c) Institutoj	—	—	1	1	3
d) Lokaj grupoj (laŭ la jarlibroj)	347	429	538	666	771
3. Kongresoj					
Universalaj	XII	XIII	XIV	XV	XVI
a) Nombro de kongresanoj	408	2561	820	4963	3400
b) El kiom da landoj	27	35	30	43	40
c) Re prezentitaj registaroj	7	8	8	8	8
d) Kongres-spezoj (en svisaj Fr.)	—	—	—	14000	44000

Kongreslokoj: 1920: Hago. 1921: Praha. 1922: Helsinki. 1923: Nürnberg.
Antwerpen. 1929: Budapest. 1930: Oxford.

Movado en ciferoj

1925	1926	1927	1928	1929	1930	1931	1932	1933
41	50	55	50	52	53	58	52	51
18	24	36	32	31	26	33	31	30
59	74	91	82	83	79	91	83	81
37	39	38	37	40	39	40	41	39
39	49	28	25	33	30	31	42	44
6	7	9	9	10	12	12	14	14
812	882	822	814	952	965	986	1058	1099
XVII	XVIII	XIX	XX	XXI	XXII	XXIII	XXIV	XXV
953	960	905	1494	1256	1200	777	1618	
35	36	34	33	33	30	26	36	
9	5	7	10	13	14	6	11	
21500	31000	22500	40000	28000	42000	23635		

1924: Wien. 1925: Genève. 1926: Edinburgh. 1927: Danzig. 1928:
1931: Kraków. 1932: Paris. 1933: Köln. 1934:

Kalkuloj de l' Konstanta Representantaro de l' Naciaj Societoj

Nacia Societo	Pagis al K. R. de 1923 ĝis 1931 la jenajn sumojn, en sv. Frankoj									Tuta sumo pagita de Nacia Soc. 1923—1931	
	1923	1924	1925	1926	1927	1928	1929	1930	1931		
Argentina . . .			25.22	24 50				50.—	31.90		131.62
Aŭstralazia . . .	52.50	126.10	129.25								307.85
Aŭstria Del. . .	50 —	50 44	19 75	9.43	8 60			21.50			159.72
Aŭstria As. . .								21.75	21 25		43.—
Belga	27.21	54 54	67.78	43 —	56.—	96.—	116.—	99 50	91.50		651 53
Brazila	62 80	71 12		50.—	50.—	50.—	50.—				333.92
Brita	750 —	756 60	693 55	691 15	693.—	632 70	630.30	625 85	631 10		6104 25
Bulgara	50.—					52 80		47.—			149.80
Ĉeosl.	78.10	102.14	66.83	100.—	104 30				141 30	158.—	750.67
Germ. en CSR . . .	16 25	110 34	224 98	228.75	146 35	175.—	135 40	125 53	127.—		1289 60
Dana	104.45	94 57	131 77	184.60	124.—	140.65	120.50	109.50	109.50		1119 54
Danciga				25.—				34 60	7.50		67.10
Estonia	11 25										11.25
Finnlanda	35.80			28.28							64 08
Franca	43.40	170 97	141.66	111.35	176.35	178 —	253 65	252 10	363 30		1690.78
Germana		196.09	246.—	727.25	310.10	399.—	742 95	486.30	492.15		3585.84
Helena					24 25		20.05	40.—			84 30
Hispana			148 37	148.—	176.50	168.—	148 80	118.57	112.35		1020.59
Kataluna		118.95	112 96	123.95	129.10						484.96
Hungara		25 85	60 33	21.—	10 70	13.20	50.—				181.08
Irlanda						14 40	13 95				28.35
Itala	50.—	42.03		80.85			51 40	51.40	51.40		327 08
Japana		196 61	212.15	117.—	120.—	228 —	228.—	250.—	251.40		1603.16
Kuba				100 —	100.—						200.—
Latva		33 63	25.22								58.85
Litova		29 21									29 21
Nederlanda	161.—	163 09	145.85	142 80	158.90	216.25	293.90	514.30	560.80		2356 89
Norvega	39.51	39.72				68.—	66.40	68.—	68 —		349 63
Pollanda	—50	20 28	47 49	37.—	36.40	30.—	55.—		56.40		283 07
Portugala				18.—	21 —		10.70	11 25			60.95
Rumana		54.01			64 25	19.—			30 60		167.86
Saarlanda					20 —	20 —	20.—	20.—	20.—		100.—
Sveda	75.—	91.22	77.02	72.25	66.50	67.—	111.40	116.75	248.45		925.59
Svisa	100.—	104 03	100.—	100.—	100.—	120.—	133.25	123 80	109 25		990.33
Sudslava					86.40		44.—				130.40
Urugvaja									7.40		7.40
Usona			205.22	125.—	153.—		128.35				611.57
Kalifornia	12.60		21.64	17.49	41.—	27.—	20.70				140.43
Kursdiferenco, donaco aŭ alpagio	1720.37 — 3 42	2651.54	2903 04 +46 96	3321.65	2967.70	2715.—	3619.55	3214 80 +181.—	3488 60		26602 25 + 224 54
Sumo laŭ K. R.-raporto	1716.95	2651.54	2950.—	3321.65	2967.70	2715.—	3619.55	3395 80	3488.60		26826 80

Universala Esperanto-Asocio

Centra Oficejo: 1 Tour de l'Île, Genève

Utilaj informoj

Ĉiu mendo de aliĝoj, de libroj, de respondkuponoj ktp. devas esti akompanata de la necesa sumo. La Centra Kaso ne rajtas kreditigi. Ĝi povas malfermi konton al ĉiu membro. Minimuma bonhavo daŭra estu 40 Frankoj svisaj. Por daŭra bonhavo, pli alta ol 100 Frankoj svisaj, ĝi konsentas rentumon de 3% jare. Transpagoj de tia konto al alia estas farataj senpage. Tio povas okezi precipe por aliaj esperantistaj organizaĵoj kaj entreprenoj, kiuj havas plej ofte konton ĉe ni. Se ne, la Centra Kaso prias pagojn, kalkulante la simplan elspezon por letero, laŭ la cirkonstancoj.

En landoj, kie ni havas poŝtekkonton tiaj pagoj de konthavanto al iu ajn do ankaŭ al *ne-esperantista* entrepreno, havanta poŝtekkonton en tiu ĉi lando, estas farata senpage.

La Centra Kaso de UEA akceptas ĉiun fremdan monon por taga kurzo (vendo) ĉekojn kaj ĉiujn pagilojn valorigeblajn ĉe borso. (British Postal Orders, Bon de Poste Français). — Internacian poŝtan respondkuponon ĝi akceptas nur por 0,30 Frk., kio respondas al la sumo kiun pagos la poŝto. Poŝta respondkuponon devas esti ĉiam stampata maldekstre de la vendanta poŝtoŭficejo, por esti valorigebla. Por malgranda anon-roj estas akceptataj ankaŭ poŝtmarkoj de ĉiu lando, sed nur novaj, ne ĉifonitaj kaj makiitaj.

La Banko kun kiu laboras la Centra Kaso estas la Svisa Banka Societo kies titolo estas: Société de Banque Suisse (Schweizerischer Bankverein / Società di Banca Svizzera / Swiss Bank Corporation).

Por negoca bezono oni uzu prefere la francan aŭ germanan titolon de tiu ĉi banko, por eviti konfuzon. La Centra Kaso posedas poŝtekojn en jenaj landoj:


